


**GUY MARCHAND**



# **unu** **aŭ** **nul**

La Mondo

aŭ estos tutmondista

aŭ ne plu estos

Broŝurservo de S.A.T. - "Laŭte!"  
1991

**Originalo en la franca lingvo** : "1 ou Zéro", eldonita de Club Humaniste, BP.97, 75015 PARIS.

Plu mendebla ĉe : 15 rue Victor Duruy  
F 75015 PARIS

**Eldono en esperanto** :

Tradukis : Heredanto. Lingve kontrolis : Valo kaj SAT-Broŝurservo. Eldonanto :

Cercle amical espérantiste de l'Agenais  
F 47470 BEAUVILLE

Unua eldono en la kadro de SAT-Broŝurservo : 1983.

**Noto de la reeldonanto** :

En pluraj lokoj, la teksto, fidela al la originalo, mencias "antaŭ 20 jaroj". Ĉar la originalo aperis antaŭ 20 jaroj, la leganto bonvolu aldoni la koncernan jarnombrom : 20 jarojn en 1992, ktp...


**En la sama serio de SAT-Broŝurservo** :

Andrée Gaymard-Rollet

**Por Tutmonda Civitismo**

La necesa civitana edukado (76 paĝoj)

**GUY MARCHAND**



# **unu aŭ nul**

La Mondo

aŭ estos tutmondista

aŭ ne plu estos

Broŝurservo de S.A.T. - "Laŭte!"

1991

**Dediĉita al Maurice COSYN  
(Maŭrico KOZIN) (1901-1968)  
al la plej eminenta tutmondista  
aktivulo**

**ĉia penso  
ĉia agado  
ĉia sindonemo  
estu ekzemplo al ĉiuj, havantaj  
la mision konstrui la pli justan  
mondon, kiun ni pretevis.**

Ĉiu homo iom prenas de ĉiu homo. Ĉiu homo estas plagiato. Ankaŭ mi estas tia, nur alprenante la subtitolon

**"La Mondo aŭ estos tutmondista aŭ ne plu estos"**

devenanta de la mondfama "One World or None" (Unu sola Mondo aŭ Nenia) de Einstein (Ejnŝtejn)

Ĉu ankaŭ kono ne estas plagiato? Ĉar ni alprenas de ĉiu iom el lia scio? Tiele, de 28 jaroj mi kolektis idearon ĉe miloj da tutmondistoj el la tuta mondo, mi kopiis agadojn ; kaj kun miaj propraj ideoj kaj agadoj jen mi al vi prezentas mian konceptaron pri tutmondismo, kiu laŭ mia opinio ne tro diferencas de la lukto plenumata jam de kvaronjarcento far preskaŭ miliono da aktivuloj, kun la celo konstrui efikan politikan organizon de la mondo, destinitan provizi pacon kaj justecon al la loĝantaro de nia planedo.

En Cigalo, 3an de marto '71.

Tutmondisto estas teknikisto, celanta donaci al la loĝantaro de la planedo la rimedojn por mondscale organizi la demokration.

Jen tio, kion li jam donacis :

**17an de aŭgusto 1947 :**

Principo por efika politika organizo :  
Tutmonda Federismo.

**27an de julio 1949 :**

La Tutmonda Magistratejo kun ties Registrolibro por la Mondcivitanoj.

**3an de marto 1969 :**

Transnacia balotelekto por havigi al si siajn Elektitajn Tutmondajn Delegitojn.

**12an de decembro 1971 :**

Konfirmo de sia Tutmonda Vidpunkto per la Tutmondista Sumo.



Ni vivas en erao de absoluta politika feŭdismo, en kiu la Naciŝtatoj ludas ekzakte la saman rolon, kiel la feŭdaj baronoj de antaŭ mil jaroj.

For eĉ ke ili posedus la liberecon, for eĉ ke ili havigus al si la protektadon kaj la sekurecon, kiujn ili esperis de siaj Naciŝtatoj, la civitanoj estas senĉese elmetataj al subpremado, al perforto, al detruo. La multnombreco de la suverenaĵoj unuoj konfliktantaj en nia socio detruas ĉiun spuron de la libereco, de la protektado kaj de la sekureco, ĉar ili ne estas subordigitaj al Leĝo pli alta, ilin ĉiujn superanta.

Emery REVES (Emri Rivs)

La politika strukturo de la nuna mondo konsistas el multnombraj unuoj, nomataj Naciŝtatoj, nepre postulantaj antaŭmeti kaj respektigi la tutecon de siaj suverenecoj.

La logiko de ĉi tiu sistemo rezultigus, ke ĉiu Naciŝtato timas sin trovi malpli armita ol la ceteraj Naciŝtatoj, cele al antaŭgardo de sia suvereneco.

Profesoro BOULET (Bule)



## KIAL UNU AŬ NUL ?

Tre multnombraj aŭtoroj detale priskribis la motivojn instigantajn la homaron organizi tutmondan ordon por certigi sian pluvivon. Nome :

- La homo detruas sian naturan medion ;
- La homo uzas pli da oksigeno, ol la oceanoj kaj arboj kapablas reestigi ;
- La homo malŝparas pli da trinkebla akvo, ol la naturo kapablas provizi ;
- La homo poluas la oceanojn, ja vivofonto, per la hidrokarbidoj, atomaj kaj industriaj forĵetaĵoj ;
- La homo malpliigas la kultiveblajn areojn kaj arbarojn ;
- La homo pligravigas la termikan poluadon pro sia diabla bezono pri energio ;
- La homo ne scipovas moderigi sian fulmrapidan multnombriĝon ;
- La homo ne scipovas mildigi sian naturan agresemon kontraŭ la aĵoj (poluado) nek kontraŭ la homoj (lokaj kaj tutmondaj militoj) ;
- La homo vivas en konstanta malsekureco okazigita de la timo pri ekigo, ĉu vola ĉu akcidenta, de milito atoma, kemia, bakteria aŭ klimata.

Kaj tamen la ĉiutagaj faktoj evidentigas, ke la vivo de ĉiu homo estas solidara de la vivo de ĉiuj loĝantoj de la planedo :

- Forigo de la distancoj koncerne la informojn, ĉar ili estas konataj de la tuta mondo en la momento, kiam okazas la evento ;
- Forigo de la distancoj ankaŭ por la personoj, dank'al la supersonaj aviadiloj ;
- Forigo de la koncepto pri senlima Tero, de kiam ĉi-lasta estis fotita fare de kosmonaŭtoj ;
- Forigo de la landlimoj per la disvastiĝo de industria socio unutipala laŭ sia pensmaniero, scienco, kulturo, loĝejo kaj vestmaniero.

Nu, la homo nenion faras por certigi mondscale la nepraajn kondiĉojn de sia pluvivado :

- Preterpasi la politikan organizadon de la Naciŝtato kiel la homo scipovis preterpasi la organizadon de la provinco ;
- Preterpasi la septadon okazigitan per 250 000 kilometroj da naciaj landlimoj ;
- Disdoni tutmondan edukadon ;
- Preterpasi la eksmodajn konceptojn de la tabuoj, religioj, politikoj, ekonomioj, rasismoj, sociaj klasoj kaj ceteraj konservemaj konceptoj, limigantaj la tutmondan ekkonsciigon pri solidareco ;
- Preterpasi la timojn pri unuflanka forlaso de la propra nacia suvereneco ;
- Preterpasi seneliran vetarmadon ;
- Preterpasi la egoismon de la riĉaj landoj fronte al la malriĉaj ;
- Preterpasi la naciisman blindigon de la malriĉaj landoj kun la celo montri, ke ilia problemo povos trovi solvon nur mondscale ;
- Preterpasi kaj aliigi la rolon de la postenitoj, mem eldevenaĵo de la nacia suvereneco defendenda aŭ pligrandigenda : politikistoj, diplomatoj, militistoj ;
- Preterpasi la inertecon de la personoj kontentaj pri la politika organizo, en kiu ili vivas kaj kiu ne povos plu daŭri ;
- Preterpasi la koncepton, laŭ kiu sufiĉas la momenta defendo de la ĉiutaga vivo ;
- Preterpasi la silenton de la gazetaro ;
- Fine, ĉesigi la Irenezan kuradon al kontentigo de artefaritaj bezonoj, per racie elpensita rezignado.



## FUNDAMENTAJ BEZONOJ

La unua funkcio de la Delegitoj elektotaj de la Popolkongreso konsistos el starigo de la inventaro de la fundamentaj bezonoj, komunaj al ĉiuj homoj.

Ĉi tiuj fundamentaj bezonoj, kiuj ili estas? Laŭ iuj, ili ŝajnas evidentaj ; tiele tamen ne opinias tiuj, kiuj ellaboris la projekton pri la Kongreso de la popoloj, kaj kiuj scias, ke ĉi tiu inventaro ne tiel evidentas. Ĝi estas pli malfacile ellaborebla, ol oni povas imagi unuavide.

Ĉu reale temas pri bezonoj? Ĉu ne temas prefere pri rajtoj? Al kiuj oni devus aldoni devojn? Ĉu ili estas fundamentaj, aŭ ne ?

Ĉu tiuj bezonoj nepre estu samaj por ĉiuj? Ĉu al tutmondistaj aktivuloj apartenas la tasko ilin difini, aŭ ĉu al la elektitaj delegitoj? Evidentas, ke por tiuj, kiuj pripensis la projekton pri la Kongreso de la Popoloj, ĉi tiun taskon oni transdonu al la Elektitaj Delegitoj. Sed ĉu tiuj Delegitoj ne estas emanaĵo de la elpensantoj de la tutmondismo, tutmondistaj aktivuloj, tutmondistaj pensuloj, kiuj elpensis la projekton kaj klopodas ĝin starigi? Al ili do rajte apartenas la rolo ekigi la fundamenton de ĉi tiu ellaborado, kun la celo montri al la registaroj, ke tutmondismo interesigas ĉefe al defendo de la aparta homo.

Parolante pri fundamentaj bezonoj, oni unue konceptu ian relativecon en tempo kaj spaco. La bezonoj de eskimo evidente ne similas tiujn de tuarego, kvankam por ĉiu estas eble kalkuli necesan nombron da kalorioj, da proteinoj, da grasaĵoj kaj vitaminoj. Sed ĉi tiuj bezonoj, kiuj povas ŝanĝiĝi laŭ la latitudoj, povas varii ankaŭ laŭ la vivniveloj kaj tiel oni povas konstati ŝokajn malegalecojn ; pro tiu motivo oni povus reuzi la terminon "homrajtoj", kvankam la termino "fundamentaj bezonoj" ŝajnas pli konforma.

En ilia elnomado, ni devas prikonsideri du kategoriojn de bezonoj :

- tiuj koncernantaj la apartan individuon ;
- tiuj koncernantaj la individuon interne de la socio.

Por la aparta individuo la plej elementa bezono, tamen tro ofte nekontentigita por miliardoj da homoj, estas la bezono pri **nutraĵo** ; al ĝi sin aldonas :

- la bezono pri **loĝejo** ;
- la bezono pri **vestoj** ;
- la bezono pri **medicina zorgado**.

Ĉi tiuj kvar fundamentaj elementoj estas menciitaj en la artikolo 25a de la Universala Deklaro pri la Homrajtoj.

La kvar bezonoj, kiujn ni ĵus difinis, devas esti certigitaj de la socio al ĉiu loĝanto de la planedo, ĉefe kiam ĉi tiu loĝanto ne plu kapablas ilin kontentigi pro manko de strukturoj, pro analfabeteco, senlaboreco, malsano, kripleco, maljunuleco aŭ ia ajn alia perdo de vivrimedoj sekve de cirkonstancoj sendependaj de lia volo.

Male, la bezonoj de la individuo en la sino de la socio estas pli multnombraj kaj pli malfacile difineblaj.

- **Rajto je vivmedio** : kvankam tre freŝdata, ĝi aspektas la plej grava, de kiam oni ekkonsciis, ke la poluado rezultanta de nia industria socio minacas niajn vivrimedojn, damaĝante la akvon, aeron kaj grundon.
- **Rajto je vivo** : ĝi implicas la neceson ne plu vidi tre etan malplimulton decidantan pri la vivo de la ceteraj per militdeklaroj, mem ne partoprenante. Sed ĉi tiu rajto je vivo povas levi diskutojn tre delikatajn, ekzemple la deziron pri libera memdispono de la propra korpo (kontraŭkoncip- kaj abort-rajto) aŭ elekton de la propra morto aŭ malpligravigon de la sufero. Ĉi tiuj problemoj estas tro malsimplaj, ol ke oni povu ilin ekstrakti ĉi tie, ĉar estas nepre evitende, ke malbonuzo povu malnobligi ĝis krima agadon, kiun oni deziras humana. La Elektitaj Delegitoj al la Kongreso de la Popoloj eble povos pridiskuti ilin, se la pensmaniero sufiĉe evoluis, por forigi por ĉiam la trouzojn, pri kiuj freŝdata pasinto pruvis, ke ĉi tiu timo ne estas vana.
- **Rajto je paco** : la artikolo 28a de la Universala Deklaro pri la Homaj Rajtoj mencias, ke "ĉiu persono rajtas, ke regu laŭ socia kaj internacia vidpunktoj ordo tia, ke la rajtoj kaj liberecoj, eldiritaj en la nuna deklaro, povu havi plenan efikon". Ne estas homaj rajtoj sen ordo, sen paco, sen efika politika organizado de la paco je planeda

- skalo, el kiu konsistas la bazo mem de la tutmondismo.
- **Rajto je libero pri penso**, opinio, konscienco, religio, kulto, por ke neniu estu ĉikanata pro siaj opinioj, kaj ke ĉiu povu ilin eldiri en kompleta sekuro.
  - **Rajto je justeco** antaŭ tribunalo publika, sendependa kaj senkosta.
  - **Rajto je homa digno** esence propra al ĉiu ano de la homa familio kaj al ties rajtoj egalaj kaj netuŝeblaj. Neniu suferu enstrudiĝon arbitran en sian privatan vivon, familion, loĝejon, aŭ korespondataĵon. Nek sklaveco, nek torturo, nek iu ajn malnobligo de la homa stato estu tolerataj.
  - **Rajto je edukado** deviga kaj senkosta kun la celo doni ŝancegalecon al ĉiuj sociaj kategorioj.
  - **Rajto je integrado en komunumo**. La nuna mondo fakte pli kaj pli tendencas disigi la homon disde ties natura vivmedio. Nepre necesas reestigi tiun medion, por ke je ĉiu stadio de sia vivo la individuo povu havi homajn kontaktojn tiajn, kiaj estis ekzemple tiuj iamaj diskutoj sur la placo de la vilaĝo.
  - **Rajto je memelmetado**, reage kontraŭ la "numero-homo". La homo devas konscii pri sia rolo en la propra disvolvigo kaj en tiu de la homa specio.
- Necesas difini bezonojn aŭ rajtojn, sed ankaŭ devojn, samkiel en la tempo de la Konstitucio de la jaro III-a (de la franca revolucio, noto de la tradukinto), tial, ke vivante en socio la homo devas ĉesigi sian liberon tie, kie komenciĝas alies.
- **Devo respekti la antaŭe menciitajn rajtojn.**
  - **Devo plenumi sian tutmondan civitismion**, ekzemple voĉdoni por partopreni en la politika organizo, en kies sino oni vivas ; ankaŭ igi ĵuriano por igi la justicon senpartia kaj efika ; ankaŭ respekti ĉies komunajn riĉaĵojn.

Ĉi tiu elnomado de la rajtoj kaj devoj estas for de kompleta listo ; ĝi tamen prezentas la problemojn nepre solvotajn fare de la Delegitoj elektotaj de la Kongreso de la Popoloj kun la celo difini en ĝia tuto la fundamentajn bezonojn, komunajn al ĉiuj homoj. Nenio pli grava kapablos utili la homan celkaŭzon.

## TUTMONDA CIVITISMO

Civitismo estas la tuto de la devoj de la civitano kontraŭ ties patrlando.

Tutmonda civitismo estas la tuto de la devoj de la Mondcivitano kontraŭ la tutmonda patrio, kontraŭ la akceptitaj reguloj, la demokrate estigitaj leĝoj. Sed la tutmonda civitismo estas ankoraŭ kreenda, pro tio, ke ankoraŭ ne ekzistas Tutmondaj Leĝoj, kiujn la Mondcivitano havus la devon respekti.

Certe nombro da loĝantoj de la planedo jam efektivigis agojn libervolajn, cele al tutmonda civitismo, al ĉi tiu tutmonda konsciigo de la homo. Ili ekzemple sin enlistigis ĉe la Tutmonda Magistratejo, kiun konsistigas la Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj, fondita ekde la 27a de julio 1949. Tiele ili havigis al si tutmondan legitimkarton ; iuj poste volis partopreni en la estigado de la tutmonda demokratio, voĉdonante ĉe la **unua transnacia balotelektado** en la historio de la Homaro, en jaro 1969.

Ĉi tiuj unuaj du agoj en direkto al Tutmonda Civitismo estis plenumitaj de kelkaj loĝantoj de la planedo pro tio, ke ĉiu el ĉi tiuj loĝantoj konsideris sin solidara kun ĉiuj ceteraj homoj.

Se ĉiu urbo aŭ komunumo, laŭ la ekzemplo de Cahors (Kadurco), Montpellier (Montpeliero) aŭ Hiroŝimo sin rekonas solidara kun ĉiuj ceteraj urboj en la mondo ; se individuoj kaj grupoj de individuoj nepre postulas estigon de asembleo ilin reprezentanta kaj ellaboranta konstitucion, estigontan la tri povojn (leĝdona, plenuma kaj jura), tiam la homoj finfine povos esperi ion konstrui en paco. Ĉi-foje ili estos agnoskataj kiel civitanoj de iu tutmonda politika komunumo ; ekde tiu momento, kaj nur ekde tiu momento, la tutmonda civitismo povos ekzisti.

Sin deklari hodiaŭ mond-civitano, tio do signifas anonci la tutmondan civitismon ; tio signifas, per sia atesto denunci la trouzojn kaj laŭtigi la motivojn, postuli ŝanĝon ; tio signifas devigi la publikajn potencojn ĉiufoje kiam

eblas, prikonsideri la aferon je monda skalo ; tio signifas partianiĝi kun la individuo kontraŭ la kolektivo ne plu konscianta siajn devojn kontraŭ li, kun la popoloj kontraŭ la Naciŝtato.

La Mondcivitano konstatas, ke la koncepto pri Nacio ne plu validas kaj, ke oportunas pensi Tutmonde. La Naciŝtatoj devas integriĝi en tutmondan komunumon. La organizado de la mondo ne plu devas esti submetita al arbitro.

La Mondcivitano estas do tiu, kiu postulas, ke estu ellaborataj kaj kontentigataj la fundamentaj bezonoj komunaj al ĉiuj homoj.

La kontentigo de ĉi tiuj bezonoj je monda skalo kondiĉas por ĉiuj homoj la uzeblon de ĉiuj fundamentaj liberecoj. La statuso de Mondcivitano ankoraŭ ne ekzistas, ĉar ĝis hodiaŭ neniu ĝuas rajtojn aŭ spertas truditajn devojn, mondmotive.

Tamen, postvenante nacian civitismen, kies tro mallarĝa kadro disrompiĝas sub la premo de la bezonoj ĝin superantaj, tutmonda civitismo iĝis nepre necesa. Ĝi povas kaj devas efektiviĝi la premejon. Necesas esprimi la deziron de tutmonda komunumo dotota per politika potenco, garantianta la samajn rajtojn al ĉiuj homoj. Eblas koncentri ĉies intereson ĉe vivesencaj demandoj, por ke la ĝenerala intereso iĝu garantianto de la individua. La disponeblaj rimedoj - gazetaro, radiodissendoj, kinarto kaj televido - provizas sufiĉe da temoj ebligantaj starigon pere de faktoj, de komparoj inter la institucioj de ceteraj landoj kaj de la nia.

Ankaŭ la internaciaj institucioj povas provizi rimedojn, komprenigi la interdependecon de la nacioj kaj homoj.

La plimulto de tiuj organizoj : OMS (por la sano), UNESKO (por la edukado), FAO (por la nutrado) estis kreitaj surbaze de la bezonoj komunaj al ĉiuj homoj, kaj ke ili ĝis nun ne atingis la difinitan celon, tio estas pro tio, ke ili ne disponas pri plenuma potenco kaj dependas de kunmetaĵo de nacioj, inter si konkurencaj. Konsekvence, eblas montri, kiaj akiroj restas efektivigendaj, por ke ĉi tiuj institucioj iĝu sendependaj kaj efikaj, t.e. tutmondaj.

La Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj ankaŭ provizas okazon, ektuŝi la demandojn komunajn al ĉiuj homoj : sed



Ĉi tiuj rajtoj, kiujn ĝi laŭvice eldiras laŭlonge de siaj 33 artikoloj, povos efektiviĝi nur tiam, kiam leĝaro mondskala ebligos, ke oni obeu ilin. Dependas de ĉiu homo, ke ĉi tiu deklaro, kiu estas nur senpova deziresprimo, iĝu Deklaro pri reale garantiataj rajtoj de la Homo kaj Mondcivitano.

Al tiuj ĉi luktoj kaj konkeroj necesas alvoki ĉiujn homojn. Se en la nacia kadro ne plu eblas gvidi civitan edukadon, kapablan entuziasmigi aŭ proponi taskojn taŭgajn por estigi la bezonon pri agado kaj idealo, la kono, kiun havas ĉiuj homoj pri demandoj al ili komunaj, ebligos alkonduki ilin al tiu civitana konscio, kiu malkovrigos al ili ties respondecon kiel Mondcivitanoj.

### TUTMONDA FEDERISMO

Tutmondismo havas la devon defendi la homon kaj krome aplikigi la Universalan Deklaron pri Homaj Rajtoj. Estas ja la homo, kiu interesas la tutmondiston; la homon kiel tian li antaŭmetu al ĉia organizo aŭ homa grupo. La tutmondismo baziĝas en siaj decidoj kaj balotoj sur jena principo: unu homo = unu voĉo. Ĉi tiun voĉon oni respektas; ĉi tiu voĉo estas la simbolo de la egaleco de ĉiu homo sur la planedo. Sed por aplikigi ĉi tiun idealon, potenco estas bezonata. La plej belaj idearoj sen potenco restas nur belaj paroladoj. Evidente, kiam la morala evoluo de ĉiu loĝanto de la planedo estos sufiĉe kreskinta, ĉia potenco ne plu utilis, sed ni bedaŭrinde ne atingis ĉi tiun idilian stadion.

Nenombreblaj movadoj laboras por malpliigi la streĉadon inter ŝtatoj, postuli la malarmadon, limigi aŭ forigi perforton, moderige orienti la naturan agresemon de la homo. Nu, batali por tiaj celoj estas ja necese sed ne sufiĉe. Estas necese, laŭ ĉi tiuj pacemaj ideoj, politike organizi la mondon, por anstataŭigi perforton per Lego.

Nu, malmultaj tutmondistoj antaŭvidas la alvenon de tutmondaj potencoj laŭ alia formo ol la federa, por sin starigi kontraŭ ĉia totalisma centralizismo. Jam antaŭ pli ol 20 jaroj eblis legi en la Pakto de la Mondcivitanoj:

"Antaŭ ol estus tro malfrue, ni volas, ke naskiĝu komuna leĝo kaj nova federa tutmonda potenco komisiota ĝin aplikigi."

Federismo do ebligas organizi la homan aktivecon, respektante la fundamentajn liberecojn, pro tio ke ĝi gardas realan aŭtonomion de la bazaj organizaĵoj tiaj, kiaj komunumo, teritorio, regiono aŭ ŝtato, tamen ebligante al ĉiu el ĉi tiuj organizaĵoj delegi parton de sia suvereneco al la organizaĵo senpere supera, kiu lasta posedas potencon realan, tamen limigitan, por alpreni la ĝeneralinteresajn decidojn kaj ilin aplikigi.

Federismo defendas la individuon, al universala organizo submetante ĉiajn politikajn reĝimojn, ĉiajn ekonomiajn fortojn, kiuj estus tiam devigataj defendi sian propran konvinkon, eble kun sama ardo, antaŭ verda tapiŝo aŭ en asembleo, prefere ol per armiloj.

Federismo implicas finarango per la leĝo, ne per la forto, de la rilatoj inter la organizaĵoj, eĉ se tiuj estas vastegaj kiel Naciŝtatoj aŭ grupo de Naciŝtatoj.

Tutmonda federismo postulas modifon de la nunaj politikaj strukturoj por igi nerevenigebla la eventon, evitontan la reaperon de streĉadoj inter la Naciŝtatoj aŭ la homaj grupoj.

Tiucele estas do necese, organizi la demokration je ĉiu el la ŝtupoj ĝis la tutmonda skalo, por ke ĉiu civitano partoprenu en la ellaborado de la Leĝo, kiun li obeos kaj kiu lin protektos. Li havas la eblon sin turni al la ŝtupo senpere supera, eĉ ĝis la monda ŝtupo, por esti protektata kontraŭ ĉia potenctrouzo de iu ajn ŝtupo.

La unua transnacia balotelektado, de la 3a de marto ĝis la 7a de junio 1969, estis la unua paŝo al la demokrat-eca organizado disvastigota al la tuta planedo. Federismo, per siaj delegitoj elektitaj senpere de la monda popolo al Kongreso de la Popoloj laŭ la bazprincipo "unu homo = unu voĉo", havas la rimedojn redakti kaj akceptigi, dank' al la seriozeco de sia organizado, tutmondan konstitucion federan.

Sur ĉiuj ŝtupoj la politikaj organizoj gardas la aŭtonomion akordigeblan kun la bona funkciado de la publikaj aferoj. Nur la funkcioj, kiuj ne povas esti plenumitaj

efike sur tiu ŝtupo, estas transdonitaj al la supera. Sur ĉiu ŝtupo la konkernatoj havas la eblon plenumi efikan kontrolon. Se la juĝorajto estas establita de malsupre supren, necesas ankaŭ, ke la potenco povu sin apliki de supre malsupren kaj transiri la interajn stadiojn, kiam temas respektigi la fundamentajn rajtojn de la homoj.

La ĉefa intereso, laŭ materia vidpunkto, de tia organizo troviĝas esence en la forigo de la naciaj armeoj same kiel la provincaj armeoj malaperis, kiam la potenco transiris al la supera ŝtupo, nome tiu de la Reĝo je la tempo de la malapero de la feŭdaj baronoj, kiuj ne plu kapablis certigi la sekurecon de siaj "protektatoj".

Nuntempe la sama procezo estas necesa : por protekti la sekurecon de la loĝantoj de la Naciŝtatoj, necesas ke la kontestoj inter Naciŝtatoj aŭ grupoj de Naciŝtatoj estu solvotaj ne per forto sed per la Leĝo

Antaŭ ol eniri la detalan priskribon de tiu federista organizo, ŝajnas utile, difini la federistan praktikadon, prezentante pri ĝi sufiĉe simplan bildon.

Ni imagu posedanton de tereno, kun kvar najbaroj: unu el la najbaroj troviĝas sur la sama komunumo kiel li ; la dua sur alia komunumo ; la tria en alia departemento ; fine, la kvara en fremda lando. La kontesto, kiun li povos sperti kun ĉiu el siaj najbaroj, dependos de ĉiu aparta kazo : kun la unua najbaro la demando solviĝos inter la du posedantoj, ĉiu ĝuante plenan suverenecon super sia respektiva bieno ; kun la dua estos neceso sin turni al la supera organizo, en la konkerna kazo la komunumo : la afero estos solvita de komunumo al komunumo - parto de la suvereneco de la du posedantoj estos transdonita al la senpere supera ŝtupo. Kun la tria okazos transdono de la suvereneco je dua ŝtupo, nome la komunumo kaj poste la departemento. Sed rilate la kvaran, kiu loĝas en fremda lando, estas tute alie : se ne ekzistas paĉa konsento inter la ŝtatoj, tiam okazos sinturno al perforto, al milito, sen supera intermeto kiel en la kazo de la komunumo aŭ departemento, tial ke ne ekzistas transdono de potenco al la supera ŝtupo : ĉar la ŝtato estas laŭprincipe suverena.

Kontraste, iuj landoj vivas sub federa reĝimo. Ekzemple, Svisio akceptis federan konstitucion antaŭ preskaŭ

jarcento kaj duono, de la tago kiam tri kantonj konvinkigis, ke el iliaj internaj bataloj nenio bona povis rezulti.

Rusio, Usono, Meksikio, Germanio havas federajn strukturojn, pli-malpli flekseblajn.

La federa strukturo estas tre antikva ; ĝi posedis kaj posedas siajn teoriistojn, ĝi havas siajn aplikojn. Certe ĝi bezonas perfektigon, tamen ĝi prezentas sin kiel la nuran eblan organizeblon de la mondo, por eviti la tutmondan superŝtaton, al kiu la progreso nerezisteble kondukas la homaron, sub la direktado de tre malgranda malplimulto. Federismo ekde la uzino (kun la formo de memmastrumado), aŭtonomio de la komunumo, de la regiono, eĉ de la ŝtato, se nur ĉi tiu respondas al etna unuo, kun sia volo ĉion unuigi, gardante la liberan aŭtonomion de la homo, estas la nura formulo kapabla certigi la bonstaton de la homaro.

### TUTMONDA DEMOKRATIO

La koncepto demokratio estas malfacile difinebla kaj esprimebla.

Ĉi tiu nocio estas esence variema ; variema laŭ la epokoj, kaj ĉefe laŭ la socia vivo kaŭzita de la industria progreso.

Atendante la efektivigon de senordona socio, la nuntempa socio dume estas mastrumata pere de ordonoj ; estis do necese akceptigi ĉi tiujn ordonojn kiel eble malplej malagrabla. Estas do saĝa politiko, al la homoj momente ne favorataj de ĉi tiuj potencaj ordonoj havigi la esperon, ke iam ili siavice povos dikti siajn proprajn ordonojn, kiujn la ceteraj homoj estos devigataj obei. Ĉi tion oni nomas demokratia alternado.

La nacia komunumo do konsentis pri politikaj sistemoj organizitaj laŭ la epokoj kun reĝoj, feŭdaj baronoj, spiritaj potencoj aŭ klasoj, sed, laŭmezure kiel la tuta popolo plej konsciis pri sia stato, ĝi volis partopreni en la elaborado de la ordonoj. Konsekvence, ĝi pli facile konsentas pri eldevido, tial ke ĝi kredas, ke ĝi havas la povon ĝin kontroli. Ĉi tiuj principoj konsistigas la demokratian idealon, kiun oni devas alceli ĝis estos malkovrita pli taŭ-

ga organiz-sistemo, ekzemple kun seninterrompa konsulto helpe de komputoroj, kun la celo al la homo ebligi memdecidon.

La nuntempaj informrimedoj nepre evoluigu la tutmondan komunumon al ĉi tiu demokratia idealo.

Ĉi tiu volo de la tutmonda komunumo je tutmonda skalo almenaŭ malhelpus la multecon de la naciaj volo, kiuj, estrataj de malsamaj leĝoj, trudas alfrontadojn.

Eĉ se ornamita de la plej belaj idealoj, la nacia volo per si mem naskas la motivojn por alfrontadoj.

Tial la mondskala demokratio rekomendata de la tutmondanoj devigas ĉiun loĝanton de la planedo meti sian esperon en la homon, tute ne en la nacion.

Ĉi tiu demokrata mensostato rezultigas, ke ĉiu civitano de la mondo opinias, ke la ĉina, malagasa aŭ hinda delegito tiom kapablos kiom la blankhaŭta reliefigi la porvivajn interesojn de siaj elektintoj.

Forpasis la tempo, kiam estis eble ion decidi sur la forumo. Ĉiu individuo nuntempe estas devigata delegi parton de sia povo al kuncivitanoj, kiuj dum certa tempo findecidos. Sed la fundamenta bazo de ĉi tiu delegado ja estas : unu homo = unu voĉo. Tiel la absoluta suvereneco de la popolo superregos en la tutmonda komunumo, kontraŭe al absoluta suvereneco de la malplimulto tiraneca kaj neŝanĝebla.

Pere de la nocio "unu homo = unu voĉo" ĉiuj homoj estas egalrajtaj sub la leĝo, kiu garantias sekurecon kaj liberecon.

Sed konsenti pri demokratio, tio signifas konsenti ankaŭ pri malplimulto, kiu inter du voĉdonadoj nepre suferu la leĝon de la plimulto. Tia estas la ludregulo akceptita de ĉiuj. Tamen tiu malplimulto riskas esti tre grava, nome ĝis 49% de la tutmonda komunumo. Necesas do, ke ĉi tiu malplimulto ne ĉiam restu malplimulteca, neniam povante esprimi sian opinion. Pro tio, ĉi konsilantaro de la Malplimultoj estu projektita en la Tutmonda Konstitucio kun la celo antaŭenmeti la malplimultecajn depostulojn, por ke ĉi tiuj ne iĝu eksplodemaj kaj ne konduku al detruo de la sistemo memvole establita de la tutmonda popolo mem.

Tiel la tutmonda demokratio devus ekzistigi tiun mas-trunmanieron ebligantan la sekurecon sine de la libereco de la civitano de la mondo. Jen la nura rimedo havigi ĉies aliĝon al la tuthomara komunumo.

Perfekta tutmonda demokratio estas konceptebla nur kun perfekta tutmonda popolo, popolo el "dioj", diris ROUSSEAU (Ruso'). Estas tamen vere, ke eblas per sinsekvaj korektoj alceli ĉi tiun perfektecon, alceli estiĝon de pli kaj pli da libero en la politikaj rilatoj, tio estas, en la rilatoj inter ordono kaj obo, rilatoj esence propraj al ĉiu organizita socio, tiom longe dum la mensa evoluo de la individuo ne estos sufiĉe progresinta por ebligi al ĝi seniĝi je tio.

### TUTMONDA FEDERA KONSTITUCIO

Multnombraj estas la projektoj pri Tutmonda Konstitucio. Da ili ekzistas laŭdire 150, ni do diru, ke jen ni prezentas al vi la 151-an, kiu lasta estas iel "miksaĵo" de la antaŭaj kun speciala insistado pri la Konsilantaro de la Malplimulto.

Fakte, se oni atingos, ke homgrupo, eĉ izolita homo, ne plu estos turmentata de la komunumo, de kiu ĝi dependas sekve de la hazardaj, historiaj eventoj, tiam la homaro estos atinginta la celon, kiun ĝi devas alstrebi.

Ĉi tiu projekto pri Konstitucio estos esence federema. De la bazo ĝis la supro necesos prizorgi tiun delegadon limigitan, tamen realan, de la povo al la senpere supera ŝtupo, por ĉiuj decidoj superantaj la koncernan grupon kaj tiel ĝis la nivelo de la tuta planedo.

Ankaŭ de la supro ĝis la bazo, trairante ĉiujn ŝtupojn, la federa aŭtoritato devos ĝui kompetentecon por malhelpi, ke la fundamentaj bezonoj komunaj al ĉiuj homoj, ankaŭ al izolita homo, estu ofendotaj.

Umano en 1907, Privat (Priva) en 1942, Larmeroux (Larmeru) en 1946, de Meutter (Demuter) en 1947, Borghese (Borgez) en 1949 kaj Bossin (Bosin) en 1961, ĉiu el ili proponis Tutmondan Konstitucion.

Sed kio estas Konstitucio? Ni prenu la difinon de Borgez: "Ĝi estas manifesto, kiu estas proklamo de la bazaj

principoj". Por la tutmondistoj la bazaj principoj estos tutmonda organizo, politika organaĵo kaj jura meĥaniko.

Politika homo evidente ne havos eblecon komplete kontentigi ĉiujn homojn, pro ties tro diversaj pens- kaj viv-manieroj. Estos tamen necese, ke ĝi kontentigu kiel eble plej multe da ili, samtempe efike prizorgante la plej malfavoratajn kazojn, por al ĉi-lastaj havigi vere homan ekzisteblon.

La Konstitucio estas leĝo utilanta kiel kadro al la organizado de la civitanoj de la civito, de la regiono, de la lando, de la mondo. Ĝi nepre estu emanaĵo de ĉiuj. Ĝi nepre estu ĉiunomente reformebla pro la scienca evoluo, en kies sino vivas la homaro.

La Tutmonda Konstitucio ne penos harmoniigi la malsamajn interesojn kontraŭstarigantajn la Naciŝtatojn inter si, sed postulos, ke ili agnosku minimumon da mondskalaj protektoj komunaj al ĉiuj homoj sur kampoj tiaj, kiaj atomscienco, kosmo, elektroniko, komputortekniko, bakteriologio, ĥemio, iamaniere sur ĉiuj kampoj konsiderinda influantaj la vivon kaj sintenon de la homo.

La tutmondistoj ĉiam opiniis, ke Tutmonda Konstitucio devos esti ellaborita de tutmonda konstitua asembleo de la popoloj, kiu sin inspiras per la okazintaĵoj de la franca revolucio aŭ en 1946 ĉe la alveno de la Kvara franca Respubliko. Tamen ekzistas ekzemploj de konstitucioj malsimile ellaboritaj, kiaj la svisa konstitucio aŭ tiu de la 5a franca respubliko. Sed ĉiuj estis submetitaj al la popola aprobo.

Kion devos enteni ĉi tiu Tutmonda Konstitucio? Antaŭparolon kaj la tri povojn : leĝdonan, plenuman kaj juran. La leĝdona povo disponos pri du ĉambroj kaj konsilantaroj, la plenuma pri korpuso de informantoj kaj la jura pri pluraj kortumoj.

Tamen antaŭ la ekigo de la Konstitucio necesus solvi kelkajn faktorojn de unueco por certigi la materiajn bazojn de la funkciado, inter kiuj ŝajne plej gravas la loko kaj la lingvo. Fakte, ĉiuj centraj organoj devus situi sur neŭtrala tereno ekster ĉia influo : eble en iu dezerto aŭ insulo. Same liglingvo estus difinita kaj iĝus deviga por la delegitoj kaj la tutmondaj oficistoj, ekzemple esperan-

to, krom se komputoro-tradukmaŝino povus efektiviĝi facilan komunikadon en ĉia ajn lingvo.

- La **antaŭparolo** iel estos priskribo de la Homaj Rajtoj kaj de la Devoj de la Mondcivitano. La Homaj Rajtoj estis difinitaj en 1948 ; koncerne la devojn de la Mondcivitano, ili ankoraŭ estas difinitaj, ĉar individuo vivanta en socio nepre plenumu certan nombron da devoj. Ekzemple, en demokrata reĝimo li havas la devon voĉdoni, esti ĵuriano, partopreni en tiu organizo de la homa solidareco.

- La **Leĝodona(j) Ĉambro(j)**. Ŝajnas, ke, almenaŭ ĉe la komenco, necesus dum certa tempo disponi pri du ĉambroj, ĉar tiam estus necese, havi reprezenton de la Naciŝtatoj sine de iuspeca Tutmonda Senato. Sed en malproksima estonto ŝajnas, ke sufiĉos la nura ĉambro de la popoloj.

Tiu Monda Senato povus konsisti el cento da delegitoj reprezentantaj homgrupojn el minimume 2 ĝis 5 milionoj da personoj, kio kondukus al ia grupiĝo de malgrandaj nacioj.

La Monda Asembleo de la Popoloj senpere elektota de la monda popolo laŭ universala voĉdonado, devus havi ne pli ol 1000 delegitojn, ĉar pli granda nombro igus la diskutojn malfacilaj. Ĉe la komenco la tutmondistoj projektis 1 delegiton por 1 miliono da loĝantoj. Eble necesus elekti 1 delegiton por 1 miliono da voĉdonantoj aŭ por 1 miliono da familioj.

Eble utilis ĉe la komenco antaŭprogrami ian ekvilibrigon de la voĉdonoj pro la demokrazia influo de iuj Naciŝtatoj. Ĉi tiu ekvibrigo povus faciligi ilian gvidadon al tiu eluzo de la nacia suvereneco. Eble utilis ankaŭ, modifi la bazprincipon "1 homo = 1 voĉo" laŭ iuj distingiloj profesiaj, sciencaj, edukaj, kiuj tiam roligus la diversecon de la homa estaĵo en la elekto de ties delegitoj?

- Apud ĉi tiuj du ĉambroj estus kreataj certa nombro da **konsilantaroj**. Ĉi tiuj asembleoj ne estigus leĝojn, sed plenumus enketojn kaj studojn pri apartaj temoj, por ilin proponi al la ĉambroj.

Konsilantaro el saĝuloj predikus la ĉefan kvaliton de tutmondismo, nome toleremon, ĉi tiun respekton al la opinioj de la najbaro, por certigi la diversecon de la federa



unuiĝo. Ĉi tiu Konsilantaro el Saĝuloj ebligus laŭ Jules Romains (Julo Romen) al la homaro spiritajn progresojn, dum ĝi ĝis nun efektivigis nur materiajn progresojn.

Konsilantaro pri Homaj Rajtoj kaj Devoj de la Mondcivitano firmtenus la deklarojn en harmonio kun la evoluo de la socio.

Konsilantaro ekonomia kaj socia, konsilantaro pri informado, ankaŭ aliaj konsilantaroj povus esti projektitaj sed ĉefe Konsilantaro por la Malplimulto, kiu studus ne nur la grupigon de malgrandaj landoj aŭ regionoj, sed precipe protektus grupojn etnajn aŭ religiajn kontraŭ pli multnombraj homgrupoj, en kies sino ili troviĝas turmentataj.

Kiam ellaboritaj estas la tutmondaj leĝoj, necesas ilin aplikigi fare de **plenumilo**, t.e. **Tutmonda Federa Registaro** konsistanta el mondaj ministroj kun disbranĉiĝo je ĉiu ŝtupo de la federo. Korpuso de mondaj inspektistoj estus antaŭvidita por informi la registaron kun la celo ne rompi la leĝojn tutmondajn, ekzemple per fabrikado nelegaj de bomboj atomaj aŭ bakteriaj, de aliaj armiloj aŭ preparado de perforta revolucio.

Kaj kompreneble tiu registaro devus aplikigi punojn, ĝis la individuoj iĝos sufiĉe evoluintaj por praktiki memdisciplinon.

- La punoj normale igas pritrakti la trian povon, kiu devas malhelpi la trouzojn, nome la federan juĝan povon. Ĝia unua tasko estos respekto al aplikado de la Tutmonda Konstitucio dank'al la federa juĝoĉambro. Ĉi tiu solvos la konfliktojn, kiuj povus okazi inter la asembleoj kaj la registaro aŭ inter la registaro kaj la diversaj Naciŝtatoj. Federa Juĝa Kortumo sin okupus pri la kontestoj inter la Federitaj Ŝtatoj kaj fine la federaj regionaj tribunaloj zorgus pri la kontestoj inter la diversaj bazoj de la federo. Unu el ĝiaj ĉefaj taskoj konsistus el protektado de la civitano, kiu, estinte monda oficisto, revenas en sian landon.

Per kelkaj linioj ni ja pritraktis ne ĉiujn mekanismojn, inkludotajn en Tutmondan Konstitucion. La Konstitucio nepre havu la ununuran celon, protekti la homon kiel individuon, nome malhelpi, ke ĝi estu frakasita de grandega socia tuto, imagita por la momenta kontentigo de tre malmultnombra malplimulto.

## KONSILANTARO DE LA SAĜULOJ

Kvankam la moderntempanoj strebas minimumigi la influon de la spiriteco sur la efektiveco, restas tamen vere, ke nuntempe :

- Nixon (Niksn) ĵuris per religiaj libroj kaj Brandt per la biblio.
- Milionoj da personoj ĉeestas la paskan diservon en Moskvo.
- Naser komplete sin dediĉis al Alaho, Gandhi liberigis Hindion dank'al neperforto.

Ĉi tiuj kelkaj faktoj pruvas, ke spiriteco nuntempe posedas konsiderindan povon super politiko kaj en ĉia estonta organizo de la mondo estus pereige ĝin ignori. U.N.O. jam efektivigis unuan paŝon, kreinte Meditĉambron, sed ĉu ne utilis preterpaŝi, kreonte iuspecan "Mondan Konsilantaron de la Saĝuloj" laŭ la kutimo de Antikva Grekio?

Verkisto Jules Romain (Julo Romen) en sia libro "Demando n-ro I", kiu temas pri Monda Registaro, mencias la utilecon de spirita potenco, manke de kiu ne eblus ĉeesti establighon de erao de reala paco ; la civitana milito anstataŭus la militon de la Naciŝtatoj. Pro tio Jules Romain tiel esprimas sian penson :

"Starigo de Monda Registaro ne liberigus de establigho de spirita povo. Tute male. Ju pli ampleksaj estus la rimedoj de la materiala povo, ju pli ĝiaj iniciatoj rezultigus konsekvencojn kaj riskojn por ĉiuj popoloj, des pli necesus kontroligi ĝin per superega spirita instanco."

Estas certe, ke mondisteco havigas al la individuo kiel tia nenian moralan progreson, kvankam estas ja progreso en la direkto al laika moralo, pensi preter la strikta kadro de la nacio. Estos neniu motivo por ke la monda elektoto havu pli bonan sintenon al siaj mondaj elektontoj, ol la nacia elektito al siaj kuncivitanoj. Kaj la bataloj por la povo riskus dronigi la homojn en la samajn suferojn, kiel la naciistaj bataloj, kaj estus tiom pli gravaj, ke la posedantoj de la povo havus pli da ĝi.

La monda ŝtato do bezonos spiritan adaptadon metotan je la materia nivelo de la industria erao. La moderna mondo neniel celis la spiritan plibonigon de la individuo, ĝi ce-

lis nur la materian plibonigon, el tio rezultas pli kaj pli grava malekvilibro. Tion cetere asertas S-ro Arminjon (Armenjon), korespondanto de la Akademio de moralaj kaj politikaj Sciencoj, dirante : "La progreso efektiviĝis preskaŭ ekskluzive sine de la ekzaktaj sciencoj kaj teknikoj. Ĝi ne disvastiĝis ĝis la spiritaĵoj valoroj, kiuj estas la ĉarpento de la civilizitaj socioj. En la daŭro de la lastaj kvardek jaroj la individua kaj publika moraloj, la civita menso, la leĝeco, la respekto al la kontraktoj male suferis en la plimulto de la landoj kaj speciale en Francio, fortan regresadon, kiu, se ĝi pludaŭrus, rezultigus regresadon de la civilizo mem."

Utilus do antaŭprogrami kreadon de iu Konsilantaro pri la Spiritaj Valoroj laŭ difinita kriterio, kaj kiu konsistus el personoj celantaj mempliboniĝon, por vidi la faktoj tiaj, kiaj ili estas kaj ne tiaj, kiaj la propagando volas ilin elmontri. Ĉu oni ne devus agi laŭ iuj principoj de la grandaj moralistoj-pensuloj de la homaro, ĉu deistaj, ĉu sendiaj : Budho, Jesuo, Mahometo, Konfuceo, Zoroastro, Gandhi, Tolstoj, Spinozo...?

Tiel ni povas diri kune kun Jules Romains :

"Kio necesas al la homaro persekutata per la puŝo de sia materia progreso, tio estas organo por longtempa antaŭvido, organo de superega saĝeco, ĝuonta sufiĉan prestiĝon, por ke tiu homaro minacata per memdetrua frenezigo ĝin obeu. Tiurilate UNO ne nur suferas malfortecon. Ĝi ne estis farita por tia tasko. Nenion ĝi havas en sia koncepto kaj strukturo, respondantan al tiu novspeca urĝeco."

Kaj ĉu la mondĉivitanoj ne jam faris paŝon al tiu monda konsilantaro de la saĝuloj, subskribiginte alvokon de 13 tutmondistaj eminentuloj kun tutmonda famo?

Se monda aŭtoritato estas nemalhavebla por efika politika organizo de la planedo, spirita aŭtoritato estas ne malpli necesega.

### TUTMONDISTA MORALO

Kia moralo? Kio estas ĉi tiu moralo, ĉi tiu scienco pri rezonfaritaj reguloj por fari la bonon kaj forigi la malbonon?

La plimulto el la moraloj devenas de la religioj, ĉu rivelitaj, ĉu ne, kaj tiu de Spinozo devenas de la racio.

Kiun elekti? Sed ĉu oni devas elekti iun?

Ĉu la tutmondista moralo ne povas esti kreota laŭmezure kiel tutmondismo eniras ĉies pensmanieron? Ĉar ia ajn moralo havas la devon plibonigi la interhomajn kontaktojn, konkretigi la homan fratecon, sed, ĉu oni ne devas preni el ĉiu religio tion, kio proksimigas la homojn kaj faciligas ilian komunan vivon, rifuzante tion, kio interoponigas ilin? Ĉu oni ne devas ĝin kompletigi, por ke la respondeculoj de tiu Tutmonda Aŭtoritato, kiun ni celas krei, ne estu gvidotaj de la samaj malamoj kaj la samaj perfortemoj, kiel la respondeculoj de la Naciaj Aŭtoritatoj : ĉar ili gvidus la homojn al la samaj suferoj, kaj tiom pli forte, ĉar la potenco, kiun ili havas en siaj manoj, estus pli ampleksa. La moralo estas unuavice laboro kolektiva, ĉar la kolektivo devas instrui jam en lernejo novan kontaktmanieron inter la homoj, alportante respekton al ĉies najbaro, al la malplimultoj rasaj aŭ politikaj, toleremon laŭ vidpunktoj filozofia aŭ religia, respondecon kontraŭ la malriĉaj landoj, celadon al justeco por igi ĉiujn egalaj laŭ vidpunktoj ekonomia, socia aŭ politika.

Estos longdaŭra laboro, malhelpi, ke la homoj konsideru demandon tia, kia ili volas ĝin konsideri kaj ne tia, kia ĝi reale kuŝas. Estos malfacilega tasko, diri al homoj, ke ili serĉu sian malamikon en si mem kaj ne ekstere. Estos peniga tasko, montri al la homoj, ke amaso da organizoj nuntempe eksmodaj malutilas al ilia propra disvolvigo. Sed ĉu, ĉar aperas ĉiuj tiuj malfacilaĵoj, oni ĉesigu sian agadon? Certe ne. La malfacilaĵoj utilas, havigante pli da volo por venki ; ili plifortigas la homojn kaj provizas al ili ĉiujn rimedojn ebligantajn, ke li atingu sian deziraĵon, kio povas doni al li materiale kaj mense ĉion, kion li aspiras semiskonas pro nescio pri la propra riĉaĵo.

Por ebligi al la homo vivi en la sino de sia nova tutmonda patrio, nova moralo estas naskiĝanta.

La tutmondista moralo konstruiĝas ĉiutage, por ke la kunlaboro preterpasu la konkuradon, interhelpo anstataŭu almozon, justeco bonkorecon, kaj federado forigu la kunligon de kontraŭaj interesoj.

Longtempe daŭros la evoluo de la ordinara moralo, antaŭ ol atingi ĉi tiun superegan celon! Sed dume la tutmondista moralo havas la devon, ebligi la funkciadon de politika organizo de la mondo.

## MALPLIMULTOJ

Ekzemplojn pri malplimultoĵ turmentataj, ekspluatataj, torturataj, elpelataj, neniigitaj, oni renkontas laŭlonge de la tuta homara historio. Genocidoj celantaj neniigi grupon homan, nacian, etnan, rasan aŭ religian, estas faroj de la fortulo kontraŭ la malfortulo, de tiu, kiun favoras la leĝo, kontraŭ tiu, kiu havas nenian rimedon agnoskigi siajn rajtojn homajn, aŭ siajn rajtojn pri libero de grupiĝo, religio, konceptaro aŭ etno. Armenoj sub Turkoj, Judoj sub Hitler, Biafranoj sub Nigerianoj, Bengalanoj sub Pakistananoj. (kvankam plimultaj laŭnombre ili tamen estis malplimultaj laŭ posedo de povo) estas ekzemploj freŝdataj kaj plej frapaj de tiuj krimoj, kiuj forigas la homon de tiu homara solidareco, kiun devus celi ties civilizigaj aktivadoj. La sendefenda malplimulto ofte estas predo de la venĝemo, de la malamo, eĉ simple de la natura agresemo de ĉiu estaĵo.

Ĉu ne ĉeestas ĉi tiu natura agresemo jam de la plej frua aĝo, kiam la infanoj primokas la kamaradon malpli dotitan, aŭ malfavoratan de la naturo?

Tion oni konstatas ankaŭ ĉe tiu bezono ŝajnigi sin superulo, foje tiom pli, ju pli malalte oni kuŝas sur la socia ŝtuparo, iuspeca venĝo de la malfortulo. Tion oni vidis dum la lastdataj militoj : okupanta germano kontraŭ franco, franco kontraŭ hindoĉino aŭ alĝeriano.

Aliflanke, en niaj kompleksaj socioj ni apartenas al diversaj medioj : familia, profesia, religia, sindikata, etna, lingva, ideologia, kaj ĉiufoje, kiam atako celas iun el tiuj grupoj, al kiuj ni apartenas, ni sentas tion kvazaŭ maljustaĵon. Estas same, kiam iu malplimulto baraktas kontraŭ maltoleremo de plimulto : Nigruloj en Usono, Kurdoj en Irako, Ibooj en Nigero, Netuŝebluloj en Hindio, Judoj en araba lando, Palestinanoj en Israelo, Bengalanoj en Pakistano.

La sola agadrimedo de la turmentata malplimulto tiam estas ribelo celanta apartigon disde la plimulto aŭ disde tiu, kiu havas la potencon. Sed ĉu tiu ribelo havas ian sukcesperspektivon en nia moderna socio, organizata en Naciŝtatoj posedantaj la tutan potencon, potencon protektatan de la sanktega principo pri nacia suvereneco, en kies sino neniu lando povas sin trudi, krom dum milito, kaj en kiu nenia internacia organizo povas respektigi la justecon? La senpoveco de UNO kontraŭ Biafro, Bengalo aŭ Kongo tragike bildigis la respekton al ĉi tiu principo. Kiuj estas la motivoj?

Ĉu la timo ĉeesti la starigon de nova nacio fare de la turmentita malplimulto?

Ĉu timo al balkaniĝo de la mondo, kontraŭonta la grupojn ŝajne trudatajn al la nuntempa mondo pro ekonomiaj kialoj?

Ĉu timo ĉe la potenculoj ĉeesti malpliigon de sia influo? Ŝajnas fakte kaj grandparte, ke ĉi-lastata motivo estas la unuaranga kialo de tiuj hororaj konfliktoj. Kaj tamen aliaj rimedoj estas malkovrindaj kaj malkovreblaj, kunligontaj justecon kun la necesa kaj harmonia interdependeco de ĉiuj homaj grupoj.

La tutmondismo, kaj nur ĝi, per la limigo de la absoluta suvereneco de la Ŝtatoj, povas dank'al federa sistemo respektigi la diversecon de la grupoj ideologiaj, religiaj aŭ etnaj. Nur tutmondismo kun sia defendo de la homo kiel homo, plej malforta esprimo de la malplimulto, ebligos respektigon de la rajtoj de la ekspluatato.

Ĉe la estonta federa organizo de la mondo unu el la plej efikaj rimedoj por defendi la malplimultojn estos, projekti Konsilantaron de la Malplimultoj. Ĉar se ĉe federismo oni konceptas, ke pluraj nacioj povas sin grupigi en regionan federon, tre povas okazi mala movado kaj etna grupo povas deziri sin apartigi de nacio, kies parto ĝi estis, aŭ de regiona federo, kiu ne kontentigis la esperojn en ĝi metitajn.

Tiu Konsilantaro de la Malplimultoj agonta ĉe la federaĵoj devus ankaŭ antaŭzorgi, malhelpinte la frakason de iu malplimulto, ke ĉi-lastata ne strebu akiri potencon ebligontan al ĝi fariĝi siavice ekspluatanta plimulto.

Tiu Konsilantaro pri la Malplimultoĵ devos ankaŭ komprenigi al la momentaj plimultoĵ, ke ili ne ĉiam povas certi pri sia privilegia stato kaj ke ilia toleremo tiam estas la plej valora garantio pri feliĉa estonteco. Pro la nuntempaj detrurimedoj, rasoĵ, kredantoĵ, nekredantoĵ, plimultoĵ, malplimultoĵ estas kondamnitaj kune vivi ; necesas eltrovi por tio rimedoĵ. Ĉi tiu rimedo estas tutmondismo, kiu konsistigas la efikan politikan solvon al organizado de la planedo, ĝis la tempo, kiam la morala kaj mensa evoluo de la homo atingos sufiĉe altan nivelon, ebligontan al ĝi forigi el sia menso ĉian nocion pri ekspluatado kaj superado.

"SCIENTIA DEBIT  
SCIENTIA DABIT"

D-ro Emile Marchand (1850)

### UZADO DE LA TEKNIKOĴ

Ĉu scienco naskos tutmondismojn? Estas tute versimile, ke ĉi tiu demando ricevos jesan respondoĵ, ĉar, se la scienco jam havigis al la homo teknikoĵ, ĝi estonte devos havigi al ĝi eĉ multe pli.

La tekniko evoluigis la vivkondiĉojn de konsiderinda nombro da individuoĵ laŭ favora direkto ; tamen, senorde ekspluatate, ĝi ne malpliigis la nombron da malfeliĉuloĵ, tute male : antaŭ du jarcentoj, t.e. antaŭ la scienca eksploddisvolviĝo, troviĝis sur la planedo 700 milionoj da loĝantoĵ, sed hodiaŭ, kun 4 miliardoĵ da individuoĵ ekzistas multe pli ol 700 milionoj da ili, kiuj suferas mizeron.

Fakte, laŭmezure kiel la tekniko ebligas pliiĝoj de la nombro da loĝantoĵ de la planedo, kaj la materian kontentigon de pli kaj pli grava procento da ili, ĝi senindulge kondukas ankaŭ al multe pli rapida pliiĝo de la absoluta nombro da viktimoĵ de tiu industria socio sen tutmonda planiĝo.

La tekniko malpliigis la infanaĝan mortokvanton sed la homo ankoraŭ ne kapablis provizi la rimedojn dece vivigi la estaĵojn, kiujn ĝi tiel savis.

La tekniko kapablis plilongigi la vivdaŭron de la homo sed ne scipovis li kompense trovi ĝuon en la ekzistado.

La tekniko plibonigis la komforton de kelkiuj, sed la homo difektas, ofte nerebonigeble, la medion en kies sino disvolvigis la vivo.

La tekniko kreas pli kaj pli rapidajn veturrimedojn, preskaŭ nenigante la distancojn, sed la homo ne kapablas malhelpi, ke la homoj kreu ankaŭ pli kaj pli efikajn rimedojn por malebligi ĉi tiujn veturadojn mem per nenombrablaj limoj, foje netransireblaj.

La homo kreas potencajn rimedojn por memdetruado kun la iluzi plena celo, certigi al si memprotektadon.

Per la rimedoj por tuja informado, kiujn ĝi disponigas al ĉiuj, la tekniko ebligas al la plej malfavorataj homoj ekkonscii pri sia mizera stato. Ĝi tiel igas eksplodemata tro malbone ekvilibrigitan socian staton, al kiu ĝi ne kapablas provizi solvon.

La rolo de la scienculo tamen devus esti, ebligi kontentigon de la fundamentaj bezonoj de ĉiu homo sur la planedo, alikaze li estus neplenuminta sian taskon.

Sed tiucele la scienco devas helpi estiĝon de tutmondismo, tial ke ĝi ne konas landlimojn, kiel tion diris P-ro Alfredo Kastler, Nobelpremiito pri fiziko. La scienco estas tutmonda en sia kreado, la scienculoj komunikas reciproke siajn eltrovaĵojn, ili helpas unuj la aliajn trans la landlimoj. La scienco volas esti politike neŭtrala, kvankam la Naciŝtatoj klopodas sigele konservi ĝiajn eltrovaĵojn per arma sekreto.

Rapidege tiaj sekretoj transiras la landlimojn.

Nu, dum pacotempo la tekniko sin organizas pli kaj pli mondscale : normigo, informlingvoj, proksimigo de la naciaj juroj, leĝoj validaj sur la tuta planedo koncerne aviadon, meteorologion, navigadon...

Eĉ ekspluatado de la patentoj pli kaj pli okazas fare de societoj plurnaciaj, eĉ tutmondaj.

Ĉe ĉiuj tiuj klopodoj por tutmonda disvolviĝo la homo havas la devon difini al si ununuran celon, nome forpuŝi la limon de la mizero, ne nur inter la Naciŝtatoj sed ankaŭ interne de ĉiu Naciŝtato, ĉu evoluinta ĉu ne.

La homo havas la devon kontraŭbatali la malfruigon de la socia organizo de la homaro. Tion longe, dum unu sola loĝanto de la planedo estos flankelasita ĉe distribuado de la kreita riĉaĵo, oni rajtos diri, ke la teknikoj ne estas



uzataj, kiel oni rajtas tion deziri.

Sed por ni, tutmondistoj, la bonfara rolo de la scienco povos efektiviĝi nur, se ĝi ebligos dissplitigon de la landlimoj por okazigi :

- tutmondan planon por certigi kreadon kaj distribuadon de la riĉaĵoj ;
- tutmondan planon por malhelpi uzadon de la scienco por farado de senutilaj armiloj ;
- tutmondan planon por naskoplanado ;
- tutmondan planon por lukto kontraŭ la malsanoj ;
- fine, ĉi tiuj tutmondaj planoj devus certigi harmoniigon de la homo kun ties medio.

Tiel la scienco, kiu puŝas la homaron al unuigo, havas la devon ebligi al ĝi sin organizi politike, celante estigi tutmondajn instituciojn, kiuj estos la nura rimedo, kiu, stadijon post stadio, ebligos atingi ĉi tiun celon.

### TUTMONDA ASEKURO

Blanka ŝiparo, blankaj kaskoj, tutmonda helpoplano, tutmonda S.O.S., multnombraj estas la sugestoj post katastrofoj, kiaj en Skoplje, Agadir, en Peruo aŭ Pakistano.

Sed kiam forpasis la katastrofo, ĉiuj humanaj sugestoj disfalas en plej kompletan forgeson.

Ĉiu lando tuj forlasas sian momentan solidarecan impeton, esperante, ke la venonta katastrofo okazos ĉe la najbaro.

Kion oni povas fari?

Oni ofte mencias la ekzemplon de Dunan, kiu kreis la Internacian Ruĝan Krucon, post kiam li estis mirkonsternita de la krioj de la vunditoj en la batalo de Solferino. Sed ĉu ĉi tiu organizo ne kolizias konstante kontraŭ la nacia suvereneco de ĉiu Naciŝtato?

Ĉu la helpoj ne tro malfrue alvenis ĉe ciklono en Bengalo, novembre 1970?

Koncerne la naturajn katastrofojn, ne okazigitajn de la homoj, kiaj tajfunoj, inundoj, tertremoj aŭ vulkanaj erupcioj, necesus krei tutmondan agentejon, pretan agi senprokraste kaj senimprovize. Tiu agentejo iel konsistigus tutmondan asekuron kontraŭ la naturaj katastrofoj. La financa partopreno de ĉiu Naciŝtato ja estus akceptebla,

tial ke ĉi tiu partopreno konsistigus la asekurpagon. Ĉe la pago ĉiu Naciŝtato povos pensi, ke ĝi eble estos mem la profitonto ; tiel, pro egoismo ĝi partoprenos en tutmonda laboro. Sed se oni petas partoprenon post la katastrofo, kiel okazas nuntempe, tiam la agadmotivoj estas tute mal-similaj. Ĉi tiu agado estas modera laŭ la avantaĝo, kiun la Naciŝtato povos profiti. Nu, Maroko aŭ Pakistano mal-multe gravas sur la tutmonda ŝaktabulo.

UNO ja provis antaŭplani tutmondan interhelpon kaj la 19an de decembro 1968 ĝi voĉdone akceptis rezolucion, laŭ kiu ĝi "alvokas al la Ŝtatoj membroj de UNO aŭ membroj de specialigitaj institucioj, ke ili prikonsideru oferon, pere de UNO aŭ laŭ ajna alia maniero, de urĝa helpo en okazo de natura katastrofo, speciale helpoteamojn aŭ teamojn pretajn interveni senprokraste, aŭ similajn teamojn rezerve konstituitajn, sendotajn en fremdan landon, kaj petas la Ĝeneralan Sekretarion pridemandi la Ŝtatojn, membrojn de UNO aŭ de specialigitaj institucioj, pri la specoj de urĝaj helpoj, kiujn ili povos proponi.

"UNO petas la Ĝeneralan Sekretarion, ke li rapide fin-vidu la studadon iniciatitan de la Sekretariejo koncerne la juran statuton de la helpoteamoj provizataj en okazo de naturaj katastrofoj pere de UNO, kaj ke li demandu pri tiu temo laŭkonvene la Ŝtatojn, membrojn de UNO aŭ de specialigitaj institucioj".

Bedaŭrinde, ĉi tiu rezolucio alvokas la registarojn fari la utilajn aranĝojn. Ĉi tio konfirmas, ke UNO disponas pri nenia supernacia povo ; findecidas ja la registaroj. Necesas helporganizo, libera de ĉia nacia kuratoreco. Necesas, ke ĝi estu kreaĵo de la Neregistaraj Organizoj, kiuj kontraktus kun UNO.

La 2an kaj 14an de decembro 1971, la Naciŝtatoj postulis, ke la Ĝenerala Sekretario nomumu kunordiganton, sidontan en Ĝenevo, kaj kies misio estos kunordigi ĉion ekzistantan koncerne helpon. Tamen la Naciŝtato ankoraŭ ne estas preterpasita.

La tutmondistoj havas do la devon plu antaŭenmeti la proponojn necesajn por kontraŭbatali la misefikon de la artikolo 2a de la Ĉarto, postulante la kreadon de tutmonda asekuro, efika kontraŭ la naturaj katastrofoj.

Endas, ke la tutmondistoj antaŭenmetu proponojn evit-

ontajn la nuntempan procezon :

- helpokrio ;
- la registaroj pripensas ;
- la helpo malfruas.

Necesas antaŭpretigi tiun agentejon, ekzemple disponigante al ĝi jenajn instancojn :

1. **Decidpovo** sendependa de la Naciŝtatoj : komitato el 12 Prezidantoj de neregistaraj organizoj, renovigeblaj laŭ triono ĉiun sesan monaton.
2. **Rapida plenumado** : 50 pezaj aviadiloj kaj 200 helikopteroj alvenontaj surloken post malpli ol 10 horoj.
3. **Efika stoko** : Kuraciloj kaj nutraĵoj por 10 milionoj da homoj dum unu monato.
4. **Neŭtralaj bazoj** : 4 aŭ 5 bazoj kun eksterteritorieca statuto, kiel la sidejo de UNO en Novjorko, por ke ĉiu loko sur la tero estu malpli ol 5000 kilometrojn for de unu el ĉi tiuj bazoj.
5. **Volontuloj** : 10 000 ĝis 20 000 volontuloj kun speciala statuso, por kvinjara devontiĝo renovigebla, speco de tutmonda civilservo.
6. **Financoj** : Ĉiu Naciŝtato havas la devon ĉiujare pagi ian elcenton el sia kruda nacia enspezo, ekzemple 1/1000.

Tiaj sugestoj devos ebligi la kreadon de Agentejo sendependa de la decidoj de la Naciŝtatoj.

Estas jam kreitaj organizoj, nome Tutmonda Helpokorpuso kaj la Internacia Urga Agado, komisiitaj impulsi tutmondistan direkton al la helpo en la kazo de naturaj katastrofoj.

Ĉi tiu estonta Tutmonda Organizo aplikota sen la opinio de la Naciŝtatoj kaj por la bono de la tuta homaro, kontribuos en la pereiga eluzado de la misfaraj naciaj suverenecoj.

### TUTMONDA FEDERA EKONOMIO

Ni jam vidis, ke la politika organizado de la mondo verŝajne kuŝos sur federaj fundamentoj. Potencdelegado je la senpere supera ŝtupo por ĉiuj funkcioj ne efike plenumeblaj sur iu ŝtupo, ŝajne estas organizfundamento garantianta ĉian demokration.

Estas certe, ke laŭ ekonomia vidpunkto necesas eltrovi similan organizbazon de la planedo.

Same kiel en Francio la mineralaj riĉaĵoj de la grundo malpli kaj malpli apartenas al la posedantoj de la terenoj sed al francoj entute, estas same evidente, ke kiam establiĝos Tutmondaj Institucioj, la riĉaĵoj de la planedo apartenos al ĉiuj planedanoj, ne al kelkaj nacioj favorataj de la hazardo. Estas ankaŭ evidente, ke la tutmonda planado estos necesa por eviti estigon de prestiĝaj industrioj aŭ por malhelpi iajn mondkalajn poluadojn. Kaj kio sur la kampo de energio? Ĉiuj loĝantoj de la planedo nuntempe postulas senliman kreskadon de la energio por kiel eble plej ĝui la konsumsocion, kies "bonfarojn" laŭdas ĉiuj televidaj elsendoj en la mondo. Nu, krei plimulte da energio, tio signifas plimulte polui la vivmedion. Kiamaniere solvi ĉi tiun ekonomian demandon, igantan mondskala? Ĉu malkovri kaj trudi novajn energifontojn? Ĉi tiuj kelkaj problemoj kaj multaj aliaj sin aldonontaj nepre estu solvotaj en la sino de nova tutmonda ekonomio, diference de la konkurado inter la du ekonomisistemoj nun dividantaj la mondon inter si. Ĉu kunfandiĝo de tiuj du ekonomisistemoj antaŭ la progreso de la scienco kaj teknikoj trudos saman organizadon? Ĉu nova federa tutmonda ekonomio? La rapideco de la ŝanĝoj malebligas difinon de la estonta organizado de la mondo.

Ni referencu la 4an broŝuron de la Tutmondista Sumo koncerne la Tutmondan Federismon. Ĝi entenas tri partojn: politika federismo, kultura federismo kaj ekonomia federismo. Kvankam ĉi tiu broŝuro estas kolektiva verko, ĉi-lasto fontas el la plumo de Francis GERARD (Ĵerar); tial ni lasu al li la parolvicon:

La ekonomio de iu regiono, de iu lando, de iu kontinento aŭ de la mondo nepre estu je la servo de la homo. Alidirite, la naturaj riĉofontoj, per laboro, kaj la produktorimedoj, fabrikitaĵ per laboro ekde ĉi tiuj riĉofontoj, nepre estu kunmetitaj tiamaniere, ke estu realigita ĉies plejeblo bonstato, akordigebla kun ĉies sama plejo. Estas la digno de la homa persono, egala por ĉiuj, kiu gvidu en la elekto de la kunmetaĵoj inter la faktoroj de la produktado.

La respekto al la homa personeco postulas, ke la orga-

nismoj aŭ la organizaĵoj, kiujn la homoj donis al si sur diversaj ŝtupoj de sia ekonomia aktiveco, konservu la plej-eblan aŭtonomion kaj memadministradon, akordigeblajn kun la plenumado de la celoj, por kiuj ili estis kreitaj. La organismoj aŭ organizaĵoj nepre disponu pri la realaj povoj, necesaj por plenumi iliajn funkciojn kun la kunlaboro de la homoj koncernataj de iliaj funkcioj.

La difino tiel emfazanta la homojn kaj ties organizaĵojn estas tiu de sociala ekonomio. Socialeco nepre superu ekonomion.

Ekzemple, por garantii la efikecon de la batalo kontraŭ poluado kaj ĝenerala difektiĝo de la homa vivmedio eble necesos bremsi iajn aspektojn de la ekonomia disvolvigo de la industriaj landoj ; tion Gell-Mann, Nobelpremito pri fiziko, nomis "ekologia rezignado".

Tamen la homo estas **UNU** kaj nepartigebla. Ĝi ne estas "homo-oeconomicus" unuflanke, politika estaĵo aŭ membro de sia familio aliflanke, aŭ aldone homo celanta memperfektigon per harmonia disvolvado de siaj kapabloj, ĉu denaskaj, ĉu akiritaj. Ĝi estas ĉio ĉi samtempe. Ĉia ekonomio estas politika ekonomio tiel, ke ĝi situas en la kadro de iaj politikaj strukturoj nepre respondantaj la ĉefan celon de siaj ekonomiaj aktivecoj. Kaj ĉia ekonomio nepre kalkulu kun la aspiro de la homoj al disvolvigo de ties kapabloj laŭmezure kiel ĝi akordiĝas kun sama disvolvado ĉe la ceteraj.

Kaj Francis GERARD plu diras : De la bazo ĝis la supro la homo volas ĝui la povon decidi mem pri sia ekonomia aktiveco kun la aliuloj. Ĝiaj sociaj bezonoj estas tiel realaj kiel la materiaj. Koncerne la ekonomiajn aktivecojn, tio signifas, ke la homo volas partopreni en ili kiel tia : kiel laboristo en sia laborejo, fabriko, entrepreno aŭ ekonomia organizaĵo regiona, internacia. Kiel konsumanto, ĉe elekto de siaj konsumproduktoj ĝi volas partopreni en la strukturoj de la produktado, distribuado, komerco, financado.

Nu, ĉi tiun partoprenon ĝi volas, ne kiel individuo, sed kiel membro de kolektivo.

Kaj li konkludas jene : Aliflanke, la memmastrumado, sur kiu kuŝas la tuta sistemo, estas io lernota, kaj estas certe, ke en granda parto de la mondo kaj sur multaj eko-

nomiaj kampoj, ĉefe kiam temas pri internacia aŭ tutmonda kunlaboro, necesos grava klopodo por popola edukado. La iniciatoj, tiucele alprenotaj de la entreprenkonsilioj, laboristaj sindikatoj, industri- kaj komerc-ĉambroj, de la specialigitaj komitatoj de la ekonomiaj organizoj naciaj, eŭropaj, afrikaj, kaj same UNO, devus esti kunordigitaj sub egido de ĉi-lastaj.

Tio estas grava neceso, cele al realigo de ekonomia sistemo bazota sur federismo, kies estiĝo estas tamen strikte ligita kun kreado de federaj politikaj strukturoj sur ĉiuj ŝtupoj.

Ĉi tiuj kelkaj linioj koncerne Tutmondan Ekonomion pruvas, ke la Tutmondistoj pensis pri ekonomia organizado de la estonta mondo. Tamen la Mondcivitanoj, kiuj havas la rolon vivi la Registrolibron Tutmondan kaj organizi balotelektojn sur planeda skalo, ne povas trudi siajn vidpunktojn pri ekonomia organizado. Nur la delegitoj, elektotaj ĉe la Popolkongreso, kapablos alpreni la trudigontajn decidojn. Tamen la federaj konceptoj povos esti profitdonaj pripensaj temoj por la estontaj delegitoj.

### TUTMONDA MONO

Sep milionoj da senlaboruloj, sep milionoj da soldatoj, sep milionoj da mortintoj! Tia estis la sorto de Germanio post la mona krizo de la 20aj jaroj. Ĉu la mondo kuras al sama katastrofo?

Malordo, konfuzo, maldigitaj monŝanĝoj, timo, malkompreno, nacidefenda reflekso, ŝanĝigema mono, centra mono, duobla mono, drivaj kapitaloj, eŭropdolaroj, ordinara dolaroj, forkuro de oro, produkta malkreskado, konvertebleco, senvalutiĝo, inflacio, deficito de la pagbilanco, mona malstabileco, senlaboreco, neeltenebla situacio, malkreskado de la helpo al la tria mondo, malsato, ĉiu por si, specialaj presadoj, fiksj alparecoj, mono bazita sur oro, sur krudmaterialoj, sur la produktaĵo, Bretton Woods, Deklaro de la 15a de aŭgusto 1971 pri malkroĉiĝo. Jen la terminoj, legeblaj sub la plumo de la fakuloj ekde la mondfama deklaro unuflanka de NIXON (Niksn).

Antaŭ tia diverseco de proponoj kaj opinioj, ĉu reale

ekzistas fakuloj pri la temo? Trankviliĝu la laiko, neniu ŝajne komprenas ion; sed ĉi tiu nescio estas for de trankviligeblo tial, ke tro da psikaj faktoroj rolas, por el tio estiĝi ekzaktan sciencan. Ĉiu tamen eldiras sian propran savan ideon: ĉu nova bazmetodo por mono, ĉu male mono strikte kontrolota de la Ŝtato kiel en orientaj landoj... Sed la reala demando kuŝas en la monfarado, kiu estas fundamenta kampo de la nacia suvereneco.

Naskante malfidon de ĉiu Naciŝtato kontraŭ alia Naciŝtato, ĉi tiu suvereneco malhelpas estigon de konfido necesa por monŝanĝoj dum pacotempo. Ni rimarku, ke dum militotempo oni ne parolas pri mono: timo al malliberejo aŭ ekzekutplotono sufiĉas por bone funkciigi la ŝanĝosistemojn.

Se la civitanoj fidis al sia registaro, mono cirkulas interne de la nacio. Se la Naciŝtatoj fidis unuj la aliajn, la ekonomio bone funkcias. Fido ebligas por iu, elspezanta monon, poste ricevi ĝin reen sub iu formo aŭ alia. Male, se ĝi ne kredas, ke ĝi povos ĝin ricevi, ĝi ne plu cirkuligas ĝin, ĝi atendas... kaj tiam ekestas la katastrof-sinsekvo naskita de tia situacio: ne investoj, malpli da akiroj, malpli da laboro, reduktita oficnombro, senlaboreco, fine milito aŭ revolucio.

Tamen nuntempe la mono ekzistas, la fabrikoj kuŝas en siaj lokoj, la homoj deziras labori kaj akiri, sed la mono, nemalhavebla por akceli la radaĵojn de la ekonomia maŝino, malbone cirkulas pro la reciproka malfido inter la Naciŝtatoj. La ekonomia agado malakceliĝas pro la atendantaj bankoj, aŭ pro la hezitemaj kapitalposedantoj.

La 15an de aŭgusto 1971 Nixon ektimis. Li uzis la metodon "savontan" sian landon, pli ĝuste dirite, la dolaron, kontraŭ la amasaj forkuroj de oro, aŭ ĉefe kontraŭ la manko de fido de la ceteraj landoj al la eksa rezervmono, nome dolaro. Unu sola homo do alprenis decidon mondogravan, konsultinte nenium ajn. La bazoj de la kapitalista mondo forpolviĝas, kaj la komunista mondo verŝajne suferos pri konsekvencoj, tial ke oro kaj dolaro plu estas la ŝanĝoreferencoj.

La kompleta manko de fido de Nixon al ĉiuj Naciŝtatoj, eĉ al tiuj al li amikoj jam de pli ol 25 jaroj, pru-

vas, ke en la nuntempa mondo tutmonda solidareco ne ekzistas, dum ĉiu demando pri homara pluvivado estas tutmonda. La egoismo de la Naciŝtato misfaras kontraŭ la tuta homaro, kaj ankaŭ al la Naciŝtato mem, tial ke, tion ĝi volas aŭ ne, la interdependecoj planedaj estas tiaj, ke ilin ignori estas senkonscie sin mem detruji.

La konfido povos estiĝi nur se la Naciŝtatoj konsentos limigon de sia propra suvereneco nacia por starigi efikan tutplanedan politikon, por interesi ĉiujn popolojn de la mondo en ĉi tiu tutmonda konfido.

Ni do estas enŝovataj en rapidkonkurson. Ĉu la monaj artefaroj de la "fakuloj" sufiĉe longe daŭros, por ebligi al la homoj sin efike organizi mondscale?

La monaj artefaradoj povas esti nur provizoraj, kaj nur tutmonda politika organizado ebligos la konfidon nepre necesan por la monaj interŝanĝoj, kiuj ja iam, kiel eble plej frue, estos faciligataj per kreado de aŭtenta tutmonda mono.

## TUTMONDA INSTITUCIO POR DISVOLVADO

Antaŭ du jarcentoj, ĉe la komenco de la industria erao, troviĝis 700 milionoj da homoj sur la tero. Krom la eteta malplimulto de la gvidantoj, ĉiuj vivis ekvilibre sur la streĉa ŝnuro de la pluvivado.

Da ili nuntempe estas sesoble pli, kaj centoj da milionoj da homoj amplekse profitas el la industria socio. Sed la grandega plimulto kuŝas en mizero. Laŭ miliardoj da homoj ĝi estas kalkulebla.

La teknika progreso do ege pliiĝis la nombron da malfeliĉuloj.

Ĉi tiu limo de mizero ekzistas ne nur inter riĉaj kaj malriĉaj landoj, sed ankaŭ interne de la riĉaj landoj, tial ke la nuntempa industria organizaĵo devige enŝovas 20% el siaj "privilegiuloj" en mizeron; aldirite, ĉiu familio en la evoluintaj landoj ŝargas sian konsciencon per unu "homa forĵetaĵo".

Antaŭ 25 jaroj la tutmondistoj kiel unuaj skribis en sia programo tiun batalon kontraŭ la mizero. De tiam la registaroj enskribis ĝin en la propraj programoj kaj devojigis ĝin for de ĝiaj celoj. Tiel ili havigis al si la eblon logi al



si komercan kaj politikan klientaron, kiun forprenis de ili la malkoloniigado.

Sed post multnombraj klopodoj la rezultatoj estis tre malkontentigaj. La ekflugo, kiel diras la ekspertoj, mal-facile ekas por multaj landoj. En plej favora kazo, la pliigo de la agrokultura produktado apenaŭ kompensis la pliigon de la naskiĝoj ; en multnombraj landoj la viv-nivelo malaltiĝas.

La reala kialo de ĉi tiu situacio estas, ke ne ekzistas Tutmonda Institucio por Disvolvado kun propra ekzisto super la registaroj de la Naciŝtatoj :

- kun propraj financoj per impostoj, subvencioj aŭ pruntoj,
- propraj organoj por enlistigo, studoj, kadroformado, kun-ordigo, lukto kontraŭ malŝparo materia kaj intelekta, kontraŭ detruado, vola aŭ nevola, de la riĉaĵoj,
- propraj decidorganoj kapablaj sin apliki ekster la premoj de la grandaj Naciŝtatoj kaj ekster la prestiĝaj zorgoj de la helpataj landoj.

Nur je tiuj ĉi kondiĉoj povos esti tutmondaj planoj, supernaciaj do efikaj, por disvolvado, tutmondaj planoj disvolvontaj ampleksajn regionojn kaj ne etŝtatojn enfermitajn en la defendo de sia utopia nacia suvereneco absoluta.

Malbonfara estas la duflanka helpo. Ĉi tiu helpo de nacio al nacio, de nacio al regiono, estas nur nova formo de koloniigado, de paternalismo, de submetiĝo de la malfortulo al la fortulo, de ekonomia malsekureco, tial ke la duflanka helpo estas ĉiumomente nuligebla, se la ricevanto ne obeos. Per la duflanka helpo la malfortulo estas flatata, ĝi kredas egale kontrakti kun la fortulo, dum ĝi ja nur almozpetas.

Por protekti sian nacian suverenecon la malfortulo postulas prestiĝajn industriojn, diplomatan korpuson ekster siaj kapabloj, kaj ĉefe armilojn. Ĉi-lastaj sin turnas kontraŭ la propran popolon, se ĉi tiu postulas realan plibonigon de sia sorto.

La duflanka helpo ŝuldigas la malriĉajn landojn, kiuj ne plu povas sin liberigi el siaj trudemaj kuratoroj.

Tutmonda Institucio por Disvolvado povos forigi ĉi tiun situacion ; interalie ĝi montros al la gvidantoj de la malriĉaj landoj, ke ne estas ilia intereso imiti la nacian orga-

nizmanieron de la industria landoj. Ili vjdu la erarojn kaj ne faru la samajn. Ili profitu de la sperto de la ceteraj kaj ne faru la saman sperton, ĉar ili suferus la samajn suferojn.

Ili devus rifuzi la duflankan helpon, rifuzi ĉi tiun humiligon cetere ne efikan, rifuzi ĉi tiun help-almozon. Ili devus montri sian deziron al efika organizado, por partopreni en la ellaborado de la tutmondaj politiko kaj ekonomio kaj ricevi sian ĝustan parton.

Ili devus komenci, kreante ĉi tiun Institucion, kiu iam ne devus limigi sin al la nuraj malriĉaj landoj, sed interesiĝi ankaŭ al la sorto de la 20% da "forlasitoj" el la industriaj socioj.

Tiel la malriĉaj popoloj, kiuj per informado konas sian mizeron, ebligos la harmonian disvolvadon de siaj bezonoj kaj evitos kaj la ribelon de la mizeraj homamasoj, kiun neniam polico kapablos bremsi, kaj la detruon de la vivmedio per kreado de ega kvanto da energio responde al senkonsidera depostulo.

La Tutmonda Institucio por Disvolvado grave helpus la tutmondan loĝantaron navigi inter ĉi tiuj du rifoj.

### **3. LA RIMEDOJ**

La ĉefa celo de la Mondcivitanoj estas la organizado tra la tuta mondo de liberaj kaj demokratecaj balot-elektoj por elekti delegitojn.

1 homo = 1 voĉo

La Asembleo de la elektitaj delegitoj, kaj nur ĝi decida, kia estos la formo de la Tutmondaj Institucioj pere de Tutmonda Konstitucio submetota al ratifo de la Registaroj kaj de la Tutmonda Popolo.

**Tutmondista Sumo,**  
Broŝuro n-ro 1, p. 12.



## TUTMONDA CIVITAN-REGISTRADO

La Internacia Registro de la Mondcivitanoj distribuas ekde la 27a de julio 1949 tutmondan legitimkarton. Ĝi konservas la Tutmondan Civitan-Registron, ĝi iel estas

### LA TUTMONDA MAGISTRATEJO.

Ĝi estas la unua Tutmonda Institucio.

Devontiga formulo por ricevo de la

#### LEGITIMKARTO DE MONDCIVITANO :

"Konscia pri miaj respondecoj kaj decidinte akiri rekonon de miaj rajtoj kiel membro de la tutmonda komunumo, mi petas, konservante mian naciecon, mian enlistigon kiel mondcivitano."

### KONGRESO DE LA POPOLOJ

La tutmondistoj estas tre ambiciaj : ili volas Tutmondan Leĝon, ili volas aplikigi ĉi tiun Tutmondan Leĝon, ili do volas la Tutmondan Povon. Ĉi tiun Tutmondan Povon ili volas pere de popola premado, kiu mem eblos nur, se ĉiu homo estos konvinkita, ke ĝi estas la sola rimedo por atingi, kion ĝi deziras : pacon, stabilecon, justecon.

Ĉi tiu popola premado montriĝos per la voĉdona bulteno, kiu estas esprimilo de propra povo, kiun oni delegas, momente, por aplikigi tion, kion oni deziras.

La tutmonda povo jam estis delegita al tutmondaj deputitoj en 1950 en la ŝtato Tennessee (Usono), kie 3 milionoj da loĝantoj de la Tero elektis tri deputitojn tutmondajn, impulsite de Fyke (Fajk) Farmer. Tamen, se povis esti elektita kvara deputito, neniam eblis elektigi kvinan nek sesan tutmondan deputiton. Do estis elpensita pli limigita metodo fare de Rodrigues Brent, Maurico Cosyn kaj Jacques Savary (Savari), nome, la Kongreso de la Popoloj, ĉe kiu sinsekvaj tavoloj de la tutmonda voĉdonantaro, disvastigita tra la tuta mondo, voĉdone elektas tutmondajn delegitojn sammaniere kiel estas elektitaj la naciaj delegitoj, t.e. la deputitoj.

Ĉi tiu Kongreso de la Popoloj do estos organizo, kiu devus kreski iom post iom kaj daŭre kun la celo fariĝi pli

kaj pli reprezenta de la tutmonda voĉdonantaro.

Do, la 3an de marto 1969, tria datreveno de la diskonigo de la Alvoko de la 13, unua aro de 10 000 Mondcivitanoj en 87 landoj voĉdone elektis la du unuajn delegitojn al la Kongreso de la Popoloj.

Ĉi tiu voĉdono okazis perkoresponde. Ĉiu Mondcivitano ricevis do :

- respondkoverton kun poŝtmarko, tial ke la voĉdono estas senpaga ;
- voĉdonilon kun 8 kandidatnomoj el 7 diferencaj landoj ;
- koverton por enmeti ĉi tiun voĉdonilon ;
- klarigan noticon.

La voĉdonanto devis esti almenaŭ 16-jara, kaj enlistigita en la voĉdona listo.

La elektado estas unufoja laŭ majoritata baloto.

La 7an de junio 1969 okazis propradire la baloto en ĉesto de la publiko, kun kontrolo fare de asignisto, per malfermado de la "respondkovertoj" kaj metado en la urnon de la bluaj kovertoj entenantaj la voĉdonilojn. Tuj poste okazis la voĉnombrado.

Jen ricevis :

Josué de Castro (Brazilio)	3848 voĉojn (elektita)
Jeanne Haslé (Francio)	1842 voĉojn (elektita)
Renée Marchand (Francio)	1825 voĉojn (anstataŭ.)
Enrico Dacco (Italio)	952 voĉojn (anstataŭ.)
Rodrigues Brent (Nederlando)	910 voĉojn
Douglas Mattern (Usono)	716 voĉojn
Hugh Schonfield (Britio)	707 voĉojn
Onkor Natt (Hindio)	550 voĉojn

Preskaŭ 60 % respondis, bonega procento ĉe perkoresponda voĉdono, kaj oni jam povas diri, ke la tutmonda civitismo de iu mond-civitano superas la nacian civitismen de nacia civitano.

Ĉi tiu balotado estis do la unua transnacia balotado en la Historio de la Homaro, kaj ĝi evidentigu, ke la eksmoda leĝo de la Naciŝtato forpasis, ke nova leĝo diktota de la scienco ektrudas sin al la homoj.

Sed ĉi tiu unua balotado estus disfalinta en forgeson, se ĝi ne estus sekvita de la dua, la tria kaj tiel plu.

La duan balotadon do lanĉis Granda publika Mitingo en Parizo, la 19an de novembro 1971 kun partopreno de tri

subskribintoj de la Alvoko de la 13, nome S-ino Nehru, Abato Pierre (Pjer) kaj Alfredo Kastler.

Ĉi tiu dua elekto okazis kun du gravaj modifoj kompare kun la unua. Ĝi partoprenigis ne nur mondĉivitanojn, sed ankaŭ membrojn de movadoj kaj loĝantojn de geografiaj komunumoj... Por ĉi tiuj du novaj partoprenoj la Komitato por la Kongreso de la Popoloj planis du regularojn, por certigi ian reprezentecon en la voĉdonado, samtempe savante la personecon de la movado aŭ komunumo. Sed la voĉdonoj ĉiam estas individuaj, sekretaj, senpagaj kaj kontrolataj de asignisto. Ĉiu voĉdonanto estas antaŭinformita pri la projekto de la Kongreso de la Popoloj.

Por la movadoj kompleta procezo estis starigita por garantiu respekton de ties sliparoj. Nome, ĉiu movado destinas unu el siaj respondeculoj, prefere en Parizo. Tiu respondeculo partoprenas en ĉiuj preparaj kunvenoj. Ĝi starigas kaj konservas la voĉdonan liston. Poste la Komitato donas al ĝi la afrankitajn kovertojn, voĉdonilojn kaj klarigajn noticojn. La respondeculo de la movado skribas la adresojn sur la kovertoj, poste portas, kun iu Komitatano, la kovertojn al la poŝtejo. Poste la respondkovertoj entenantaj la voĉdonilojn trafas la adreson de la respondeculo, kiu mem kunportas ilin en la tago de la voĉnombrado por kontrolmarki la voĉdonantojn kaj meti la bultenojn en la urnon. Ĉe malfermo de la urnoj ĉiuj voĉdoniloj estos kunmiksataj antaŭ la voĉnombrado. La partopreno de iu movado validos nur se la respondeculo ricevis minimume 30 % da respondkovertoj. Estis decidite aliflanke, ke ĉi ĉiu balotado iu movado ne povas ricevi pli ol 20% de la tuto de la enlistigitoj kaj ke ĝi rajtas prezenti kandidaton, se ĝi posedas pli ol 10 % de la voĉdonantaro.

Koncerne la komunumojn, la Komitato decidis, ke la voĉdonado validos kun partopreno de minimume 15 % el la loĝantaro. Ĉi tiu procento unuavide povas ŝajni malgrava, tamen ĝi proksimas je tiu ordinare konstatita ĉe balotadoj aranĝitaj de la establitaj aŭtoritatoj, eĉ en industriaj landoj. En la plimulto de la demokrataj landoj la voĉdonantaro konsistas el 50 % de la loĝantaro ; en Svisio nur 25 %, tial ke la virinoj ne voĉdonas ; krome, la partopreno foje atingas nur 30 %, kiel okazas ofte en Usono, t.e. 30 % de la loĝantaro. Fine, en iuj

landoj de Sud-Ameriko la aŭtoritatoj estas elektitaj per malpli ol 6 %.

Ĉi tiu dua balotado okazis do kune kun movadoj, kies aktivadoj inkludas tutmondistajn tezojn, ekzemple, Universala Movado por Tutmonda Federo, Internacia Civilservo, Internacia Movado por Repacigo kaj Internacio por Militrezistado (francia branĉo : Pacista Unuiĝo de Francio). Partoprenis ankaŭ kolektivoj kun tutmondigitaj komunumoj Vallon-Pont d'Arc (Ardeŝo, Francio), Orval (Cher, Francio) kaj Chassepierre (Belgio). La voĉnombrado okazis la 18an de marto 1972 kun jena rezulto :

S-ino Rajan Nehru (Hindio)	2071 voĉoj (elektita)
Jacques Muhlethaler (Svisio)	1996 voĉoj (elektita)
Pierre Martin (Senegaliao)	1845 voĉoj (anstataŭ.)
Etienne Reclus (Francio)	1666 voĉoj (anstataŭ.)
Henri Cainaud (Francio)	1122 voĉoj
John Roberts (Kanado)	835 voĉoj
Georges Grudzielski (Belgio)	606 voĉoj
Vladimiro Ballarin (Italio)	435 voĉoj

De la 26a de septembro ĝis la 13a de decembro 1973 okazis la 3a balotado kun Lernejo-Pacilo kiel nova movado kaj la loĝantaro de tutmondigitaj komunumoj Montsur-Marchienne (Belgio) kaj Anduze (Gard, Francio). Ĉi tiuj komunumoj ne povis esti konsiderataj kiel partoprenantaj en la balotado pro tro malgranda nombro da voĉdonantoj.

Marko Garcet (Belgio)	706 voĉoj (elektita)
Gaymard-Rollet (Francio)	702 voĉoj (elektita)
Alfredo Hassler (Usono)	662 voĉoj (anstataŭ.)
Mikaelo Cepède (Francio)	639 voĉoj (anstataŭ.)
Mamadou N'Diaj (Senegaliao)	470 voĉoj
Rolando Leibundgut (Svisio)	375 voĉoj
Lucia Webster (Britio)	219 voĉoj
Alfredo Williams (Usono)	210 voĉoj

En 1974 bedaŭrinde okazis modifoj : post la morto de Josué de Castro, Renée Marchand iĝis Elektita Deleĝitino kaj post elfociĝo de Jeanne Haslé, Enrico Dacco iĝis Elektita Deleĝito. Renée Marchand kaj Enrico Dacco estis unuavicaĵaj anstataŭontoj.

La kvara balotado estis voĉnombrita en 1975 en San



Francisko dum la kongreso de la Tutmondista Asembleo, poste en Parizo en la salonego Mutualo.

Lucila Green (Usono)	1177 voĉoj (elektita)
Maks Habicht (Svisio)	1148 voĉoj (elektita)
Hanna Newcombe (Kanado)	1062 voĉoj (anstataŭ.)
Devi Prasad (Hindio)	779 (anstataŭ.)
Filipo Isely (Usono)	479
Finn Laursen (Danio)	440
Atam Agarwal (Hindio)	348
Iŝi Morita (Japanio)	327

Fine la kvina balotado estis lanĉita por la Pariza Kongreso 1977. Post ĉi-lastata balotado la Komitato, por la Kongreso de la Popoloj ĉesis ekzisti tial, ke la Kongreso de la Popoloj akiris propran ekzistadon.

Pluraj tutmondigitaj komunumoj en departemento Lot (Francio) same kiel la unua tutmondigita komunumo Ajabe en Japanio partoprenis en ĉi tiu balotado kaj ankaŭ novaj movadoj.

Eizo Ito (Japanio)	2329 voĉoj (elektita)
Makoto Nagaoka (Japanio)	2269 voĉoj (elektita)
Paul de la Pradelle (Francio)	1219 voĉoj (anstataŭ.)
Ivan Supek (Jugoslavio)	1197 voĉoj (anstataŭ.)
Reinhart Ruge (Meksikio)	1025 voĉoj
Jos Lemmers (Nederlando)	656 voĉoj
Robert Gromet (Usono)	397 voĉoj
Ŝankar Devi (Hindio)	326 voĉoj

kaj antaŭ 1500 personoj en kunveno publika en Parizo la 5an de julio 1977 la Elektitaj Delegitoj al la Kongreso de la Popoloj jene alvokis :

"La Alvoko de la 13 mondfamaj Mondcivitanoj, diskonigita la 3an de marto 1966, atingis konsenton. Voĉdonantaro pli ol 50000-persona, disvastigita en centoj da landoj, konsistanta el tutmondistoj kaj membroj de homaranaj movadoj aŭ geografiaj komunumoj, elektis nin senpere kaj demokratece ĉe kvin transaciaj balotelektoj, la unuaj en la historio de la homaro.

"La Kongreso de la Popoloj antaŭbildigas reprezentan Tutmondan Asembleon, kapablan starigi Tutmondajn Instituciojn.

"Ĝi estas tribuno, lokita super la naciaj interesoj por aŭd-

igi la voĉojn de tiuj esprimantaj la depostulojn de la Popolo de l'Mondo, por ke pludaŭru la homa aventuro, en respekto al la Naturo, cele al ekflorado de ĉiu individuo.

**"La Kongreso de la Popoloj en sia unua stato estas nun realaĵo!"**

"Ekde nun la registaroj devos kalkuli kun ĉi tiu reprezentado de la tutmonda volo, kiu komencas sin esprimi klare.

**"Kiel elektitaj delegitoj en la Kongreso de la Popoloj, Ni postulas de ĉiuj, kiuj, kiel ni, denuncas la opresojn ekonomiajn, politikajn, religiajn, raciajn aŭ naciajn, ke ili provizu nin per sia agema subteno ;**

**Ni postulas de la respondeculoj de la diskonigiloj kaj de la edukistoj, kiuj ekkonsciis pri la urĝeco de la problemoj koncernantaj la pluvivadon de la homaro, sian plej ampleksan helpon ;**

**Ni postulas de ĉiu membro de la tutmonda komunumo, ke ĝi laboru por kunigi plejeble frue Konstituan Asembleon de la Popoloj ;**

**Ni postulas de la gvidantoj de la Naciŝtatoj, ke ili konsentu pri parta transdono de la suvereneco de siaj popoloj profite al Tutmondaj Institucioj, tute aparte sur jenaj kampoj : daŭrigo de la paco, batalo kontraŭ malsato, protektado de la vivmedio, respekto al la Homaj Rajtoj, demografia ekvilibro, ekonomia kaj mona organizado de la Planedo, ĉar**

**"Pro manko de tia suverenec-transdono, ili respondecus pri la venontaj katastrofoj."**

Subskribis : Enrico Dacco, Marko Garcet, Andrée Gaymard-Rollet, Lucila Green, Maks Habicht, Eizo Itoo, Renée Marchand, Jacques Muhlethaler, Makoto Nagaoaka, Rajan Nehru.

\*\*\*\*\*

La absoluta suvereneco de la Naciŝtatoj, **JEN LA MALAMIKO** ĉar

**"La internacia juro, tio estas la kanonpafoj."**

Franca ministro **CONSTANS (Konstans)**  
(1905)

## ALIĜO DE LA UNUIGINTAJ NACIOJ

De 25 jaroj la tutmondistoj kontraŭbatalas la artikolon 3an de la ĉapitro II-a de la Ĉarto, kiu eldiras :

"La membroj estas la Ŝtatoj"

kaj la artikolon 2an, 7a paragrafo, de la ĉapitro II-a :

"Neniu dispozicio de ĉi-ena Ĉarto rajtigas la Unuiĝintajn Naciojn interveni en aferoj esence dependaj de la nacia kompetento de iu Ŝtato, nek devigas la Membrojn, submeti tiajn aferojn al ordiga procedo laŭ la terminoj de ĉi-ena Ĉarto"

kaj fine la paragrafon 1-an, kiu mencias, ke la Organizado baziĝas sur la principo de egaleco suverena de ĉiuj siaj Membroj.

De 25 jaroj la tutmondistoj do kontraŭbatalas ĉi tiun absolutan suverenecon de la Naciŝtatoj.

Nu, post 25-jaraj klopodoj la tutmondistoj sukcesis konvinki eĉ la deĵorantan Ĝeneralan Sekretarion U THANT, ĉar ĉi-lasto, en Kongreso de la Universala Movado por Tutmonda Federo en Ottawa, la 23an de aŭgusto 1970, eldiris :

"Necesas modifi la konceptojn preterpasitajn kaj neaplikeblajn pri senlima nacia suvereneco."

Poste la tutmondistoj aranĝis grandan publikan kunvenon en Parizo, kien U THANT sendis unu el siaj plej proksimaj kunlaborantoj, nome S-ro Jean d'Arcy (d'Arsi).

De ĉiam la tutmondistoj, kiel nun U THANT, postulis aliĝon de la Unuiĝintaj Nacioj.

Jam en 1953 ĉe Kongreso de la Universala Movado por Tutmonda Federo en Kopenhago estis starigitaj la bazoj de la plibonigo de la Ĉarto de UNO. Poste du usonaj juristoj, nome Clark (Klark) kaj Sohn (Son), ellaboris kompletan libron pri tiu plibonigo, rekonsiderante ĉiujn artikolojn, kaj al ĉiu proponis la necesajn modifojn.

Poste la 5a Broŝuro de la Tutmondista Sumo reekzamenas ĉi tiun studon, verkite de Francis GERARD.

- aŭtenta plenuma povo devas respondi antaŭ la legodona povo. Ĉi-lasto do ne konsistu nur el la gvidantoj de la registaroj de la Ŝtatoj-Membroj, sed entenu alme-

- naŭ unu ĉambron elektitan de la popoloj ;
- la naciajn armeojn anstataŭ organizaĵo kia la "blua kaskaro" por aplikigi la decidojn de la povo plenuma kaj jura ;
  - estu fondita korpuso de revizoroj por informi pri la realeco de la ĝenerala malarmado ;
  - disponi pri propraj financaj fontoj sendependaj de la bonvolo de la Naciŝtatoj, por ebligi la ekonomian kaj socian disvolvado de la Tria Mondo ;
  - iu decidpovo de UNO ebligus pli efikan lukton kontraŭ la nocaĵoj kaj disvolvigus senlandliman instruadon.

Kaj iun tagon "rebonigitan UNO-n trudanŝtataŭ elektita asembleo, eldevenaĵo de la volo al paco de la popoloj kaj kapabla trudi ĉi tiun volon al ĉiuj registaroj."

La plibonigo de UNO per limigo de la nacia suvereneco povas okazi en la konstitucia kadro de iuj landoj, kiaj Japanio, Belgio aŭ Francio. Cetere, en la antaŭparolo de la Konstitucio de ĉi-lastata lando estas menciite : "Kun rezervo pri reciprokeco, Francio konsentas pri la limigoj de suvereneco necesaj por organizado kaj defendo de la paco."

Ĉi tiu peco estis reprenita de la Konstitucio de 1946 laŭ postulo de René CASSIN (Kasen), Nobelpremiito pri Paco.

Ĉiu franco havas do la devon agi ĉe sia deputito por postuli aplikadon de ĉi tiu antaŭparolo.

Ĉiu franco, same kiel ĉiu homo, sentas sin koncernata, ĉar nur je ĉi tiu prezo kuŝas ĉies pluvivado.

#### Tutmondistaj datoj fronte al UNO :

1953 : Kopenhaga projekto pri plibonigo de la Ĉarto.

1955 : Projekto Neptuno.

1956 : Projekto Eteruno.

1971 : Projekto pri Tutmonda Instituto por helpo.

## NEPTUNO, ETERUNO, TERUNO

La funkcio naskas la organon ; iamaniere ĉi tiun principon la tutmondistoj ŝajne aplikas, parolante pri funkciismo.

Sufiĉas krei pli kaj pli da teknikaj organoj, disvastigontaj de landoj al alia, kun pli kaj pli da kompetenteco. Tiamaniere tiuj teknikaj organoj por funkcii formangestas la naciajn suverenecojn.

Universalan Poŝtan Unuiĝon oni povas konsideri kiel la unuan teknikan organizon inter la Naciŝtatoj. La multnombraj specialigitaj agentejoj de UNO ankaŭ ludas tiun ĉi rolon. Sur precizaj punktoj ili devigas la Naciŝtatojn kune labori kaj ekkonscii pri la praktikaj neeblaĵoj. Ili devigas alpreni la necesajn dispoziciojn por ilin ĉirkaŭiri, preterpasi aŭ foriri.

La tutmondistoj mem proponis tiajn funkciajn organizojn, tial ke ĉio kunhelpas al preterpasado de la nocio pri nacia suvereneco, nome la progreso, la komercaj interŝanĝoj, la neebleco por ia ajn Naciŝtato ignori la ceterajn, ties neebleco eĉ plu ekzisti, ne povante ricevi tion, kio al ĝi mankas, fine ties evidenta nekapableco respektigi la proprajn limojn de radiodissendoj aŭ satelitoj.

Sed la "Princoj", kiuj regas la Naciŝtatojn, kiel ajn ili ricevis sian povon, per demokrateca rimedo aŭ per perforto, sin kroĉas malespere al ĉi tiu principo pri suvereneco, kiun ili sentas ilin forlasanta. Mastrante ĉiujn propagandrimedojn, ili povas facile teni siajn popolojn en nesacio pri tio, kion nepre bezonus la ekonomia kaj politika stabileco.

Kiel povus la tutmondistoj ekrompi la naciajn limojn, paradokse pli kaj pli protektatajn? Eble irante en la sama direkto kiel tiuj "Princoj", ebligante al ili akiri pli kaj pli da potenco, ebligante al ili solvi tiujn problemojn, kiujn la principo mem pri nacia suvereneco malebligas solvi, sen brutale ekbati la suverenecon de la najbaro. La tutmondistoj povas ilin gvidi al akiro de kroma povo, ĉi-foje supernacia, nome, de kolektiva povo mondskala sur terenoj, kie ili ankoraŭ ne plenumas ĝin. Tiel, ne fronte ekbatante

iliajn eksmodajn antaŭjuĝojn, oni devigus ilin mondscale agi kaj konsekvence pensigi, poste agigi siajn popolojn en la sama direkto.

Kiuj do estas tiuj terenoj?

Unue, tiu pri la maroj, nome la projekto "Neptuno" (vorto konsistigita per nomo de la mara diaĵo kaj la siglo de UNO) prezentita en 1955.

Poste tiu pri la aero kaj kosmo, nome projekto "Eteruno", prezentita en 1956 al OACI, specialigita organizaĵo de UNO.

Kaj tiu pri la senhoma tero kaj neekspluatata subgrundo, nome la projekto "Teruno" prezentita en 1960.

Patrick Armstrong, aŭtoro de la projekto Neptuno, konstatas, ke UNO posedas nek la povon nek la kompetentecon de registaro. Komisionte al ĝi la marojn, pri kiuj neniu Naciŝtato ĝis nun postulas proprajn rajtojn, oni aliformigos UNO-on en aŭtentan, internacian aŭtoritaton, disponontan pri ŝiparo por police gardi sian "maritorion" kaj pri trezorejo provizota per la ekspluatado pera aŭ rekta de la riĉaĵoj de la oceano. Ĉi tiu aŭtoritato, funkcionte sub la kritikaj rigardo de la nacioj, eventuale estus vokata aliĝi en federan reganton de la mondo.

Oni povus imagi, ke ĉi tiu projekto, apogita de 107 britaj parlamentanoj en 1955, estus ebliginta al la Ĝeneva Konferenco pri maro en 1958 alpreni kelkajn tutmondecajn decidojn. Tute ne estis tiel, kaj escepte de P-ro Paul de la Pradelle (Pradel), reprezentinta la Naciŝtaton Monako, ĉiuj oratoroj klopodis disvastigi siajn naciajn suverenecojn al kontinentaj ebenaĵoj kaj teritoriaj akvoj.

En aŭgusto 1956 la malta delegitaro ĉe UNO proponis starigi agentejon por organizi la ekspluatadon de la fundo de la oceanoj.

Elizabeto Mann Borghese (Borgez) efike reekbatalas. Sed tiam denove ĉiu Naciŝtato koliziis kun la nacia suvereneco de sia najbaro, kaj neniu supernacia decido ĝis nun povis esti alprenita. Tute male, ekde 1976 la Naciŝtatoj plivastigas la limojn de la teritoriaj akvoj ĝis 200 mejloj.

En la ĉielo la suvereneco de la Naciŝtatoj estis perfortita milojn da fojoj, tial ke la Konvencio de Cikago (7 dec.

1944) konfirmis la romian juron pri la ĉielo, substrekante, ke "ĉiu potenco posedas kompletan kaj ekskluzivan suverenecon sur la atmosfera spaco super sia teritorio."

La progreso ofte neniigas la validajn, eksmodajn leĝojn, kaj neniu juristo aŭdacis alfronti la ridindaĵon kontraŭmeti la sanktan principon pri nacia suvereneco ĉe ĉiu paso de satelito.

Neniu juristo kapablis difini limon por ĉi tiu suvereneco, ĉar ĉio estis ja proponita : de la alto de Eĵfelturo ĝis tiu, kie la teran altiron anstataŭas la suna.

La lasta parolo restas do ĉe la politikistoj, en nuna cirkonstanco ĉe la tutmondistoj. Tial, helpe de Majstro Le Goff kaj P-ro de la Pradelle, la aŭtoro redaktis la projekton Eteruno (laŭ Etero = kosmo, kaj UNO), prezentitan de S-ro Perrier (Perje), Prezidanto de SABENA en kunveno de OACI (UN-organismo) en Karakaso, junio 1956. Ĉi tiu projekto postulis modifon de la artikolo 1-a de la Konvencio de Ĉikago jene tekstanta :

"La kontraktantaj Ŝtatoj agnoskas, ke ĉiu Ŝtato posedas kompletan kaj ekskluzivan suverenecon sur la atmosfera spaco super sia teritorio."

kiu iĝu :

"La kontraktantaj Ŝtatoj agnoskas, ke ĉiu Ŝtato posedas kompletan kaj ekskluzivan suverenecon sur la atmosfera spaco super sia teritorio en zono atinganta 10 km-ojn en alteco. Trans ĉi tiu limo la kompleta kaj ekskluziva suvereneco de la atmosfero kaj spaco apartenas al OACI."

La 10-kilometra limo ebligas, inkludante ĉiujn montar-ojn, havigi al ĉiu Naciŝtato ian suverenecon vere esencan kaj facile kontroleblan. Aliflanke, ebligus la kontrolado de ĉiuj translokadoj de la militiloj : militaviadiloj, raketoj, eĉ nukleaj eksplodiloj, kies fungaĵoj atingas ĉi tiun altecon.

Ĉi tiu projekto ankoraŭ estas brulvarme aktuala, ĉar la konfuzo de la juristoj restas kompleta, malgraŭ sennombraj kolokvoj kaj proponoj. Ĉi-lastaj ne ebligis al la fakuloj transsalti al plilarĝigo de sia propra principo pri nacia suvereneco. Ĉiu klopodas reutiligi por si la projekton lanĉitan jam en marto 1958 fare de Sovetio, postulanta kreadon de organismo en la sino de UNO por internacia

kunlaborado sur la kosma tereno. Sed, kiel kutime, temas pri apudmeto de la Naciŝtatoj, ne pri ties kunfandiĝo en muldilon novan kaj komunan al ĉiuj homoj, kiel proponas la projekto Eteruno.

Alvenante sur la lunon, Neil Armstrong eldiris: "Granda eksalto estas farita de la homaro", sed tuj li faris geston, kiu ŝovis la homaron duarangen, post la Naciŝtato, nome svingis la flagon de Usono kaj rigidigis soldate. Sciante, ke la Kongreso de Usono malpermesis ke la flago de UNO estu metita sur la Lunon, oni restas skeptika rilate la intencon pri agado favora al la tuta homaro. Temas pri triumfo de la Naciŝtato Usono, pli ol de la homaro. La rusoj tre bone sentis tion, sendinte Luna-on 15-an kun celoj ne precizigitaj, escepte de necesa ĉeesto de alia Naciŝtato.

Se la Ĝenerala Asembleo de UNO en 1966 asertis, ke la eksteratmosfera spaco kaj la ĉielaj objektoj neniel povas esti nacie alproprigitaj nek armilprovizitaj, ĉiuj scias, ke pro manko de aŭtoritato kaj de kontrolo efika do supernacia, ĉi tiu rezolucio povas esti nur platona.

Ĉu multnombraj militaj satelitoj ne rondiras ĉirkaŭ la Tero? La konkero de la luno kaj spaco ankoraŭ ne fariĝis tuthomara ekkonscio, disvastiĝinta planedskale.

Estas certe, ke scienculoj kiaj Von Braun, kiuj ĉiam estis je la servo de la Naciŝtatoj, devus esti je la servo de iu specialigita organismo de UNO por esti je la reala servo de la tuta homaro. Sed la artikoloj 2a kaj 3a de la Ĉarto de UNO malebligas tian tuthomaran kunlaboradon kaj la konkeroj, teraj aŭ spacaj, ankoraŭ longtempe plenumigos "saltegojn" al la Naciŝtato antaŭ ol al la homaro.

Kaj sur la Tero vastegaj teritorioj estas senhomaj kaj neekspluatataj kiel Antarktio, kiel iuj insuloj kaj iuj dezertoj. Ĉi tiuj teritorioj devus fariĝi proprajoj de iu organismo de UNO, kiu devus plenumi ilian ekspluatadon por la bono de ĉiuj loĝantoj de la planedo. Post la geofizikaj jaroj 1958 kaj 1959 ja okazis promesplena interkonsento pri Antarktio inter certa nombro de grandaj potencoj. Tamen tiam ni estis spektantoj de ne nur la forpuŝado de la plejparto de la Nacioj de la mondo, sed ankaŭ de la apudmeto de kelkaj Naciŝtatoj, kiuj konsentas kunlabori por



komuna celo : ĉiu en ĉi tiu interkonsento havis la kaŝitan penson malhelpi sian najbaron akiri tro da influo.

Kaj ĉu Teruno ne povus poste evolui, plenumonte la planadon de la ekspluatado de ĉiuj urĝe necesaj riĉaĵoj mineralaj kaj energiaj, ankoraŭ ne malkovritaj? Kaj laŭmezure kiel ampleksiĝus ĉi tiu specialigita organismo, kial ne povus ĝi ampleksi ĉiujn riĉaĵojn necesajn por la pluvivo de la homa specio? Fakte, Naciŝtato opinias tute normale, preni de terposedanto la proprajn de ties subgrundo ; ĉu do ne eblus, alpaŝi duan stadijon rilate ĉion, kio konsistigas la vivnecesajn riĉaĵojn de la homaro?

Teruno do ebligus al la gvidantoj de la Naciŝtatoj "tutmonde" pensi, partoprenante komencon de administrado de "mondaj bienoj" kaj tiel ili ekkonscius, ke la bono de la popoloj, kiujn ili estas komisiitaj protekti, estus des pli bone gardata, se malaperus tiu eksmoda suvereneco laŭdire "nacia".

## ELUZADO DE LA NACIA SUVERENECO

"La evoluo de la regulo de juro ĉiam sin esprimis per senigo de la privilegioj de la fortuloj kun la celo pliiĝi la liberon kaj sekurecon de la ceteraj" asertas E. Georgiadès (Ĵorĵjades), Ĝenerala Sekretario de la Franca Societo pri Juro Aera kaj Spaca.

Kiuj estas la fortuloj nuntempe : la Naciŝtatoj!

Necesas do senigi ilin je la privilegio nacia suvereneco por firmigi la sekurecon de la homa estaĵo.

Ni ne timu la vortojn. La nacia suvereneco, la nacia sendependeco plu estas nur trompaĵoj. Ili ne plu havas praktikan signifon.

Eĉ la plej forta nacio en la homara historio, nome Usono, ne kapablas malhelpi profanadon de siaj limoj per ĉina satelito.

La nacia suvereneco de Nederlando ne kapablis malhelpi la malpurigadon de la bordoj de Rejno, poluata en Germanio.

La "nigra tajdo" de Torrey Canyon (Tore Kanjon) ridindigis la nacian suverenecon de Francio.

Celante respekti ĉi tiun nacian suverenecon, oni eĉ eksciis, en la tempo de la eksperimentoj en Mururoa, ke la

radioaktivaj fiŝoj ne preterpasus la teritoriajn akvojn, tiel ne ekzistus risko malpurigi la oceanon!

Tiel oni uzas argumentojn tragikokomikajn aŭ malmalmodernajn, por defendi eksmodajn konceptojn.

Dum la historia daŭro ĉi tiu nemalhavebla limigo de suvereneco estis sensukcese tuŝita. Ni menciuj nur kelkajn okazojn.

Analizante la fiaskon de Societo de Nacioj, P-ro Edmond Privat akuzis la nacian suverenecon en sia libro **"Tri federaj spertoj"**.

Antaŭ ol redakti la Ĉarton de UNO, la konsilantoj postulis ĉi tiun limigon, se oni almenaŭ deziris efikan organizmon. Sed ĝi tuj estis kontraŭata de la delegitoj de la registaroj, kiuj unuvoĉe aldonis la artikolon 2-an, deklarantan, ke "la organizo estas bazita sur la absoluta suvereneco de ĉiu membro-ŝtato".

De antaŭ 25 jaroj la tutmondistoj en la tuta mondo kampanjas kontraŭ ĉi tiuj kelkaj vortoj.

Ekzemple, en majo 1970, la Kongreso de la Asocio por Disvastigo de la Monda Juro, kies Honor-Prezidanto estis René CASSIN (Kasen), Nobelpremiito pri Paco, en Royan, atakis la ĉefan malutilon, nome la nacian suverenecon; kaj en la rezolucio de la kongreso ni legas ĉi tiun pecon pri eluzado de la nacia suvereneco, verkitan kaj aprobitan de delegitoj de la franca registaro, unua paŝo al fakta agnosko de la tutmondistaj tezoj fare de oficialaj aŭtoritatoj.

- la problemo en sia tuto havas nekontesteblan politikan aspekton, tial ke ĝi subkomprenigas en la sino de la publika regantaro egalan zorgon unuavice elsavi la publikan sanon kaj havigi la respondajn rimedojn;

- ĉar certa nombro da poluadoj ne povas esti forigitaj en la nura nacia kadro, estas nepre necese, ke la demandoj estu pritraktataj supernaciskale;

- la metodo, uzata i.a. de la Organizo de Civila Aviadilaro Internacia (OACI) surbaze de Ĝenerala Konvencio konsistanta el kreado de daŭra organizaĵo, kies decidoj sin trudas al ĉiuj Ŝtatoj, estus kun profito ampleksigota al aliaj problemoj pri nocumoj, kiel tiuj pri akvo, aero kaj vivmedio;

- ĉi tiu metodo harmonias kun la franca Konstitucio, kiu konsentas pri limigo de la suvereneco per interkonsentoj ;

- ĝi deziras, ke la Franca Registaro alprenu iniciatojn sur la tereno de la poluadoj, proponante ekzemple :

- 1) la kreadon de organismoj laŭ la modelo de OACI,
- 2) konkretajn rimedojn por plibonigi la funkciadon de la ekzistantaj **tutmondaj organismoj**, tiel ke unuanimeco ne plu estu necesa por adopti kaj aplikigi la decidojn.

## REGIONA FEDERISMO

Laŭ multnombraj tutmondistoj regiona federo estu nepra stadio al la tutmonda. Laŭ aliaj la tutmonda federo realiĝu senpere. Tiel, sin apartigis la du tendencoj en la kongreso de Montreux (Montre) en 1947. Iuj zorgis ekskluzive pri eŭropa federo, aliaj pri tutmonda ; iuj tutmondistoj tamen plu aktivis sine de ambaŭ organizoj. Eŭropa federo, Latin-Amerika federo, Nigrafrika federo, Magreba federo, Sudorientazia federo laŭ modelo de la federroj svisa, usona, meksikia, soveta aŭ hinda, ĉu ĉi tio ne kondukus al kreado de plia Supernaciŝtato? Supernaciŝtato, kia jam nun ekzistas tri, kun la samaj malperfektaĵoj kaj samaj malsekuroj por la loĝantoj ; krom se la estontaj federroj, por ne disfali en la difektojn de la nuntempaj Naciŝtatoj, estus tuj amplekse malfermotaj al tutmonda federiĝo.

Sed ĉu ĉi tiu pensmaniero estas tiu de ĉiuj regionfederistoj? Ĉu multaj el ili ne deziras krei potencon blokon, kapablan ekonomie kaj milite konkuri kontraŭ aliaj blokoj? Tio do ne estas la dezirata solvo por paco kaj sekureco. Riskas ekiĝi situacio eĉ pli malbonfara ol la nuna, ĉar tiel kreita nova bloko volus meti sian prestiĝon de nova Naciŝtato en la pruvado, ke ĝi estas pli potenca ol sia najbaro, kaj nature en konsekvenca armado kun ĉiuj riskoj de uzado, eĉ akcidenta, de siaj armiloj. Tiukaze la regiona federo estus kreinta nur malstabilecon eĉ pli gravan kaj pli danĝeran, kaj kiom da jarcentoj necesos por senbalastigi sin de regiona patriotismo kaj progresi al tutmonda? Tamen, la grava avantaĝo de aktivado celanta regionan federon kuŝas en tio, ke la loĝantoj de Naciŝtato estas

devigataj pensi trans la naciaj limoj. Sed tuj ĉe ekiĝo de supernacia pensado necesas ne haltigi ĝin ĉe novaj limoj, sed plu direkti ĝin al entuta pensmaniero.

Ĉu Usono ne estas jam tiu Federita Eŭropo, pri kiu oni parolas? Ĉu Usono ne estigis el loĝantoj venintaj el la tuta Eŭropo, kaj kio rezultis el ĉi tiu Federa Eŭropo? Supernaciŝtato kun ĉiuj malperfektaĵoj de la Naciŝtato nur pligravigitaj.

Kiuj do estas la plej utopiaj : ĉu la tutmondaj federistoj aŭ la eŭropaj?

Samaj estas la problemoj por malfermo de la popoloj al supernacieco, do : jes, al regiona federismo, se ĝi estas mallongdaŭra kaj senhalta stadio al tutmonda federo; ne, se ĝi kreas novan Naciŝtaton.

### TUTMONDISTAJ PARLAMENTANAJ GRUPOJ

Kvankam en ĉiu lando la parlamentanoj estas balot-elektitaj por defendi interesojn lokajn, eĉ naciajn, iuj el ili en la daŭro de siaj mandatoj ekkonscias, ke por garantii la sekurecon de sia propra lando oni devus nepre pritrakti iajn problemojn mondscale kaj ke iliaj povoj estas tro limigitaj.

Tiel, sine de iuj naciaj parlamentoj, deputitoj estigas grupojn decidintajn postuli limigon de la nacia suvereneco de sia propra lando por helpi al kreado de pluvivigaj supernaciaj institucioj.

La plej aktiva parlamentana grupo estas en Britio tiu vivigata de Patrick Armstrong, kiu arigis pli ol 200 membrojn el la du ĉambroj.

Iliaj aktivadoj foje havis influon, ekzemple, siatempe diskonigi la problemon pri subevoluo, aŭ la neceson sendi blukaskulojn en Egiptio. Ankaŭ projektoj kia Neptuno aŭ Tutmonda Korpuso por Paco kuŝas en ilia kredito. Kaj responde al ĉi tiu demando : Kion opinias la Orientaj landoj pri tiu iniciato? La parlamentanaj grupanoj ofte kontaktis la Orientlandojn por ekspliki niajn tezojn en la sino mem de ties parlamentoj kun Mac Allister (Mak Alist) kaj Vieilleville (Viejvil).

Nuntempe, per la nelacigebla agado de Lance Mallalieu, brita deputito, la trideko da parlamentanaj grupoj tut-

mondistaj diskonigas niajn ideojn ĉe la oficialaj instancoj de la Naciŝtatoj, de la Interparlamentara Unuiĝo kaj de UNO.

## TUTMONDISTAJ CENTROJ

Monaĥejoj, seminarioj, universitatoj... ĉiutempe tra la mondo ekzistis kaj ekzistas pensejoj, en kiuj novaj teorioj estas pristudataj, modifataj, perfektigataj, por esti poste diskonigataj eksteren.

Por Tutmondismo devas esti same. En tiuj Centroj dissemotaj sur la tuta tero la tutmondistoj devos kunveni, komune vivi, priparoli siajn tezojn.

La febreca vivado nuntempa malhelpas la pensadojn, la tutmondistaj centroj do forigu tiun mankon, antaŭplanante en la kampara kvieto ĉiutage plurajn horojn da komunaj diskutadoj.

Tiel, irante de Tutmondista Centro al Tutmondista Centro, la Mondcivitanoj povos akiri plejblan efikecon.

Unua impulso okazis per la Tutmondista Centro de la Kastelo de la Lambertie (Lamberti) apud Bordojo dum la 1971-a somero. Ĉu ĉi tiu eksperimento havos sekvojn, t.e. ĉu ĝi ebligos komencon de tiuj kolektivaj diskutadoj nepre necesaj por naski la novan, tutmondan konscion?

## TUTMONDIĜO

Male al la tutmonda civitaneco, kiu sin turnas al la individuo, tutmondiĝo sin turnas al la unuaranga ĉelo en la geografia socio, nome la komunumo. Per ĉi tiu artifiko la tutmondistoj intencas pli rapide atingi gravajn partojn de la loĝantaro, por ilin konvinki akiri Tutmondajn Instituciojn.

Tutmondiĝo konsistas el elpeto de la Magistrataro, ke ĝi konsentu kun la sekva ĉarto, redaktita en Kadurco (Cahors, Francio) la 20an de julio 1949.

### Tutmondiĝo Ĉarto

*Ni, loĝantoj de ....., per la nuna ĉarto deklaras nian urbon tutmondiĝinta.*

*Nia agado signifas, ke :*

- 1) Ni asertas, ke nia sekureco kaj nia bonstato estas ligitaj kun la sekureco kaj la bonstato de ĉiuj urboj kaj komunumoj en la mondo, hodiaŭ minacataj pri detruo per totala milito ;
- 2) Ni volas labori en paco kun ĉiuj urboj kaj ĉiuj komunumoj en la mondo, kunlabori kun ili por FONDI LA TUTMONDAN LEĜON, kiu garantios nian komunan protekton sub la aŭtoritato de tutmonda federa povo demokratice starigota kaj kontrolota ;
- 3) Ni vokas urbojn kaj komunumojn, entreprenojn kaj profesiojn, ke ili sendu kune kun ni siajn delegitojn al la unua Ĝenerala Kunveno de la tutmonda popolo por pretigi TUTMONDAJN BALOTADOJN POR ORGANIZADO DE LA PACO ;
- 4) Ni depostulas la rajton, senpere balotelekti niajn reprezentantojn ĉe la KONSTITUCIA ASEMBLEO DE LA POPOLOJ po unu delegito por unu miliono da loĝantoj ;
- 5) Ni postulas de nia registaro, ke ĝi plenumu la necesajn ELPRENOJN DE LA MILITA BUĜETO por nutri la Internacian Fonduson, kiu ebligos financi tiujn tutmondajn balotelektojn ;
- 6) Neniel malkonfesante nian ligitcon, niajn devojn kaj rajtojn al nia regiono kaj nacio, ni simbole proklamas nin TUTMONDA TERITORIO, ligita kun la tutmonda komunumo ;
- 7) Ni vokas ĉiun urbon kaj komunumon aliĝi al ĉi tiu solidareca Ĉarto de la urboj kaj komunumoj minacataj.

Ĉi tiu Tutmondiga Ĉarto estis balotakceptita en la vilaĝo de Cahors (Kahors) poste de 59% de la loĝantaro de Cahors kaj de 82% de loĝantaro de Figeac (Fijak) en 1950.

Post ĉi tiu unua sukceso 480 komunumoj, el kiuj 182 el departemento Gard (Francio), kaj ankaŭ 10 francaj departementoj, t.e. kolektivo el 3 400 000 loĝantoj, aliĝis al ĉi tiu Ĉarto. Sed ne estis eble ilin voĉdonigi al Asembleo de la Popoloj. Tiu solidareca impeto pli-malpli disfalis en forgeson dum multaj jaroj, ĝis tiu ideo fariĝis apogilo por la balotelektoj al la Kongreso de la Popoloj kun la komunumoj Vallon Pont d'Arc (Valon Pondark), Orval, Chasse-

Pierre (Ŝaspjer), Roc Amadour (Rok Amadur), Mont sur Marchienne (Mont ĉe Marŝjen), Anduze (Anduz), Puy Evêque (Pui l'Evek).

Post Francio ĉi tiu procezo estis reprenita de la Japanoj, kiuj aliflanke forlasis la nocion pri balotelekto al Asembleo de la Popoloj. Poste, ankaŭ kun malsimila stilo, tutmondigo okazis en Kanado kun la beno de la flago de UNO.

Se antaŭ 20 jaroj vastaj spacoj estis tutmondigitaj en Francio, ŝajnas, ke nuntempe tiaj vastaj spacoj troviĝas en Japanio kun Hiroŝimo, Tokio aŭ Kioto, ankaŭ en Usono kun Minneapolis (Minipolis), ĉio tio okazis tamen sur bazoj tute diferencaj de tiuj de la 50-aj jaroj, nome tiuj de la Tutmondiga Ĉarto.

Tutmondigo estas unu el la plej efikaj rimedoj por ek-konsciiĝi al la homoj, ke geografia kolektivo povas esti protektata, nur se ĝi integriĝas en tutmonda ĉirkaŭo.

## NACIECO

Por la tutmondistoj havantaj la okazon vojaĝi kaj kontaktiĝi kun tutmondistoj alilandaj estas facile, rimarki, ke ĉie kie ekzistas grupo, la opinio estas sama, nome: "Nia idealo nur malrapide antaŭeniras, tiagrade, ke estas seniluziige."

Nu, rigardante al la disvolvigo de la tutmonda politiko, oni konstatas, ke malfacile estus alie. Se post ĉiu milito blovas vento de pacismo kaj pacema idealismo - fakto speciale elmontrita per la gesto de Garry Davis (Gari Davis) - evidentiĝas, ke la tutmondista ideo, kvankam varmega aktuala, senĉese kolizias kun la naciismoj pli kaj pli malcedemaj obstinege manifestataj de ĉiu nacio.

Por ilustrati ĉi tiujn rimarkojn ni pririgardu kelkajn landojn. Unue, du landojn, kiuj estas aŭ estis ĉe la pinto de la aktualeco, nome Vjetnamio kaj Israelo. Estas neneeble, ke ĉiu el ili praktikas politikon sovaĝe naciisman. Memkompreneble, ne post mallonga tempo ĉi tiuj landoj konsentos pri limigo, profite al tutmonda organismo, de suvereneco, por kiun atingi ili batalas.

Tia estas la kazo de ĉiuj ekskoloniigitaj landoj, kiuj en

sia batalo kontraŭ la koloniaj regnoj maksimume disvolvis sian naciismon. Tia estas ankaŭ tiu de Germanio kaj Japanio, kiuj, post la milito kaj okupacio, volas reakiri sian naciecon.

Francio kaj Britio, kiuj unu post la alia estis la unuarangaj nacioj en la historio, riĉaj per tiu pasinto, ankaŭ volas defendi sian sendependecon, sian naciismon.

Lau alia vidpunkto, Svisio, Svedio, ĉiam profitinte de sia neŭtrala situacio, volas ĝin pludaŭrigi samtempe kiel siajn limojn.

Ankaŭ Hindio gardas sian suverenecon, kaj, kvankam favora al tutmondismo, ĝi ankoraŭ ne ekmarŝis la unuan paŝon al konkreta elmonstro, por la ceteraj regnoj, de la vojo al prudento. Ĝi strebas fariĝi la probatalanto de tiu tria forto, kiu volas ekvilibrigi al la du gigantoj, nome Sovetio kaj Usono. Ambaŭ ĉi-lastaj, same kiel Ĉinio, por defendi sian "gvidan" situacion, konstante plifortigas siajn naciismojn. Ĉu la konkero al la Luno ne estis prestiĝbatalo, pli ol konkera profitonta al la tuta homaro?

Cie do la naciismo plifortiĝas, kaj UNO pli kaj pli iĝas spegulo de tiuj naciaj suverenecoj. Ĉiu lando uzas ĉi tiun organismon por respektigi de la ceteraj sian propran naciismon, dum la rolo de UNO devus esti la iompostioma alkonduko de ĉiu el tiuj landoj al limigo de la propra nacieco. Anstataŭ reale plenumi sian rolon kiel unuigintaj nacioj, ĉi tiu organizo estas konstante devigata alpreni decidojn ebligantajn kontentigon de la malbonfaraj, naciaj suverenecoj, senĉese postulatajn de ĉiu registaro.

Ĉe tia politiko de plifortigo de la landlimoj, estas normale, ke tutmondismo travivas malfacilan periodon; antaŭ ol montri al ĉiu la vanecon de la landlimoj.

Krome, tutmondismo malfacile iĝas amasmovado: ĝi ne defendas la ĉiutagan nutraĵon, sed male prezentas celon tro malproksiman por naski entuziasmon. Simile, la minacoj pri milito iĝas la homojn skeptikaj pri la starigo de reala paco, kaj la loĝantaro nur de tre malproksime sekvas la ĉiutagan tutmondan politikon.

Dum certa tempo, eble eĉ dum multaj jaroj, la tutmondismo, escepte se okazus neatendita evento, povos esti defendata nur de malgranda grupo de "fanatikuloj" studentaj



la starigitajn demandojn, kaj komparontaj siajn rezultojn. En la tago, kiam la nacioj ekkonscios pri la vaneco de siaj bataloj favore al sia nacia suvereneco, ili tiam trovos la tutmondistan kernon, kiu tra la mondo povos valorigi sian ellaboraĵon fariĝintan realeco.

### RAPIDEGA POPOLKRESKADO

Dank'al la malkovroj de Jenner (Ĵener) kaj Pasteur, la homoj sukcesis malgravigi la infanaĝan mortadon, forigi la damaĝojn de la epidemioj kaj plilongigi la vivdaŭron.

El tio rezultas ega kreskado de la popola maso. Se ĉi-lastan ne moderigas malsanoj, militoj (laŭ Gaston Bouthoul - Butul - la du lastaj mondmilitoj senigas Eŭropon je 200 milionoj da kromaj loĝantoj), la homoj havas la devon eltrovi pli homecajn rimedojn.

Sed ĉi tiu planota moderigo kolizias kun multnombraj tabuoj, nome :

- la konceptoj de iuj popoloj, konsiderantaj esenca la posedon de multaj infanoj por sekurigi la maljunagŝon ;
- la malkvietiga puŝo de la naciismo ĉe la novnaskitaj ŝtatoj, volantaj kontraŭbatali la kontraŭnaskemajn konceptojn de la "eksaj koloniistoj" ;
- la deziro de la estroj, pretekste de la nacia grandeco, ekhavi pli kaj pli da regatoj estrotaj ;
- la malkvietiga pluivado de nenormaluloj, kiujn sukcesas savi la nuntempa medicinarto sed, kiuj nekontesteble naskas terurajn, moralajn problemojn.

Kiel do limigi ĉi tiun popolkreskan eksplodon sen solvoj mondskalaj, frontante la fiaskon absolutan de la provoj pri naskolimigo? Ĉu onin ne tentus tio, kion D-ro Escofier-Lambiotte (Eskofje-Lambjot) nomas la "escepta fekundeco" per uzado de iu substanco metota en la trinkakvon por senfekundigi ĉiujn planedloĝantojn? Kiam volus ĉi-lastaj naski, ili glutus medikamenton, neniigontan la unuan...

Kiel la prisanaĵ demandoj nepre estu senlandlimaj por kontraŭbatali la virusojn, kiuj ilin ignoras, tiel same la solvo de la problemoj pri rapidega popolkreskado nepre estu mondskala por eviti la memdetruon de la homaro per malesperaj militoj.

## ***4. DIVERSAĴOJ***

## LA SINDEVONTIGO

La tutmondismo volas naski tutmondanan ekkonscion, ja tute pretan naskigi konsekvence de la teknika antaŭenpuŝo mondskala, kaj tutmondismo devas sin ŝargi per siaj respondecoj por helpi la naskigon de ĉi tiu mondana konscio. Sed tutmondismo havas ankaŭ la devon disponigi al la planedloĝantoj teknikojn, ebligontajn sinorganizadojn de la homoj atingintaj ĉi tiun mondanan konscion. Tiel naskigis en 1949 la Internacia Registro de la Mond-Civitanoj : ĝi estas embrio de Tutmonda Civitan-registrado. Poste, en 1969, la tutmondistoj proponis duan teknikon mondskalan, nome transnacion voĉdonadon por balotelekti la delegitojn al la Kongreso de la Popoloj.

Tutmondismo, kiu ne devas konsistigi "opozicion", proponas komunan elirbazon por ĉiuj homoj, kiuj, kun tamen malsimilaj opinioj, tiam estas solidaraj antaŭ komunaj danĝeroj : memdetruo per atomaj kaj bakteriaj militoj, militemo de la suverenaj Naciŝtatoj, detruo de la naturo, pligrandiganta mizero.

Nu, per variaj agadoj la tutmondistoj sukcesis ekkonscigi novajn civitanojn pri iliaj respondecoj kiel mondcivitanoj ; inter ili iuj plenaj de entuziasmo deziras, ke tutmondismo ekprenu poziciojn, nomatajn "devontigaj", kiuj kompreneble varias laŭ ĉies konvinkoj. Estas evidente, ke se tutmondismo devontigas, ĝi falos rekte en la falreton de ĉiuj politikaj organizoj kaj forlasos la diritan rolon de elirbazo komuna al la tuta homaro, kio ne implicas, ke mondcivitano ne devas persone devontigi. Fakte, ĉiu mondcivitano rajtas, eĉ devas aktivi sine de la organizoj, kiujn li mem elektas, por labori por la specifa celo, kiun li opinias plej urĝa, ekzemple paco ĉe unu el la multnombraj lokaj militoj (Vjetnamio, Koreio, Biafrio, Mezoriento, Bengalio...), batalo kontraŭ malsato, kontraŭ analfabeteco, kontraŭ atoma aŭ bakteria armado, ekigo de ekonomio socialisma aŭ distribua, aŭ komunisma aŭ liberala aŭ anarkiisma, plibonigo de la Ĉarto de UNO, plibonigo de la politika reĝimo, de la konsumsocio, starigo de europa federismo, ktp. Sed tiu mondcivitano ne pretervidu, ke tiuj homaranaj celoj povos esti fine atingitaj nur per tutmon-

daj institucioj.

Ĉar oni ofte aŭdis : "Ne eblas esti mondcivitano, se ne armerifuzanto", "vera mondcivitano nepre partoprenu en la neperforta luktado", "vera mondcivitano nepre striku pri la armea imposto", "tutmondismo povas esti nur socialista"... Ĉiuj tiuj devontigoj alprenitaj nome de tutmondismo okazigus tiun frakciigon, kiun ĝuste tutmondismo devas eviti.

Pro tio ili povas esti alprenitaj nur individue. Ĉu ĉiuj francoj estas socialistoj, aŭ komunistoj, aŭ liberaluloj? Sammaniere ne ĉiuj mondcivitanoj estos komunistoj, kristanoj, budhanoj, socialistoj, liberaluloj aŭ neperfortuloj.

Tutmondismo ne ekskludas ; devontigo ekskludas.

Ni prenu kiel ekzemplon la socialistan devontigon, sed la rezonado kaj konkludo validas por ĉiaj ceteraj devontigoj. Diru, ke tutmondismo nepre finvenas al socialismo, tio estas anticipi la konstruadon de la estonta mondo, tio estas jam entutigi la diversajn socialismajn tendencojn sub ununura etikedo (kondiĉe, ke ĉiuj deziras kunloĝi), sed ĉefe tio estas forpuŝi egan nombron da loĝantoj de la planedo, tio estas fornei la tutmondisman mem. Estas la elektotaj delegitoj al la Kongreso de la Popoloj, kiuj difinas la ekonomiajn metodojn plej favorajn por eviti la danĝerojn minacantajn la tutan homaron. Estas je la franca Parlamento, en kies sino troviĝas ĉiuj politikaj tendencoj, kiu devus difini la ekonomian reĝimon, en kiu vivas Francio ; estas la Tutmonda Parlamento, kiu difinas la minimumajn regulojn nepre necesajn por la bona funkciado de la Tutmondaj Institucioj, nepre necesaj por la pluvivado de la homaro. Sed ni atentu ne roli kiel divenistoj! Diru la socialistaj partioj, ke ili povos starigi socialismon nur se tutmondismo sin trudos sukcese : jen perfektaĵo ; sed diru, ke tutmondismo povas esti nur socialismo, tio estas konsideri la problemon inverse. Se multnombraj socialistoj deziras, ke la estonta mondo estu socialista, ili havas la devon aktivi sine de socialista partio, por ke, kiam la Kongreso de la Popoloj estos funkcia (aŭ la Ĉambro de la Popoloj, kiu devus rezulti el la Kongreso de la Popoloj) estu multnombraj la balotelektitaj delegitoj socialistaj. Sed nun-

tempe tutmondismo estas teknika elirbazo, kiun oni ne rajtas antaŭtempe devontigi laŭ tia aŭ alia politika vojo partiema.

Evidentas, ke neniam ni estus aŭdintaj ion pri tutmondismo, se doktrinoj kiaj kristanismo, socialismo... estus sukcesintaj disetendiĝi sur la tuta tero por super ĝi regigi la universalan pacon, bazon de sia dekomenca teorio. Tial, ke ne troviĝas 4 miliardoj da kristanoj, aŭ 4 miliardoj da socialistoj, aŭ 4 miliardoj da neperfortuloj, aŭ 4 miliardoj da aktivuloj ĉe homaranaj movadoj, tial tutmondismo naskiĝis. Ĝi trudiĝis sin kiel teknika necesajo, ĉe fiasko de ĉiuj ceteraj homaj organizoj.

Estas ege evidente, ke se Tutmondaj Institucioj povos esti starigitaj, la kolosaj armadklopodoj nuntempe prikonsentataj, tiam estos direktotaj al aliaj celoj ebligantaj solvon de iuj inter la ĝis nun nesolveblaj problemoj. Nuntempe ni ĉeestas interbataladon de 200 Naciŝtatoj suverenanaj, vane priserĉantaj mutualajn protektojn. Tiel, la estonta mondo regota de Tutmondaj Institucioj neeviteble estos pli justeca, ĉar la homo disponos pri grandegaj rimedoj por forigi la maljustaĵojn de la nuntempa, dividita mondo.

Se de 25 jaroj tutmondismo ne estus observinta tiun nedevoŝigon, ĝi estus ĉesinta aspekti, fronte al la ripetitaj fiaskoj, kiel la nura politika savilo por la efika organizado de la mondo.

Kiam agema homo malkovras tutmondisman, ĝi tuj volas ĝin kolorigi, kaj se eble ĝin superi, per sia propra agmotivo. Ĝi ne konscias, ke tutmondismo estas la komuna elirbazo por ĉiuj homoj, ekskludonta neniun el ili.

### KIA TUTMONDA POVO ?

La ekonomikisto Robert Lattès (Lates) asertas, ke post malmultaj jardekoj, sesdeko da plurnaciaj societoj superregos la mondon ; ke baldaŭ ĉi tiuj societoj mastrumos, ĉiu el ili minimume duonon de la buĝeto de Francio. Ili tiam trudos sian volon al ĉiuj nacioj en la mondo, ĉar ili malsubiĝos al ĉiuj naciaj kontroloj, kompreneble ankaŭ al supernaciaj, ĉar ĉi-lastaj ne ekzistas!

La politika povo rezignas antaŭ la ekonomia, kaj se

oni konsideras valida la prognozon de Guillaume-Georges Picot (Vilhelmo-Georgo Piko) antaŭdiranta formorton de UNO post deko da jaroj, ne plu restos io fronte al ĉi tiuj plurnaciaj societoj.

Penetritaj de naciismo, de nacia sendependeco, centmiloj da politikistoj pro sia mallarĝa vidkapablo estas perdantaj ĉian povon fronte al sesdeko da administrantaroj, tio estas fronte al milo da mastrumistoj, kiuj regos la mondon per sia propra polico kaj propra informa reto sen ia popola kontrolo, sen ia demokrata kontrolo.

Kiel en la Konstantinopola erao, centmiloj da politikistoj diskutas pri la sekso de la anĝeloj, en la nuna cirkonstanco pri la nacia suvereneco, ne konsciante, ke ili estas rezignantaj. Ĉi tiu sankta principo malebligas ĉian plibonigon de la Ĉarto de UNO. Ĉi tiu sankta principo ebligas al la plurnaciaj societoj traŝanĝi la arbaron de la naciaj leĝoj kontraŭdiraj, por establi sian superregon.

Nu, aŭdante niajn politikistojn, oni povus kredi, ke ili estas plenaj de prudento kaj pensas nur pri konstruado de estonteco, promesplena por iliaj regatoj.

Ĉu Georges Pompidou (Georgo Pompidu), eksa Prezidento de la Franca Respubliko, ne laŭdis la parlamentanojn en Versajlo, la 2an de septembro 1971, ĉe Kongreso de la Interparlamentara Unuiĝo? Li eĉ asertis, ke la parlamentanoj estas respegulo de la popolo por kontroli la plenumovon; tamen, kiel nacia homo li kompreneble ne povis diri, eĉ antaŭ tiu monda asembleo, ke la plenumovo devas esti ne nacia, sed tutmonda, necese kontrolata de tutmonda parlamento.

Li konstatis ankaŭ, ke la teruraj spertoj travivitaj de la homaro ne sukcesis elimini la militojn; li deklaris ankaŭ, ke Francio estas preta partopreni efektive kaj sur ĉiuj terenoj ĝeneralan malarmadon tuj, kiam ĉi tiu estos reala kaj kontrolata; sed li ne diris, ke por plenumi ĉi tiun kontrolon necesus konsenti pri eluzado de la nacia suvereneco, se nur por akcepti la kontrolistojn sur la propra teritorio. Nu, por atingi memlogikecon li devus diri, ke Francio estas fariĝonta en la mondo la unua nacio komenĉanta tian procezon de limigo de suvereneco; tiom pli facile, ke tio estas skribita en la antaŭparolo de la franca konstitucio; sed tion li ne eldiris, ĉar, celante sian baldaŭan rebalot-elektadon, li ne povis fondi sian propagandon sur principoj

malsamaj al tiuj de li defenditaj de jarcentkvarono.

Sammaniere eksa franca Ĉefministro parolis en 1971 pri tutmonda krizo, la mona ; sed li ne diris, ke por naski la konfidon, sola bazo de bona moncirkulado, necesas krei tutmondan konfidon, t.e. krei tutmondan politikan organizon per delegado de la nacia povo al tutmonda organizo. Tion li kapablis nek diri nek fari, ĉar li riskus perdi povon, kiun li fundamentis sur la sankta principo pri nacia suvereneco.

Nu, la politikistoj havantaj la povon ŝategas povon kaj volas ĝin plu teni. Ili scias, ke la plimulto de iliaj voĉdonantoj ne estas matura por la tutmondistaj tezoj. Alprenante tiajn poziciojn, ili riskus esti forbalaitaj profite al naciistaj kandidatoj. Anstataŭ instrui siajn kuncivitanojn kun la risiko perdi la povon, ili preferas marŝi en ties direkto kaj konduki ilin en senelirejon. Sed ili estos konservintaj la povon kaj tio estas esencaĵo por politikistoj, kiuj ne plu havas sufiĉan tempon en la daŭro de sia "regado" modifi la mensostataton de siaj kuncivitanoj.

La dramo, ĉar dramo ja estas, kuŝas en la fakto, ke ĉiuj politikistoj en la mondo karieradis sine de la mallarĝa kadro de la Naciŝtato. De ĝi ili ne plu povas liberigi, sen risiko perdi sian "situacion", tiukaze la povon. Nu, neniu el ili estas sufiĉe sindonema, sufiĉe homeca, por laŭtege proklami solvon, kiun li ne havis tempon apliki. Neniu politikisto havas sufiĉe da homara konscio por sin saboti mem politike, por montri la sekvendan vojon.

Jam estas tiel malfacile por la plimulto atingi la povon interne de iu Naciŝtato, kaj tiel malfacile ĝin konservi post la atingo, ke ŝajnas neeble, turni siajn pensojn al novemaj ideoj.

Ĉu oni ne vidis Mac Arthur (Mak Artur) post sia eks-oficigo verki tekstojn tutmondemajn... tro malfrue.

Lord Attlee (Adli) post sia deviga politika foriro, tiam efike helpi la tutmondistojn... tro malfrue.

Kaj ĉu eĉ De Gaulle (Degol) en sia parolado en Meksiko, elvokante la neceson de homara unuö, ne ekvidis, ke la sola solvo estas tutmonda?... tro malfrue.

Ĉu la politikistoj ekkomprenos ĝustatempe, ke la nacia politiko kondukas al ilia propra politika morto, fronte al la plurnaciaj societoj?

Sed ĉu oni povas esperi, ke nacia politikisto iam faros tutmondan politikon? faros demokration mondskealan?

## KONDIĈOJ POR TUTMONDA ORDO

Kien iras la homaro?

Laŭ unuj, al kompleta venko de kapitalismo kun natura selektado de la fortulo super la malfortulo. Laŭ aliaj, estas plia paŝo al la "H" horo, kiu ebligas al komunismo starigi sian estontan teran paradizon. La plimulto tamen klopodos kiel eble plej malbone trapasi la teruran katastrofon, pretigitan de la estrantaj malplimultoj. Nu, al la plimulto necesas direkti nian atenton ; ĉi tiu plimulto estas ĝi, kiu trudos sian volon ; ĝi, kiu devas ĉerpi el si la necesan forton por neniigi ĉiujn eksmodajn organizojn kondukantajn la homaron al propra perejo same forte kiel ili komunikis al ĝi siajn nuntempajn konojn.

La homaro nuntempe scipovas krei, ĝi ne scipovas sin adapti al siaj malkovroj. La homaro scipovas produkti, ĝi ne scipovas dispartigi siajn riĉaĵojn. La unua problemo necesigas moralan reformon ; la dua, ekonomian.

Tiel longe dum la spirita evolunivelo ne egalos la materian evolugradon, estos neeble starigi perfektan socian staton ; restas tamen evidente, ke pro mistakso al la materia progreso la spiriteca Azio brilas per sia mizero, kaj ke pro mistakso al la spirita progreso Okcidento brilas per siaj militoj.

Tuja solvo al ĉi tiuj malbonoj povas esti provizata per rapida, efika, ekonomia reformo, kiu igos la maŝinon sklavoj de la homo, ne la homon marioneto de la propra kreaĵo.

Ĉia agado tamen necesigas toleremon, al alies ideoj, kaj volo al malcedema renverso kondukas la plej sincerajn al fiasko. Sukceson ni ja volas, per ampleksa plano kun vastaj kaj efikoplenaj celoj, per tutmonda ordo eblos rehavigi al la plimulto la konfidon, kiun ĝi perdis.

Estas ja certe, ke la deziro al propra rezigno profite al la kolektivo ne eniris ĉies menson.

Estas certe eĉ, ke la deziro al senlima, individua posedo ne povas malaperi de tago al morgaŭo.

Fine, estas certe, ke la privata iniciato ne povas esti



tuj direktata al alia direkto, ol la dum jarcentoj sekvita.

Sed malgraŭ tio la homo, se ne perdinta ĉian racion, morgaŭ kapablos starigi interajn ŝtupojn por la produktado kaj dispartigo de la riĉaĵoj.

La eventoj pli rapidas ol la individuaj konceptoj. Tra la tuta mondo blovas vento de naŭzo kaj fatalismo kontraŭ kiu oni kredas, ke ne eblas reagi.

Malvere! Dum la eraoj plej dramecaj, plej malfacilaj, plej senkuraĝigaj, tiam ekaperas la necesa sedimentado donanta al la homaro ties necesan orientadon.

### VIGLA GARDEMO

Tutmondismo disvastiĝas.

Spite sian relativan malforton, tutmondismo nepre eniru la menson de ĉiu homo, klopodanta pripensi la problemon sur konkreta tereno, t.e. la planeda.

Sed ĉi tiu progresado okazas je kosto de devojiĝo, ĉar ofte tiu, kiu uzas la vorton, ne konservas al ĝi ĝian unuan difinon, nome :

"Tutmondismo estas la kunmetaĵo de la konceptoj kaj agadoj celantaj solidarigi la popolojn de la terglobo kaj starigi Leĝon kaj Instituciojn, al ili komunajn."

Fakte tiu vorto ofte estas uzata kontraŭsence. Ĝi estas metita anstataŭ "internaciismo", kiu lasta male signas kunmetadon de Naciŝtatoj, ne elvokante ideon pri "transnaciismo", inkluditan en la vorto "tutmondismo".

La vorto tutmondismo ankaŭ estas foje uzata malprave por difini transnaciajn agadojn koncernantajn tiam nur parton de la tutmonda loĝantaro, batalantan kontraŭ alia parto, ekzemple "tutmondigo de la registaroj, de la batalo de la laboristoj, tutmondigo de la grandaj societoj..." Tiel ĉiu ŝajne volas aglui tiun terminon je siaj propraj politikaj konceptoj, por tiel atingi kroman interesataron.

Evidentas, ke la vorto tutmondismo riskas esti senigita je sia origina signifo laŭmezure kiel ĝi estos uzata de pli multnombraj homoj. Estos unu el la taskoj, kaj ne la plej malgrava, por ĉiuj volantaj firmterni tutmondisman ekster ĉia partiema batalo, senmaskigi tiajn erarigajn uzadojn. Tutmondismo ebligas doni al la homoj novan pensmanieron, inkludante la homon en sia tuto, ne

limigante sin al tempa, limigita politika batalo.

Kiam tutmondismo fariĝos tiu politika forto, kiu ĝi ne-  
pre fariĝu, tiam la profesiuloj de la partiana politiko uzos  
ĝin en sia programo por havigi al si la respondajn voĉdon-  
adojn. Tiutempe tutmondismo estos survoje al sukceso,  
sed tiam ankaŭ tiam necesos resti viglaj.

## LA HOMO KAJ LA MAŜINO

Multnombraj estas la ekonomiaj sistemoj, dank'al kiuj  
la homoj esperas fundamenti la feliĉon en la mondo. Es-  
tas du, kiuj nuntempe vetbatalas inter si la rajton dis-  
etendiĝi sur la tuta universo, nome kapitalismo kaj komun-  
ismo.

Ĉi tiuj du sistemoj, kiujn oni pretendas kunekzistigi,  
estas konsiderataj profunde diferencaj ; ĉu tamen la ho-  
moj, partizanoj de iu aŭ alia, ne havas similan sintenon  
kontraŭ iuj problemoj, ekzemple la maŝina ?

Ĉu la maŝino drivata de ruso aŭ de usona laboristo, ne  
devigas la homon al samaj gestoj?

Sub kapitalismo oni ĉeestis la naskiĝon de tajlorismo  
celanta pliigi la produkteblon ; sed ĉu malsimilas la ko-  
munista tekniko ŝtaŝanovismo por pliigi la produktokvan-  
ton?

Sub kapitalismo oni establis hierarkion de salajroj por  
vigligi ĉies agemon ; sed, ĉu la komunistoj ne estigis  
similan pagoŝtuparon por malhelpi droniĝon de la proleta  
revolucio en neproduktokapablo?

Sub komunismo estas konstanta zorgo protekti la labor-  
iston en uzino, en maljuneco, ĉe malsanoj, sed, ĉu kapital-  
ismo ne celis identan protektadon per iaj el siaj sociaj  
pliboniĝoj?

Sub komunismo, ekonomio estas komplete direktata ;  
sed, ĉu la planita ekonomio de la kapitalistaj Ŝtatoj  
- New Deal (Nju Dil) de Roosevelt (Ruzvelt) aŭ disvolvaj  
planoj - tiel malsimilas?

El tio rezultas, ke ĉe racia uzado de industria aktiveco  
por difinita celo sin trudas la samaj produkt- kaj organiz-  
metodoj. Ĉi tiuj produktometodoj, ellaboritaj el malsimilaj  
bazoj, konverĝas, tial ke ambaŭ sistemoj devas utiligi du  
entojn, nedependajn de la rigidaj principoj kaj identajn

por ĉiuj landoj, nome la homon kaj maŝinon. Ĉe sufiĉe longdaŭra, paca periodo, ambaŭ sistemoj ja povus kunfandiĝi en unu solan, se nur iliaj propagandistoj volus konkretigi la celon de siaj agadoj, nome respekti la homon, submetante la maŝinon.

Sed tuj ĉe aplikado de la plej bona produktosistemo restos solvenda la problemo pri posedo de la produktata riĉaĵo. Al kiu ĝi apartenos? Ĉu al kelkaj individuoj laŭ la reguloj de la kapitalisma sistemo, aŭ al la socio laŭ la reguloj de la komunisma?

Tiu gravega demando estos solvota pere de Asembleo de la Popoloj, suverena kaj demokrata, kiu sola kapablos trudi decidojn de ĉiuj akcepteblajn.

## MAJO 68

### **Tutmondismo estas la respondo al Majo 68**

En Majo 1968 la (francaj) studentoj manifestaciis ĉe la Nacia Asembleo, kriante : "Pri landlimoj ni senzorgas!" Santiago de Ĉilio, Stokholmo, Berlino, Romo, Madrido, Tokio, Varsovio, Praho kaj Parizo, Cohn-Bendit (Kon-Bendit), Dutschke (Duĉke) kaj Marcuse (Markuz), jen nomoj, kiuj eksploze aperis ĉe la frontpaĝo de ĉiuj ĵurnaloj en la mondo.

Tiu Universitato, fandujo de la estra klaso kun siaj 600 000 studentoj nur en Francio, estas plenmutacianta. Nova fortorilato en la socio estas naskiganta, nome kva-zaŭ fulma kreskado de inteligenteco okazas antaŭ niaj okuloj.

Se la Tria Stato en la XVIII-a jarcento permilitis la Bastilon, en la XIV-a ĝi lasis sian lokon al la laborista klaso por starigi la Komunon. Sed la studentoj ne volas fariĝi la viktimoj de la XIX-a jarcento. Ilia kulturo ebligas al ili antaŭenigi. Ili scias, ke "io" ne bone funkcias. Ili scias, ke necesas ion fari. Ili hezitas pro spertomanko, sed entuziasme sekvas gvidantojn siaĝajn. Ĉu malprave? La junularo de 1914 sekvis siajn gepatrojn, militirante ; tiu de 1939 same agis, ankaŭ tiu de 1956 en Algerio.

Kaj ĉi tiuj junuloj metas demandojn :

Ĉu racia, tiu kurego al progreso, kiu frakasas la laboristojn kaj elpuŝas al mizero 20% de la loĝantaro, kiel okazas en Usono?

Ĉu racia, tiu konsumeconomio, kiu laŭdire liberigas la homon, sed nedubbele forpuŝas ĝin en nesekurecon?

Ĉu raciaj, tiu senlaboreco de la 20-jara salajrato kaj ties neuzebleco kiam 40-jara, dum la 80-jara administraciisto ankoraŭ havas sian monan valoron?

Se blovis ribelvento, la kialoj ja estas evidentaj.

Se eksplodis la perforto, ĉu ĝi ne estas logika konkludo de la instruo, de la ekzemplo transdonita de la gepatroj? La junuloj ja bone scias, ke tiu perforto estas rimedo por konsiderigi siajn problemojn, ili scias ankaŭ, ke ne per perforto ili solvos ĉi tiujn problemojn.

Analfabetaj mizeruloj ebligis ĉiujn revoluciojn ekde 1789 ĝis 1917. Sed la ribelanta inteligentularo havas la devon eltrovi aliajn irvojojn. Estu la ribelo de majo 1968 tiu de la racio, kaj disvastigu ĝi tra la mondo!

- Ĉi tiu racio devas pripensigi trans la landlimoj pro la samtempa diskonigo de penso en ia ajn loko en la mondo.

- Ĉi tiu racio devas konduki al respondeco de ĉiu civitano kontraŭ ĉiu alia, kiaj ajn estas ties raso, religio, idearo.

- Ĉi tiu racio devas serĉi solvon al problemoj pri pli konvena dispartigo inter produktado kaj laborforto, starigitaj pro la gravaj ekonomiaj problemoj, atingantaj tutmondan amplekson.

- Ĉi tiu racio devas konduki al detruo de la limlinio inter mizero kaj riĉeco ne nur inter riĉaj kaj malriĉaj landoj, sed ankaŭ interne de ĉiu lando, riĉa aŭ malriĉa.

- Ĉi tiu racio devas konduki al plurdimensia reprezentado de la moderna civitano por mastrumado de ties universo, per establado de vera tutmonda civitanismo.

- Ĉi tiu racio devas reloki la homon en ĝian medion por al ĝi ebligi efikan agadon sur la tutmonda ŝaktabulo.

Nur ĉi tiu racio, tolerema racio, povas krei tiun tutmondan konscion, kiu sur materiala kaj spirita terenoj havas la devon reorganizi la modernan mondon profite al ĉiuj planedloĝantoj.

Neniu malpli povas utili al la endanĝerigita civilizo.

Antaŭ tia misio ĉu la tutmondistoj restis senagaj? Certe ne.

Jam la 18an de majo 1968 la aŭtoro diskutigis la tutmondistajn tezojn en la Odeon-Teatrejo dum preskaŭ tuta horo, antaŭ pli ol mil personoj, kiuj forte elmontris sian interesigon.

La 20an de majo en Sorbono (scienca Universitato) eksplode elmontrigis sama simpatio. La 23an de majo, la 1an kaj 8an de junio en la granda Sorbona amfiteatro antaŭ 3000 ĝis 4000 personoj Georgo Friedmann (Fridman), Teodoro Monod, Renato Dumont, Johano Rostand kaj Roĝero Ikor aplaŭdigis la tutmondistajn tezojn far entuziasma aŭkultintaro.

Ĉi tiuj kunvenoj, 50 000 flugfolioj, konstantejo en Sorbono, ebligis al la mondcivitanoj prezenti al la studentoj la solajn valorajn respondojn al la demandoj, kiujn ili faris al si.

## ***5. KONKLUDO***

La vivo sur la tero estus ŝuldata al eksterordinara koincido de temperaturo kaj materioj, kaj, laŭ la diro de iuj scienculoj, oni devus esplori sennombrajn galaksiojn por malkovri similan koincidon.

Ĉi tiu vivo naskis centmilojn da specioj de vivaj estaĵoj, kiuj, por firmigi sian propran pluvivon, sin detruas reciproke pro agresemo; la homo superis la ceterajn bestajn speciojn. Ĝia agresemo foje sin turnis kontraŭ la homo mem kaj oni povas taksi je 2 aŭ 3 miliardoj la nombron da homoj mortigitaj far la homoj: militoj, torturoj, eloferoj, ribeloj, geriloj, el la 67 miliardoj pasintaj sur nia planedo, almenaŭ laŭ la nuntempa kono.

La plej agresemaj fariĝis estroj, ofte okazigintaj verajn buĉadojn, de Ĝingis-Hano ĝis Stalin, tra Aleksandro, Cezaro, Napoleono aŭ Hitler. Tiel ĉiuj estroj dum certa tempo scipovis orienti la individuan agresemon al ununura direkto, plej bedaŭrinde por la popoloj suferintaj pro ĉi tiu kolektiva agresemo.

La religioj volis reagi kaj sensukcese provis ŝanĝi la homan mensostaton. Fakte, la amasbuĉadoj de Aztekoj fare de Cortès (Kortes), la religiaj militoj en Francio kaj Hindio, la plej vasta buĉejo de kristanoj en Verduno pravas la fiaskon de la religioj kiel agentoj por paca kunloĝado de la planedloĝantoj.

La homoj ja provis ekonomian reformon dum la lastaj jardekoj fronte al la sovaĝa kapitalismo. Nu, la komunismo, sola oponenta forto, ne kontentigis la esperon, malgraŭ la grandegaj suferoj necesigitaj por ĝia establado. Nur la atoma timo stopis la progresadon de unu aŭ alia ekonomia organizo inter si dispartigantaj la nuntempan mondon.

Antaŭ ĉi tiuj kontraŭantaj tendencoj, ĉiuj fiaskintaj, antaŭ la riskoj okazigotaj de akcidenta ekigo de atoma milito aŭ de sistema detruado de la vivmedio, la homa specio havas la devon turni sian inteligenton, sian racion, eĉ sian naturan agresemon al aliaj celoj, eĉ se ĉiu surtera faro estas destinita al malapero, tial ke la Tero mem malaperos. Sed la homa specio, en la daŭro de sia

pasado sur ĉi tiu planedo devas kiel eble plej bone organizi la ekziston de ties loĝantoj, donante pli da justeco kaj malpli da sufero.

La tutmondistoj estas la solaj estigintaj tion, kio povas esti tiuj novaj teknikoj postulatataj de la morgaŭa mondo:

- Tutmonda Civitan-Registro,
- Tutmondaj balotelektoj,
- Tutmonda federismo.

Se la povoposedantoj volas, ke ilia posteularo pluvivu, ili nepre apliku la tutmondistajn tezojn, cele igi loĝebla la spacan ĉelon de la homoj.

Jen la libro estas finverkita.

Dankon, amiko leganto, ke vi atingis ĉi tiun paĝon.

Sed dankon ĉefe al miaj amikoj Andreo Casteilla (Kasteja) kaj Emilo Bauchet (Boŝe), kiuj ĉiumonate devigis min, kaj tio dum jaroj, pripensi la ĉapitrojn de ĉi tiu libro.

Dankon simile al Marie-France Rawicki (Ravicki) kaj edzino mia, kiuj suferis la tedan laboron tralegi la manuskripton kaj kontraŭ kiuj mi opiniis ne devige obei (celante verki "personan" verkon) ĉiujn ĝustajn kritikojn.

Dankon ankaŭ al Petro Moch (Mok), kies deziro estas: "ĉio por la propagando". Ĉu ĉi tiu libro havas en ĝi sian lokon?

Dankon ankaŭ al:

B. Mark (brito)

Suzana Makaroff (germanino)

P-ro Kotani (japano)

Remondo Doury (esperantisto).



## ***6. ANEKSOJ***

La historio pri tutmondismo ne apartenas al la kadro de ĉi tiu libro. Tamen necesas mencii kelkajn gravajn faktojn kaj kelkajn bazotekstojn, ebligantajn la ekziston de Tutmondismo.

## UNUA POPULARA AGADO DE TUTMONDISMO

- 25 APR. 48 : Garry Davis (Gari Devis) forneas sian usonnan naciecon.  
SEP. 48 : Garry Davis tendumas sur la tereno de UNO.  
19 NOV. 48 : La tutmondistoj interrompas la kunsidon de UNO.  
22 NOV. 48 : 5000 personoj en Salonego Pleyel en Parizo.  
5 DEC. 48 : 25000 personoj en la Vintra Glacidromo (Parizo)  
14 APR. 49 : Interkonsento de la mondcivitanoj.

## INTERKONSENTO DE LA TUTMONDAJ CIVITANOJ

Kiel estontaj mondcivitanoj,

Fronte al la detruaj pretigoj sin organizantaj antaŭ niaj okuloj, fronte ankaŭ al la konfesata senpoveco de la Ŝtatoj, de la Blokoj, de UNO, por defendi la minacatan vivon,

Ni deklaras endanĝerigataj ĉiun homon, ĉiun vilagon, ĉiun urbon kaj la homan specion.

Ni deklaras la tutan homaron en stato de rajta defendo kontraŭ la suverenaj Ŝtatoj, kontraŭ la ideoj kaj propagandoj, pretendantaj pravigi sinturnon al milito.

Ni deklaras malfermita la reĝimkrizon de la mondo.

Antaŭ ol estos tro malfrue :

Ni volas, ke ekiĝu komuna leĝo kaj **tutmonda federa povo** komisiota ĝin aplikigi.

Ni postulas, ke la popolo de la mondo, sola suvereno en ĉi tiu krizo, estu demokrate konsultata kaj organizu mem la balotelektojn al Konstitucia Asembleo de la Popoloj, samtempe kun la unuaj MONDKONCERNAJ OFICOJ celantaj garantii la nutradon, sekurecon kaj informadon de la mondpopolo.

Ni konfidas al la unuaj reprezentantoj balotelektotaj al la Asembleo de la Popoloj la nepre devigan taskon, organizi intermetiĝon inter la du mondaj blokoj por **paŭzo**

ebligonta al la popoloj rekonsciigi kaj igi maksimuma la produktokapablon teknikan de la maŝino por uzo favora al la pacaj bezonoj.

Konvinkitaj, ke venis la tempo por ĉiu homo eniri la aktivan servon de la homaro,

Konvinkitaj, ke la Ŝtatoj priententus niajn dirojn nur, se ni estos dekmilionope kunigitaj,

Konvinkitaj, ke la homaro estiĝos nur, se estiĝos nova konfido de homo al homo,

Ni vokas la homojn al novaj heroaĵoj por plenumi la agojn de rifuzo, kuraĝo kaj espero, de kiuj dependas la estonto.

Ni vokas la popolamason libere sin mem mobilizi por paco, cele ne esti morgaŭ mobilizata de la Ŝtatoj por ties milito.

Ni vokas la plej eminentajn reprezentantojn de la scienco kaj publika kulturo, plenumi siajn respondecojn, por ke la homoj ne restu izolitaj en sia timego.

Kontraŭ la interkonsento de la Ŝtatoj ni kontraŭmetas la **interkonsenton de la homoj**.

Ni firme decidas nombri nin tra la landlimoj, ricevante la karton komunan al ĉiuj mondĉivitanoj.

Ni staros viglaj kaj agemaj ĝis la monda Popolo estos doninta Konstitucion al la mondo.

## DUA POPULARA AGO DE TUTMONDISMO

La dektri jenaj mondfamaj eminentuloj :

- Lord Boyd Orr (Britio), Unua Direktoro de FAO, 1945-1948, Nobelpremiito pri Paco 1949.
- Josué de Castro (Brazilio), eksa Prezidanto de la Konsilantaro de FAO, Prezidanto-Fondinto de la Internacia Centro por Disvolvigo.
- Danilo Dolci (Italio), pioniro de la ekonomia disvolvigo de Sicilio, Leninpremiito.
- Shinzo Hamai (Japanio), eksa urbestro de Hiroŝimo.
- P-ro J.L. Hromadka (Ĉekoslovakio), Profesoro pri teologio, Prezidanto de Kristana Popaca Konferenco.
- P-ro Alfred Kastler (Francio), Nobelpremiito pri fiziko 1966, Membro de la Franca Instituto (Scienca Akademio).

- S-ino Rajan Nehru (Hindio), verkistino.
- P-ro Linus Pauling (Usono), Nobelpremiito pri ĥemio 1954, pri Paco 1962.
- Abato Pierre (Francio), fondinto de la Emaŭsaj Komunumoj.
- Jean Rostand (Francio), biologo kaj verkisto. Membro de la Instituto (Franca Akademio).
- Lord Bertrand Russell (Britio), filozofo, matematikisto, Nobelpremiito pri Literaturo 1949.
- P-ro Ivan Supek (Jugoslavio), Profesoro pri filozofio, kaj sciencoj, Membro de la Scienca kaj Literatura Akademio, Prezidanto de la jugoslava "Pugwash" movado.
- P-ro Hans Thirring (Aŭstrio). Profesoro pri fiziko en la Viena Universitato, Membro de la Scienca Akademio.

lanĉas jenan ALVOKON la 3an de marto 1966 :

Ĉe neesto de supernacia leĝo la Ŝtatoj estas devigataj kalkuli kun forto por defendi siajn interesojn. Konsekvenco : milito, ĉu vola ĉu akcidenta, de post la malintegrado de la atomo kaj disvolviĝo de la bakteriaj armiloj iĝanta absurda "fina solvo", genocido disetendiĝanta al la tuta homa specio.

Ĉe neesto de tutmondaj institucioj kapablaj certigi kontentigon de la fundamentaj bezonoj komunaj al ĉiuj, la homa personeco estas ofendata. Dum kolosaj riĉaĵoj estas malŝparataj, du trionoj el la homaro suferas pro malsato.

Tamen la sciencaj kaj teknikaj progresoj ebligas organizadon de tutmonda komunumo, en kies sino regus paco kaj abundo, kaj la fundamentaj liberecoj estus garantiataj al la individuoj, popoloj, nacioj.

Kial ne estas tiel? Tial ke la registaroj hipnotizitaj de sia devo antaŭigi la naciajn interesojn de sia lando, for al konsento pri la necesaj transformadoj, eĉ malhelpas la agadon de la internaciaj institucioj, kreitaj por defendi la universalan pacon kaj servi al la homo.

La savo povas veni nur de la popolo de la mondo, de la individuoj ĝin konsistigantaj, de ĉiu el ni.

La unua agado, simpla kaj efika, kiun ni konsilas

plenumi al ĉiu el vi, kiel ni mem faris, estas enlistigi  
vin kiel Mondcivitanon.

La dua paŝo, kiun ni kune faros, se vi sufiĉe mult-  
nombre respondos al nia alvoko, estos organizado sur  
transnacia bazo de la balotelekto de delegitoj, komisi-  
otaj defendi la homan celkaŭzon, esprimi la depostulojn  
de la popolo de la mondo, kaj fine ellabori la leĝon de  
mondo pacema kaj civilizita.

## KONGRESO DE LA POPOLOJ

La tutmondistoj, konsciaj, ke ili povas  
kalkuli nek kun la registaroj nek kun la  
parlamentoj por kunvenigi la Konstitu-  
cian Asembleon de la Popoloj, kreas  
iom post iom la Repezantan Asembleon  
de la Mond-Popolo ; tia estas la bazideo  
de la projekto pri la Kongreso de la Po-  
poloj, kies funkcioj estos :

- 1.1. - Starigi la inventaron de la fundamentaj bezonoj  
komunaj al ĉiuj homoj.
- 1.2. - Proklami la neceson de tutmondaj institucioj.
- 1.3. - Difini skize :
  - a) sur kiuj terenoj estas necesa la interveno de  
supernacia aŭtoritato ;
  - b) kiuj trandonoj de kompetenteco je la profito  
de la tutmondaj institucioj estu konsentotaj  
de la suverenaj ŝtatoj ;
  - c) la necesajn kondiĉojn, por ke la tutmondaj ins-  
titucioj estu demokratece starigitaj ;
  - d) la strukturojn de la kreota supernacia aŭtori-  
tato.
- 1.4. - Verki rekomendaran kajeron koncernantan la es-  
tontan Tutmondan Konstitucion.
- 1.5. - Starigi konsilantaron konsistantan el malgranda  
numero da fakuloj kaj komisiotan ellabori projek-  
ton de konstitucio, kalkulante kun ĉi-enaj reko-  
mendoj.
- 1.6. - Tuj kiam ĝi estos preta, prezenti ĉi tiun projek-  
ton de Tutmonda Konstitucio al la naciaj regist-

aroj kaj parlamentoj, ankaŭ al la diversaj internaciaj asocioj arigantaj iujn el ili.

1.7. - Ekigi kun la institucioj celataj de la punkto 1.6 traktadojn por la ratifado de la Tutmonda Konstitucio kaj alpreni la ceterajn iniciatojn opiniatajn utilaj, cele al la ekaplikado de tutmonda, demokrata reĝimo tia, kia ekzemple kunvenigon de Konstitucia Asembleo de la Popoloj balotelektota en kondiĉoj de strikta egaleco.

1.8. - Esprimi, se necese, la opinion aŭ volon de la popolo de la mondo koncerne la eventojn interesantaj la sorton de la homaro.

## DEKLARO de la 15a de NOVEMBRO 1968

### eldirita antaŭ 3000 ĉeestantoj en Parizo

Kontestata en multnombraj landoj, nia civilizo fiaskis :

- ĝi ne kapablis solvi la problemon pri malsato en la mondo,
- ĝi ne sukcesis protekti la ĉiuspecajn malplimultojn,
- ĝi ne scipovis solvi la problemon pri paco,
- ĝi ankaŭ ne scipovis integri sian tutan junularon.

Antaŭ 20 jaroj la Hiroŝima bombo vekis kaj skandalis iujn el ni.

Antaŭ 20 jaroj, izolulo, juna usonano Garry DAVIS, por protesti kontraŭ la militema politiko de la Naciŝtatoj, disŝiris sian pasporton, apelaciis al supera aŭtoritato kaj metis sin sub la ŝirmon de UNO.

Antaŭ 20 jaroj preskaŭ je responda tago, precize la 19an de novembro 1948, ĉi tiu izolulo, ĉi tiu senpatriulo, akompanata de kelkaj mondĉivitanoj, interrompis la kunvidon de UNO per jena parolado :

*"Sinjoro Prezidanto, Sinjoroj,  
Je la nomo de la popoloj de la mondo ne ĉi tie reprezentataj mi interrompas vin.*

*Niaj vortoj sendube estos al vi sensignifaj. Tamen nia bezono pri tutmonda ordo ne pli longe povas esti ignorata. Ni la popolo volas pacon, kiun doni povas nur tutmonda registaro.*

*La suverenaj Ŝtatoj, de vi ĉi tie reprezentataj, dividas nin kaj kondukas nin al la milita abismo.*

*Mi apelacias al vi, ke vi ĉesu pluteni nin en la iluzio pri via politika aŭtoritato. Mi apelacias al vi, ke vi tuj kunvoku Tutmondan Konstitucian Asembleon, svingontan la flagon, ĉirkaŭ kiu ĉiuj homoj povos kuniĝi, nome flagon de ununura registaro por ununura mondo.*

*Se vi ne plenumos ĉi tiun taskon, deiru, Asembleo de la Popoloj ekŝprucos el la tutmondaj amasoj por konstrui tiun registaron.*

*Ĉar nenio malpli povas utili al ni."*

Antaŭ 20 jaroj ni ne estis serioze konsiderataj, kiam ni jam denuncis la reĝimkrizon de la mondo.

Hodiaŭ aŭskultas nin miloj da simplaj civitanoj en la mondo, ankaŭ scienc- kaj kultur- eminentuloj, el kiuj iuj, venintaj de diversaj landoj, ĉi-vespere sidas ĉi tie.

Fronte al la registaroj de la Naciŝtatoj, kiuj plu ignoras nin, ne disponante pri la gravaj informrimedoj por aŭdigi nian voĉon, ni estis devigataj ellabori projekton pri popola reprezentado mondskala, iom post iom ekfunkciigota.

La unua efektivigo de tiu projekto estos ekfunkciigata la 3an de marto 1969, dato de la unua transnacia balotelekto.

Laŭmezure kiel pli kaj pli multnombraj homoj konfesos sin mondcivitanoj, ni organizos novajn balotelektojn.

El tiuj balotelektoj ekiĝos konstanta Kongreso de la Popoloj, kies reprezenteco pli kaj pli influos la decidojn de la registaroj.

**Ĉar NI DIRAS :**

**NE** al la absoluta suvereneco de la Ŝtatoj,

**NE** al la vetarmado ;

**NE** al la detruo de la urĝe necesaj varoj,

**NE** al la mizero de la Tria Mondo,

**NE** al la fortordita kaj partieca informado,

**NI DIRAS NE** al ĉiuj landlimoj malhelpantaj dialogon inter la homoj.

Antaŭ 20 jaroj ni eble estis profetoj.

Hodiaŭ la mondpopolo estas kaptonta sian sorton en proprajn manojn.

La mondcivitanoj ja estas rezolutaj, sukcesigi siajn depostulojn, postulante ke la Ŝtatoj delegu parton el sia suvereneco profite al transnaciaj aŭtoritatoj, certigontaj la kontentigon de la fundamentaj bezonoj, komunaj al ĉiuj homoj.



## FUNDAMENTAJ BEZONOJ KOMUNAJ AL ĈIUJ HOMOJ

La unua funkcio de la delegitoj balot-elektotaj al Kongreso de la Popoloj, kiam ĉi-lastaj valide sidos, t.e. kiam ĝi entenos 10 delegitojn, konsistos el enlistigo de tiuj bezonoj ; tial, la Franca Centro de la Mondcivitanoj starigis projekton, kiu, kvankam certe tute ne komplete, tamen povus esti prikonsiderata. Ĝi prezentas la fundamentajn bezonojn komunajn al ĉiuj homoj, kiam la Tutmondaj Institucioj estos kreitaj por ilin aplikigi.

### Enkonduko

La **fundamentaj bezonoj** komunaj al ĉiuj homoj povas esti priatentataj nur en tutmonda ĉirkaŭo.

La **fundamentaj bezonoj** povas esti prikonsiderataj kiel unuaecaj bezonoj de la homa estaĵo kiel individuo aŭ kiel homspeciano.

Al la **fundamentaj bezonoj** respondas serio de fundamentaj rajtoj, ebligantaj al la individuo kaj specio eviti :

- la brutalan detruon per antaŭvidebla akcidento aŭ perforto,
- la detruadon per degenerado.

Al la **fundamentaj bezonoj** respondas ankaŭ devoj, taŭgaj por certigi la ĉi-ene formulatajn rajtojn :

### RAJTOJ

La unuaranga rajto estas :

**RAJTO JE VIVO**, necesiganta respekton al ĉiuj aspektoj kaj ĉiuj fiziologiaj kaj fizikaj, naturaj eblecoj de ĉiu individuo.

El tiu rajto rezultas la du jenaj konsekvencoj :

**RAJTO JE SEKURECO** fronte al la risko, en kazo de milito, de brutala detruo per la atomaj, bakteriaj kaj ĥemiaj armiloj. Ĉi tiu rajto necesigas la forigon mondskalan de la armiloj, ankaŭ politikan kaj ekonomian organizaĵon kapablan, per ĉesigo de ĉia mizero, enkonduki

pli da justeco en la interhomajn rilatojn.

RAJTO JE FORSAVO EL LA MALRAPIDA DETRUO pro fizika degenerado kaŭzita :

- ĉu de malsato ;
- ĉu de difektado de la vivmedio ; nome, nepra neceso alpreni planedskale ĉiujn antaŭrimedojn transnaciajn por elsavi nian vivmedion : aeron, akvon, grundon, kontraŭbatalante ĉiajn toksojn ĥemiajn, atomajn kaj ceterajn.

Ĉi tiuj rajtoj protektantaj la vivon de ĉiu individuo konsekvence certigas la pluvivon de la homa specio.

Aliaj rajtoj ŝajne malpli unuarangaj fakte ne estas malpli fundamentaj. Por ilin difini, necesas kalkuli kun ia relativeco tempa kaj spaca. La energi-bezonoj de Eskimoj kaj tiuj de Tuaregoj evidente ne estas samaj, kvankam eblas por ĉiu difini nombron de necesaj kalorioj, proteinoj, lipidoj aŭ vitaminoj.

Sed ĉi tiuj bezonoj, variantaj laŭ la latitudoj, povas vari ankaŭ laŭ la vivniveloj, kaj tiel oni povas konstati neakcepteblajn malegalecojn.

Por garantii al ĉiu ĉi tiun vivminimumecon, necesas certigi jenajn rajtojn :

RAJTO JE NUTRAJO

RAJTO JE LOGADO KAJ VESTADO

RAJTO JE MEDICINAJ ZORGĜOJ

Kontentigo de ĉi tiuj tri bazaj bezonoj devas esti certigata de la socio al ĉiu planedano, ĉefe se ĉi tiu loĝanto ne povas sin provizi mem (senlaboreco, malsano, kripleco, maljuneco, natura katastrofo aŭ ĉia cetera perdo de vivrimedoj pro cirkonstancoj nedependaj de ĝia volo).

Sed la homa estaĵo estas ne nur korpo : ankaŭ ĝia spirito devas havi eblecon disvolviĝi, ekflori kaj sin esprimi.

Restas do certigenda tuta serio de egalecaj kaj neforigeblaj RAJTOJ por eviti la psikan degeneron okazigitan :

- ĉu de malsekureco, kaŭzita de arbitreco de la povo,
- ĉu de socia forpuŝado pro manko de instruo aŭ alia kaŭzo.

RAJTO JE SENPAGA EDUKADO cele provizi egalecajn

ŝancojn al ĉiuj sociaj kategorioj.

RAJTO JE INFORMADO.

RAJTO JE AKCEPTO EN KOLEKTIVO. La nuntempa mondo pli kaj pli emas dispartigi la homon disde ties natura, homeca medio. Necesas reestigi ĉi tiun medion, por ke ĉe ĉiu stadio de sia vivo la individuo povu ĝui homecajn kontaktojn.

RAJTO je memmanifestado, je individua respondeco, reago kontraŭ la nombro-homo, ĉar la homo devas male konscii pri sia rolo en la disvolviĝo de la homa specio.

RAJTO je liberpensado, liberaj opinioj, konscienco, religio, kulto, asociiĝo, cele ne esti persekutata pro siaj opinioj kaj povi ilin anonci tute sekure.

RAJTO je justeco antaŭ tribunalo publika, sendependa kaj senpaga.

RAJTO je digno, kiu devus aparteni al ĉiuj membroj de la homa familio. (Neniu estu submetita al arbitra entruĝo en sian privatan vivon, familion, loĝejon aŭ korespondadon. Nek sklaveco, nek torturo, nek ajna difektado de la homa stato estos ellasataj).

### DEVOJ

Certe necesas difini rajtojn, sed estas same necese, difini devojn, ĉar, vivante en socio, la homo devas limigi sian liberon tie, kie komenciĝas alies.

DEVO por ĉiu respekti ĉies devojn antaŭe difinitajn.

DEVO plenumi siajn civilajn, demokratajn devojn, partoprenante en la estigo kaj mastrumado de la tutmonda politiko, do neceso

- informi sin,
- voĉdoni,
- konsenti al ĵurianeco por igi la justicon senpartia kaj efika,
- respekti la havaĵojn al ĉiuj komunajn.

DEVO pri konscia generado :

- por feliĉa infaneco,
- kontraŭ fulmrapida popolokreskado en respekto al ĉiuj konsciencoj kaj al la vivo.

## TUTMONDISMO KAJ HOMAJ RAJTOJ

Deklaro de la 24a de oktobro 1971  
(Reventago de la Ĉarto de UNO)

NI KONSTATAS, ke la SENPOVAJ Unuiĝintaj Nacioj :

- ne povas malhelpi la Naciŝtatojn lasi ofendi la Homaj Rajtojn ;
- nur partete povas agi kontraŭ la paradoksa malsato sine de abundo ;
- ne povas efike kontraŭbatali la mondkalajn nocojn ;
- ne povas sin ŝarĝi per la respondeco al ili konfidita, nome daŭrigi la pacon per akordigo, arbitraco kaj apelacio al la Internacia Justica Kortumo.

NI POSTULAS por UNO pliigitajn povojn por :

- akiri nomumon de Alta Komisaro, ebligantan ellaboradon de Universala Konvencio pri la Homaj Rajtoj, kaj ties ratifon fare de ĉiuj Ŝtatoj ;
- organizi la disvolviĝon de la produktado, justan dispartigon de la urĝe necesaj varoj kaj ĉeso de ties detruado ;
- krei konstantajn organizojn, kies decidoj sin aplikos al ĉiuj Ŝtatoj en la mondo, cele kontraŭbatali la mondkalajn nocojn ;
- pli efike agi kontraŭ la militkaŭzoj, aplikigante la rezoluciojn alprenitajn de UNO.

NI POSTULAS veran REPRESENTACION de la POPOLOJ en la sino de la estraj organizoj de UNO.

Ni scias, ke la senpoveco de UNO fontas i.a. kaŭzoj, el la artikolo 2a, § 7a de la Ĉarto, kiu ne agnoskas por UNO ŝupernaciajn povojn.

NI POSTULAS, ke UNO, okaze de sia 25a Kunsido, pristudu la rimedojn por modifi ĉi tiun artikolon kun la celo akcepti, favore al ŝanĝita UNO, **limigon de suvereneco de ĉiu Naciŝtato**, por organizado kaj defendo de la paco, protektadon de la malplimultanoj, internacian sekurecon, tutmondan disvolviĝon kaj respekton al la Homaj Rajtoj. PLIE, je la datreveno de la Deklaro pri la Homaj Rajtoj, nome la 10an de decembro 1970, ni vokas ĉiun homon sentantan sin koncernata, partopreni Grandan Publikan

Mitingon, kun celo tiri la konkludojn necesajn por la pluvivado kaj elsavo de la Homaro.

(Subskribis :) **Mondcivitanoj - Tutmondaj Federistoj.**

## **ĈARTO DE LA TUTMONDISTAJ INSTRUISTOJ**

La fincelo de tutmondista instruado ne estas adapti la homon al la nuntempa socio, sed ellabori socion je la servo de la homo. Ne plu temas pri edukado de homo de iu nacio, reĝimo aŭ religio, sed de membro de la tutmonda komunumo.

Tutmonda civitismo fakte estas nur batalo por agnosko de la homaj rajtoj.

La tutmonda civitismo identigas kun la interesoj de la homaj estaĵoj, sen konsidero pri sekso, raso, socia klaso, religio, nacio.

La tutmonda civitismo kontraŭatakas ĉiajn antaŭjuĝojn, ideojn aŭ sistemojn, damaĝantajn la homan dignon.

Ĝis la lasta jarcento la celo de ĉia instruado estis en ĉiu nacio trejni elitulojn kaj estrojn.

La demokratigo de instruado ebligas al la nuntempaj, naciaj registaroj ĝin kontrolantaj, morale kaj socie adapti la individuon al la interesoj de la funkcia socio.

Tiel la homo ankoraŭ nuntempe difinas sin nur tra sia nacia civitaneco : homo sen nacieco ne ĝuas ekziston, la senpatriuloj tion pruvas.

Sammaniere la nacia civitismo identigas kun la interesoj de iu nacio malprofite al la ceteraj.

Al tutmondista instruado estas do destinate, per paroladoj, verkoj aŭ agoj :

- sennaciigi la Historion,
- diskonigi la nocion pri federismo,
- denunci ĉe ĉiu okazo la socian maljustecon, ŝovinismen, rasismen,
- hontosigni ĉiajn entreprenojn, riskantajn vundi la biologian integrecon de la homo,
- ekribeli kontraŭ ĉiuj skandalaj situacioj, senigantaj la homon pri flego, nutraĵo, informado aŭ libero.

## **PRINCIPOJ DE L.P.L. LERNEJO, PACILO**

"Pere de la lernejo estos al ni eble, ĉe la planedido naski nepre necesan, universalan konscion, per kiu ĝi reale sentos sin Mond-civitano, apartenanta al la granda homa familio".

Jacques Muhlethaler (Multaler)

La lernejo estas je la servo de la homaro.

La lernejo malfermas al ĉiuj infanoj en la mondo la vojon al reciproka interkompreno.

La lernejo instruas la respekton al la vivo kaj homoj.

La lernejo instruas toleremon, tiun kvaliton ebligantan akcepton ĉe aliuloj de sentoj, ag- kaj pens-manieroj malsimilantaj niajn.

La lernejo kreskigas ĉe la infano la senton pri respondeco, unu el la plej grandaj privilegioj de la homo. Ju pli bonigas ĝia stato, des pli ĝi havas la devon preni sur sin respondecojn.

La lernejo instruas al la infano supervenki sian egoismon. Ĝi komprenigas al ĝi, ke la homaro povas progresi nur per personaj klopodoj kaj ĉies agema kunlaborado.

## UNIVERSALA MOVADO POR TUTMONDA FEDERO

kreita de la 17a ĝis la 23a de aŭgusto 1947

### AGADPLANO laŭ 10 PUNKTOJ

1. Provizi UNO-n per la povo fari leĝojn por la paca finarango de la konfliktoj kaj por malebligi al ĉiu nacio perforte interveni en la internaciaj rilatoj. Tiuj leĝoj devigu la individuojn kaj naciojn. Samtempe estu akceptata iom post iom plano por universala, kompleta malarmado.
2. Estigi tutmondan Aŭtoritaton por disvolviĝo, disponanta pri la rimedoj necesaj por la ekonomia kaj socia progreso de la senhavaj nacioj. La tutmonda organizo disponu rimedojn ebligantajn al ĝi, plibonigi mondscale la vivnivelon per pli justaj komercaj kondiĉoj, per mona reformo kaj aliaj rimedoj nepre necesaj por disvolvi pli justan tutmondan komunumon.
3. Finpretigi planon por universala kunlaborado, kalkulonta kun ekvilibro de la voĉdonoj sur la leĝofara tereno, pli justa kaj realismema ol la nuna, laŭ kiu ĉiu nacio disponas pri unu voĉo.
4. Havigi al iu ĵura organo de UNO la povon klarigi la mondajn leĝojn kaj la ekzistantan internacian juron, nome solvi la konfliktojn inter nacioj per paca rimedo kaj juĝi la individuojn, akuzotajn pri atenco al la tutmondaj leĝoj pri malarmado aŭ pri agresado.
5. Estigi plenumorganon de UNO, sen vetoarajto, respondeca antaŭ la Ĝenerala Asembleo kaj kontrolonta la policfortojn de UNO.
6. Krei meĥanisman igontan aplikeblaj la decidojn de la organoj de UNO pere de reto de inspektoroj, civila polico, tribunaloj kaj pacoforto, konvene armota.
7. Publikigi tekston, difinontan la rajtojn de la individuoj kontraŭ ĉia arbitra aŭ maljusta agado de UNO, kiu malebligis al UNO sin intermeti en la rajtoj kaj liberecoj

garantiataj al ĉiu civitano, per siaj propraj, naciaj aŭ ŝtataj institucioj.

8. Konsenti al UNO la aŭtoritaton kaj povon mastrumi la marojn kaj spacon kaj ceterajn kampojn klare difinitajn de internacia juĝorajto.

9. Ebligi al UNO estigon de sufiĉaj rentoj per fiska sistemo limigota kaj klare difinota.

10. Destini nur por la nacioj kaj popoloj ĉian povon ne klare delegotan al UNO, tiel garantiante al ĉiu nacio kompletan liberon ĉe administrado de siaj internaj aferoj kaj ĉe sia elekto de sistemo ekonomia, politika aŭ socia.



## EJNSTEJN

Unu el la plej belaj paĝoj en la Tutmondismo :  
tiu de Alberto EJNSTEJN

La tutmondistaj aŭtoroj ne estas konataj de la vasta publiko kvankam pli ol 100 tutmondistaj libroj estis verkitaj de antaŭ kvaronjarcento. Sed famaj personoj kaj verkistoj foje uzis siajn skribilojn por defendi nian aferon. La plej granda el ili, tiu, kiu pelis la mondon en la atoman eraon, ekparolas por finverki ĉi tiun libron :

*Komprenigi al la homoj el la tuta mondo la eblecon de ilia detruado, jen la plej grava socia funkcio, kiun la intelektuloj iam devis plenumi. Ĉu ili havos sufiĉe da kuraĝo por elpeli siajn ligitecojn ĝis la grado necesa por igi la popolojn de la mondo ŝanĝi laŭ tute fundamenta maniero siajn naciajn tradiciojn profunde enradikigitajn?*

*Eksterordinara barakto estas nepre necesa. Se oni fiaskos nun, la supernacia organizo estos pli malfrue konstruota, sed tiam ĝi estos konstruota sur la ruinoj de granda parto el la nuntempa mondo. Ni esperu, ke la abolo de la internacia malordo nun ekzistanta, ne estu atingota je kosto de tutmonda katastrofo, de ni trudota al ni mem, kaj kies amplekson neniu kapablas imagi. Terure mallonga estas la restanta tempo. Nun ni devas agi, se ne, neniam.*

*Estas bedaŭrinde nenia indiko, ke la registaroj konscias, ke la situacio, en kiu kuŝas la homaro, nepre necesigas adopton de revoluciaj rimedoj.*

*Dum la du komencaj jaroj de la atoma erao, alia fenomeno estis konstatita. La publiko, sciigita pri la hororiga naturo de la atoma milito, nenion faris kontraŭ ĝi, kaj grandparte forpelis la averton de sia konscienco.*

*La organizo de UNO, tia, kia ĝi hodiaŭ staras,*

disponas nek pri polica forto nek pri leĝa fundamento por estigi staton de internacia sekureco. La reala povo nuntempe kuŝas en la manoj de malmultuloj.

Necesas, ke estu starigitaj la kondiĉoj garanti-ontaj al la individua ŝtato la rajton solvi siajn konfliktojn kontraŭ la ceteraj ŝtatoj sur leĝa fundamento kaj sine de internacia juĝorajto.

Necesas, ke la individua ŝtato estu malhelpata militi far supernacia organizo subtenata de polica forto ekskluzive de ĝi kontrolota.

Venis la tempo por UNO plifortigi sian moralan aŭtoritaton per kuraĝaj decidoj.

Unue, la aŭtoritato de la Ĝenerala Asembleo estu pliigata tiel, ke la Sekureckonsilio kaj ĉiuj ceteraj korpuso de UNO estu al ĝi submetitaj. Tiel longe, dum estas aŭtoritatkonflikto inter la Asembleo kaj la Sekureckonsilio la efiko de ĉia institucio neeviteble restos malforta.

Due, la metodo pri reprezentado al UNO devus esti ege modifita. La nuna metodo de elekto per registara nomumo lasas nenian realan liberon al la nomita membro. Krome, la elekto far la registaroj ne donas al la popoloj de la mondo la senton esti reprezentataj propre kaj proporcie. La morala aŭtoritato de UNO estus ege plifortigita per senpera elektado fare de la popolo. Se ili respondecus antaŭ voĉdonantaro, la delegitoj ĝuus multe pli da libero por obei sian konsciencon. Ankaŭ espereble estas, ricevi pli da ŝtatoj kaj malpli da diplomatoj.

Trie, la kunsido de la Ĝenerala Asembleo devus esti senĉesa dum la danĝera, transira periodo. Konstante restante ĉe la laboro, la Ĝenerala Asembleo povus plenumi la esencajn taskojn, nome :

- a) ĝi povus alpreni la iniciaton estigi supernacian ordon ;
- b) ĝi povus alpreni rapidajn kaj efikajn rimedojn en ĉiuj danĝeraj lokoj.

Antaŭ tiaj altaj taskoj la Asembleo ne plu devus delegi siajn povojn al la Sekureckonsilio, ĉefe tial ke la korpuso estas senmovigita per la malavantaĝo de la klaŭzo pri veto rajto. Estante la sola korpuso kompetenta por alpreni iniciatojn maltime kaj decide, UNO devas agi rapidege por krei la kondiĉojn necesajn por la internacia sekureco, kreante la fundamenton de vera tutmonda registaro.

UNO nun, kaj fine la tutmonda registaro, devas esti je la servo de ununura kaj sama celo, nome garantio pri sekureco, trankvileco kaj bonstato de la tuta homaro.

La membreco en supernacia sistemo pri sekureco miaopinie devus ne esti fundamentita sur arbitraj demokrataj modeloj. Ĉies nura depostulo devus esti, ke la reprezentantoj de la supernacia aŭtoritato, t.e. Asembleo kaj Konsilio, estu balotelektitaj de la popolo per sekreta voĉdonado en ĉiu membroŝtato. Ĉi tiuj reprezentantoj devas reprezenti la popolon prefere ol registaron, kio plifortigus la paceman econ de la organizo.

# ***7. TUTMONDISTA SUMO***

**LA TUTMONDISTAJ DATOJ**

**HOMOJ**

**LIBROJ**

**ADRESOJ**

## TUTMONDISTA SUMO

Dum 25 jaroj la tutmondistoj ĉiulandaj verkis, produktis librojn, eldonis bultenojn, revuojn, ĵurnalojn, faris prelegojn, organizis kongresojn aŭ aktivis sine de multnombraj movadoj. Sed kiam "laiko" petis dokumenton al li havigantan suman ekrigardon al tutmondismo, nenio troviĝis. Oni proponis flugfolion, titolon de iu libro... ne ĉemane, ekzempleron de ĵurnalo... bedaŭrinde elĉerpita, sed nenion kompletan. Tutmondismo ŝajnis transsendata per improvizoj de aktivuloj, pli ol per valoraj verkaĵoj.

Ĉi tiu manko de dokumentaro de antaŭ 15 jaroj sentebla iĝis urĝa ĉe la eventoj en majo 68. Kaj oni povas diri, ke post tiu periodo, ĉe prezentado de la broŝuro "L'Homme d'abord" ("Unue, la homo", franclingva) de Andreo Casteilla (Kasteja), kaj impulsite de Renee Marchand (Marŝan) kaj René Marlin, aperis la unua broŝuro titolita "Kelkaj bazaj principoj de Tutmondismo". La sukceso estis tre rapida, necesis du eldonoj, unu post la alia. Tiel la tutmondistoj havis sian "ruĝan libreton". La kovrilo fakte estis ruĝa kaj poste estis decidite, ke ĉiuj broŝuroj de ĉiuj aprobotaj ricevos tian kovrilon dum la ceteraj, eldonotaj kun malsama koloro, estos studbroŝuroj.

Poste redaktoteamoj naskiĝis ĉirkaŭ la kerno de kamaradoj kune laborantaj de pli ol 20 jaroj : Jean Diedisheim, Basile Ginger, Jeanne Haslé, Guy Marchand, Renée Marchand, René Marlin, Jean Prédine, Renée Volpelière, Roger Volpelière, Roger Wellhof, al kiuj ofte sin aldonis la Honorprezidanto de la Universala Movado por Tutmonda Federo, nome Francis Gérard, kaj la ĝenerala sekretario de la Tutmondaj Federistoj, nome Jerry Bourgeois. Iuj el ĉi tiuj redaktoteamoj sin ŝanĝis en komisionojn, kiaj tiu pri instruado kun P-ro Andrée Gaymard-Rollet kaj tiu pri sano kun D-ro Vincent, aŭ tiu pri poluado kun Josué de Castro, aŭ tiu pri malsato kun Bernard Muet.

Pli ol kvindek personoj tiel laboras de antaŭ kvar jaroj super kvardeko da titoloj.

Tiel aperis la 12an de decembro 1971 la unua volumo de tiu Tutmondista Sumo (1968-1971), kun jenaj dek broŝuroj, kunigitaj en bela bindaĵo (240-paĝa). (Iuj estas jam

tradukitaj en esperanto, angla, germana, nederlanda kaj itala) :

- Nº 1 : Bazaj principoj de tutmondismo.
- Nº 2 : Kongreso de la Popoloj (disponebla en esperanto)
- Nº 3 : Senlandlima instruado.
- Nº 4 : Tutmonda federismo.
- Nº 5 : Por transformi UNO-n.
- Nº 6 : Senlandlima sano.
- Nº 7 : Prelego de la 15a de novembro 1968.
- Nº 8 : Majo 1968.
- Nº 9 : Poluadoj.
- Nº 10 : Fundamentaj bezonoj.

La dua volumo de la Tutmondista Sumo (1972-1973) estas nun preta kun jenaj temoj : Bazoj de Tutmondismo (2a vol.), Tutmondigo, Tutmonda Civitan-registro, Baroj al Tutmondismo, Vortaro de tutmondismo, Rasismo, Malplimulto, Problemoj pri la tutmonda lingvo, Tutmonda helpokorpuso, Atomo.

Aperis ankaŭ la 3a volumo kaj eble aperos ankaŭ la 4a kun temoj kiaj : Filozofio kaj Religio, Funkciismo, Tutmonda Konstitucio, Malsato, Agresemo.

La Tutmondista Sumo estos kolektiva verkaĵo, nepre trovonta sian lokon en ĉiuj bibliotekoj.

## LA TUTMONDISTAJ DATOJ

- Junio 1945 - Libro : Anatomio de Paco, Emery Reves.  
Aŭgusto 1947 - Doktrino : Tutmonda Federismo, Montréux.  
1948 - Epopo : Mondcivitaneco, Garry Davis.  
27-7-1949 : Tekniko : Tutmonda Civitan-Registro, Parizo.  
Aŭgusto 1953 : Projekto : Plibonigo de UNO, Kopenhago.  
Aŭgusto 1963 : Pilargigo : Unua ekstereŭropa Kongreso,  
Tokio.  
3-3-1966 : Alvoko : 13 Tutmondaj Eminentuloj, Parizo.  
3-3-1969 : Tekniko : Unua transnacia balotelektado,  
La Tero.  
Aŭgusto 1970 : Varbigo : U Thant, Ottawa.  
12-12-71 - Sumo : Kolekto de Tutmondistaj Tekstoj,  
La Tutmondistoj.  
Julio 1975 - Unua Tutmondista Asembleo en Sanfrancisko.  
Julio 1977 - Unua Tutmondista Kulmino en Sorbono,  
Parizo.

## HOMOJ

Tutmondismo ekzistas, tial ke homoj pripensis tutmond-  
ismon, verkis pri tutmondismo, agis favore al tutmond-  
ismo. Necesas, ke la estontaj generacioj konu la nomojn  
de tiuj, kiuj forlasis nin :

*Alberti, Mac Allister, Bara, Victor Bassot, Maurice  
Belley, Gaston Berger, de Bevere, Jean Berthoumieu,  
G. Borghese, Rodriguès Brent, Ferner Brockway, Suzanne  
Bouillet, Jean Charon, Mary Tibaldi Chjesa, Chiostergi,  
Clark, Costa, de Beauregard, Jacques Capdeville, Maurice  
Cosyn, Clement Davies, Camille Drevet, Hippolyte He-  
brard, Grunebaum-Ballin, Jean Guyonvarc'h, Louise  
Guyesse, de Folin, Leslie Hale, Peter Hunot, Jacques  
Hovelaque, Germaine Kellerson, Lazarte, Louis Lecoin,*

David Lubin, Le Foyer, Leibniz, Lola Lloyd, Bernard Malan, Jacqueline Moulin du Pasquier, Nelson, Nepote, Edmond Privat, Otlet, Ruyer, Jacques Savary, Rosika Schwimmer, Clarence Streit, Umano, Marion Mac Vitty, Wolf...

Multaj famuloj helpis la tutmondisman aŭ faris deklarojn favorajn al ĝi :

Lord Attlee, Lord Boyd Orr, André Breton, Léon Bourgeois, Confucius, Winston Churchill, Albert Camus, Georges Duhamel, Ike Eisenhower, Erasmo, Albert Einstein, Charles de Gaulle, Shinzo Hamai, J.L. Hromadka, Johano XXIII, Kant, Pierre Girard, Victor Hugo, John Kennedy, Toyohito Kagawa, Emile Servan Schreiber, Jacques Maritain, Milton, Michel Montaigne, Montesquieu, Emmanuel Mounier, Thomas Mann, Pandit Nehru, Thomas Paine, Platon, Daniel-Rops, Paul Rivet, Jules Romains, Bertrand Russell, Lord Silkin, Sokrato, Sofoklo, Teilhard de Chardin, Sankta Tomaso Akeno, Volter, Wells, Richard Wright, Zenon...

Fine, utilas mencii la vivantajn (en 1973) eminentulojn, kiuj subtenas niajn tezojn :

Michel Ange Asturias, Hervé Bazin, Pablo Casals, René Cassin, Josué de Castro, Umberto Campagnolo, Danilo Dolci, Alfred Kastler, Thor Heyerdahl, Yehudi Menuhin, S-ino Rajan Nehru, Lester Pearson, Abato Pierre, François Perroux, Paŭlo VI, Linus Pauling, Emery Reves, Carlos Romulo, Jean Rostand, Leopold Senghor, Yvan Supek, Hans Thirring, J. Tinbergen, Peter Ustinov, Vercors, Setsuo Yamada, Hideki Yukawa...

Franca subten-komitato :

C. Aveline, M<sup>o</sup> A.Besson, F. Billetdoux, E. Bonnefous, J. de Bourbon-Busset, R. Buron, S-ino Clara Candiani, P-ro G. Casalis, M. Cépède, B. Clavel, J. Duboin, René Dumont, J. Fourastié, G. Friedmann, D-ro E. Georgiades, J. Grandmougin, J. Hélon, R. Ikor, Gen. G. Jousse, A. Lacassagne, P-ro J. Lasserre, H. Laugier, F. Le Lionnais, R. Lhombreaud, S-ino I. de Lipkowski, P. Marthelot, L. Moguy, Th. Monod, R. Mouton, D. Parker, L. Perillier, F. Pottecher, S-ino Romain-Rolland, J. Romains, R. Tournaire, S-ino Thome-Patenotre, D-ro M. Weill-Hallé.



## LIBROJ

I. Tutmondista Sumo : 3 libroj verkitaj de centoj da Mond-civitanoj kaj Tutmondaj Federistoj.

II. Tutmondistaj libroj :

ARNAUD-ULLIET, Le mondialisme contre la guerre.

ADM (Association pour le Droit Mondial), L'adaptation de l'O.N.U. au monde d'aujourd'hui.

BARR Stringfellow, Joignons-nous au genre humain.

BORGHESE G.A., Projet de Constitution Mondiale.

BOSSIN André, Les Nations et l'Organisation Mondiale de la Paix.

BRICMONT Georges, Où est l'Utopie?

CLARK Greenville et SOHN Louis B., La Paix par le Droit Mondial.

COMPRENDRE (revuo), Pour une autorité politique mondiale.

DAVIS Garry, My country is the world.

DIEDISHEIM Jean, Les Patries.

GERARD Francis, Vers l'Unité Fédérale du Monde.

FRONT HUMAIN des Citoyens du Monde, Tribune pour une Constituante Mondiale. Quelques réflexions sur un front humain nécessaire.

FORTOUL-GARTEL, Le Capital Humain.

HABICHT Max, The Abolition of War.

HAEGLER Rolf, Histoire et Idéologie du Mondialisme.

MALAN Bernard, La Paix scientifique.

MARCAIS Henri, Destruction Atomique ou Gouvernement Mondial.

MARCHAND Guy, Un ou Zéro.

MARCHAND Guy, Compétitivité, mère du chômage.

MARCHAND Guy, L'épopée Garry Davis.

De MEUTTER Léon, La conscience mondiale de la paix.

La paix mondiale par le mondialisme. La Paix.

MILLARD Everest Lee, Freedom in a Federal World.

PICHT Georges, Au bord du gouffre.

QUESNEL Louis, Le sens de l'Histoire.

REVES Emery, Anatomie de la Paix.

TEILHARD DE CHARDIN Pierre, La Planétisation humaine.  
TEPPE Julien, L'idole Patrie. Enquête sur le nationalisme.  
TOYNBEE Arnold, L'Etat Mondial est-il possible? Guerre  
et Civilisation.

### ADRESOJ

- \* REGISTRE INTERNATIONAL DES CITOYENS DU MONDE  
66, Boulevard Vincent Auriol, 75013 PARIS, France.
- \* CITOYENS DU MONDE, Centre français,  
15, rue Victor Duruy, 75015 PARIS, Tel.(1)531 29 99
- \* WORLD FEDERALIST MOVEMENT  
21 Leliegracht, Amsterdam, Pays-Bas.
- \* WORLD CONSTITUTION and PARLIAMENT ASSOCIATION  
1480 Hoyt Street, Suite 31, Lakewood,  
Colorado 80215, U.S.A.
- \* WORLD CITIZENS ASSEMBLY,  
312 Sutter Street, Room 608, San Francisco  
Calif. 94108, U.S.A.
- \* WORLD FEDERAL AUTHORITY,  
25 Dundana Avenue, Dundas, Ontario, Canada.
- \* CONGRES DES PEUPLES,  
15, rue Victor Duruy, 75015 PARIS, France.

**MONDANISTA LIBRARO**  
pri  
**MONDANISMO kaj MONDFEDERALISMO**

MONDANISMO klopodas proponi novan politikan organizon de la Homaro implicantan la transŝovon de kelkaj partoj de la Nacia Suvereneco al Tutmonda Federacia Aŭtoritato kapabla solvi per decido de la plimulto la problemojn, kiuj pridecidas la destinton de la homa raso : milito, malsato, troloĝateco, poluado, ekologio.

**VERKOJ**

**Unu aŭ Nul** de Guy Marchand  
tradukita de Heredanto - 120 paĝoj  
**Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato**  
trad. de Renée Volpelière kaj Daniel Durand - 28 p.  
**Malegalaĵoj, ĉu Fato ?** de Alain Cavelier  
trad. Kultura Esperanto-Centro Angers - 16 p.  
**AMIP-Mondanista Gazetoficejo** - kolekto 1980-84  
trad. de Raymond Doury kaj Jeannine Vincent - 66 p.  
**Por Tutmonda Civitanismo** de Andrée Gaymard-Rollet  
trad. de Daniel Durand kaj Fernand Boyet - 80 p.

**APERONTAĴOJ**

**AMIP-Mondanista Gazetoficejo**, sekvo de la kolekto  
**Kongreso de la Popoloj** - kolekto

**PERIODAĴOJ**

**Monda Solidareco** - Informilo de MFSKM, trimonata  
**AMIP-Mondanista Gazetoficejo**, monata, kvinlingva :  
franca, germana, esperanto, angla, hispana.

**KASEDOJ**

Diapozitivaj kaj sonbendo : "De brazila kamparano al la  
Ekonomia Organizaĵo Tutmonda".  
La tuto elmontras la helporganizaĵon al la Tria Mondo :  
"Solidareca Fonduso Tutmonda kontraŭ Malsato" 11  
110 diapozitivaj, sonkasedoj, broŝuro.

Vendejo - Informejo :

CITOYENS DU MONDE

15 rue Victor Duruy

F 75015 PARIS

Tel:

(1) 45 312 999

(registratoro)

P&K Paris n° 7710 46

# LEGITIM-KARTO

Nº

世界公民



विश्व-नागरिक  
WORLD CITIZEN  
ГРАЖДАНИН МИРА  
MONDCIVITANO

Mondcivitanece entenas la region beloti por  
senpera reprezentado de Tutmonda Asembleo  
de la Popoloj.

Represe  
"M"  
(espera


gitiim-karto  
vitano"  
(va eldono)

## IDENTECO

Nomo	
Agotkomoj	
Reskizinte la	
En	

## ADRESO

Strato	
Loko	
Lando	



INTERNACIA REGISTRO  
ESPERANTISTA  
Centro de Registrado  
de la BGD CIVILANOJ \*

**T**iu karto atestas, ke la koncernato estas registrita kiel Mondcivitano. Li strebos agnoski siajn respondecojn kiel membro de la Tutmonda Komunumo.

Subskribo de la koncernato,

ENHAVO

1. LA MONDO TIA, KIA ĜI ESTAS	7
Kial Unu aŭ Nul	9
2. LA MONDO TIA, KIA ONI ĜIN DEZIRAS	11
Fundamentaj bezonoj	12
Tutmonda civitismo	15
Tutmonda federismo	17
Tutmonda demokratio	20
Tutmonda federa konstitucio	22
Konsilantaro de la Saĝuloj	26
Tutmondista moralo	27
Malplimulto	29
Uzado de la teknikoj	31
Tutmonda asekuro	33
Tutmonda federa ekonomio	35
Tutmonda mono	38
Tutmonda Instituto por Disvolvado	40
3. LA RIMEDOJ	43
Tutmonda Civitan-Registrado	45
Kongreso de la Popoloj	45
Aliĝo de U.N.O.	51
Neptuno, Eteruno, Teruno	53
Eluzado de la nacia suvereneco	57
Regiona federismo	59
Tutmondistaj parlamentanaj grupoj	60
Tutmondistaj centroj	61
Tutmondigo	61
Nacieco	63
Rapida popolkreskado	65
4. DIVERSAĴOJ	67
La sindevontigo	69
Kia tutmonda povo?	71
Kondiĉoj por tutmonda ordo	74
Vigla gardemo	75
La homo kaj la maŝino	76
Majo 68	77

5. KONKLUDO	81
6. ANEKSOJ	85
Unua populara agado de tutmondismo	87
Dua populara ago de tutmondismo	88
Kongreso de la popoloj	90
Deklaro de la 15a de novembro 1968	92
Fundamentaj bezonoj komunaj al ĉiuj homoj	94
Tutmondismo kaj homaj rajtoj	97
Carto de la Tutmondistaj Instruistoj	98
Principoj de L.P.I. - Lernejo, pacilo	99
Universala Movado por Tutmonda Federo	100
Ejnŝtejn	102
7. TUTMONDISTA SUMO	107
La tutmondistaj datoj	109
Homoj	109
Libroj	111
Adresoj	112
Mondanista libraro en esperanto	113
Legitim-karto de Mondcivitano	114
Pri la aŭtoro	<b>kovrilpaĝo III</b>
1	
2	
3	
4	
5	
6	
7	
8	
9	
10	
11	
12	
13	
14	
15	
16	
17	
18	
19	
20	
21	
22	
23	
24	
25	
26	
27	
28	
29	
30	
31	
32	
33	
34	
35	
36	
37	
38	
39	
40	
41	
42	
43	
44	
45	
46	
47	
48	
49	
50	
51	
52	
53	
54	
55	
56	
57	
58	
59	
60	
61	
62	
63	
64	
65	
66	
67	
68	
69	
70	
71	
72	
73	
74	
75	
76	
77	
78	
79	
80	
81	
82	
83	
84	
85	
86	
87	
88	
89	
90	
91	
92	
93	
94	
95	
96	
97	
98	
99	
100	
101	
102	
103	
104	
105	
106	
107	
108	
109	
110	
111	
112	
113	
114	
115	
116	
117	
118	
119	
120	
121	
122	
123	
124	
125	
126	
127	
128	
129	
130	
131	
132	
133	
134	
135	
136	
137	
138	
139	
140	
141	
142	
143	
144	
145	
146	
147	
148	
149	
150	





**Guy Marchand** (Vito Maršan) naskiĝis la 3an de marto 1919. Inĝeniero pri Teknikoj, li iĝis tutmondisto fine de 1943 post restado en la malliberejoj de Gestapo kaj stranga restado en Germanio. Li definitive forlasis sian bordozan medion por pristudi la demandojn pri paco kaj justeco. Li ĉirkaŭveturis la mondon antaŭ ol renkonti, la 16an de septembro 1948, Garry Davis, kies konsilanto li estis dum kelkaj monatoj. En 1949, kun Renée Cosson (Renata Koson), kiu iĝis lia edzino en 1952, li kreas la Tutmondan Pres-Agentejon, semajnan gazeton kvarlingvan. Intertempe li superas la Mondrekordon sur glisilo (40 horoj 51 minutoj) kaj per siaj paroladoj en Germanio devigas la tri Grandŝtatojn liberigi aviadon en ĉi tiu lando.

Dum pli ol 30 jaroj Renata kaj Vito Maršan vivigis movadojn, eldonaĵojn, kaj helpis al organizado de Kongresoj, kiel tiuj en Japanio, 1963, en San Francisko, 1965, kaj 1975, en Parizo, en 1977. Ili ĉirkaŭvojaĝas la mondon kun siaj gefiloj Brigitte (Brigita) kaj Didier (Dezidero). Ili aktive partoprenis la duan lanĉon de Tutmondismo per la Alvoko de la 13, la balotelektadoj je la Popolkongreso, grandaj publikaj kunvenoj kaj la aperigo de la Tutmondista Sumo.